Sennacieca Revuo

Tekstoj pri:
Politiko
Nacieco
Laikeco
Edukado
Universalismo
Proletoj kaj aliaj esperantistoj

SAT 67, av. Gambetta , FR- 75020 Paris

Supplément au nr 4 Avril 2003 (1174) de Sennaciulo

Sennacieca Revuo

Nova Serio — jaroj 2002-2003

N-ro 130-131 — ISSN 1248 - 2293

Eldonata de Sennacieca Asocio Tutmonda

67,avenue Gambetta , F-75020 Paris

Redaktoro Jakvo Schram

Korektantoj N. Caragea, J. Lepeix, JoBo, K. Barkoviĉ kaj P Levy

Enhavo

Enkonduko		*2*
Sporade ĉirkaŭ SAT	*Kurisu Kei*	*4*
Esperanto kaj Freinet-Pedagogio	*L. Robert*	*12*
Esperanto kaj socialismo	*D. Blanke*	15
Postparolo Universalismo	*D. Kessous*	*20*
La plej nobla parto	*B. Brecht (N .Caragea)*	*32*
La franca escepto ... laikeco	*L. Robert*	*33*
Plurtavola naciismo	*G. Mickle*	*35*
La nova dekstrularo	*G. Mickle*	*37*
La ideologia stumblo inter Socialismo kaj (la)Internacia Lingvo	*A. Fernăndez*	*43*

Enkonduko

La 20a jarcento estis la parto el la historio kun la grandaj militoj, la atombomboj, feliĉe uzitaj nur dufoje. Ankaŭ forpasis la tempo de la grandaj diktatoroj, la homoj kiuj malaperis dum dekoj da jaroj en koncentrejoj/gulagoj, milionoj, kiuj devis morti pro la fakto ke ili havis maljustan kredon aŭ haŭtkoloron. Aliflanke retrorigardante mi honte konstatas, ke ni ankoraŭ ne sukcesis krei humanisman socion, egalecon al ĉiuj kun alia koloro, kredo aŭ deveno. Ni eĉ kaj daŭre ne kapablas kunvivi kun aliaj homoj kaj pensas ke niaj normoj estas la plej bonaj kaj ke aliaj nepre devas adaptiĝi al niaj kutimoj kaj moroj. Naciismo kaj fundamentisma kredo estas nur kelkaj danĝeroj, kiuj endanĝerigas la estontan pacan bildon. Ni vivas en epoko en kiu la rolo, kiun la komunikiloj ludas, ĉe la decido de la socia agendo, neniam estis tiel granda. Televido, radio, gazetoj kaj interreto grandparte decidas pri la penso de la homo. La mondo eniras tra elektra drato en vian vivĉambron. Politikistoj el la tuta mondo, antaŭ 50 jaroj en la tiama mondbildo gravegaj sinjoroj, iĝas nun dank' al la komunikiloj kvazaŭ parto de la familio. La samaj komunikiloj enŝovas ideojn en niajn kapojn, pri la grava rolo de nacia konscienco aŭ pravigo de libera merkato kiel plej bona vivkoncepto. La komunikiloj decidas pri bono aŭ malbono kaj preskaŭ ludas la rolon de niaj cerboj. Ili decidas por ni, ili pensas por ni. Ĉi tiu spirita pigreco altrudiĝas per la nova amaskulturo de bildoj kaj unuregulaj tekstoj, mallongaj novaĵ-eroj kaj por vivteni la malbonon, propagando por aferoj kiujn ni ne bezonas. Bildoj transformas la realecon kaj la merkat-ekonomio transformas la bildojn. Vortoj perdas sian originalan signifon kaj eniras alian diskurson ol antaŭe aŭ en frazoj kie ili ne trovas lokon. Homoj klopodas eskapi el la realeco, sed nur malmultaj por akiri pli bonan realecan sencon.



De tempo al tempo necesas elŝalti la elektronikan memoron kaj repreni tekstojn, kiuj ne okulfrapas pro koncizeco, sed pro enhavo. Tekstoj de homoj, kiuj kiel 'en la bona pasinteco' penadis pripensi ĉiujn vortojn, kiujn ili metis sur paperon. Tekstoj, kiujn oni ne povas mallongigi sen tuŝi la esencon. Tekstoj, kiuj meritas legadon.

Kiam legado de 10 paĝa teksto estas por vi puno, mi rekomendas ke vi reiru al via televidilo kaj spektu unu de la komercaj rapidaj superfluaj programoj, kiuj nun abundas, sed alportas, krom falsajn bildojn de nereala mondo, nenion.

La redaktado de Sennacieca Revuo estas tre interesa laboro, kiun mi faras kun granda plezuro, sed ankaŭ kun la espero ke vi, leganto, ne nur legas ĝin, sed ankaŭ pripensas ĉiun tekston, analizas ĝin kaj eble povas krei bildon pri tio, kion la verkantoj prezentas al vi.

Sennacieca Revuo estas eldonaĵo de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) kaj pro tio konforma al la statuto kiu tekstas: 'SAT celas per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.'

Bonan legadon, Jakvo

La frontopaĝo de nia revuo montras imagan bildon pri estonto de nia mondo kaj SAT. Scienco ludas pli ol iam gravan rolon en la vivo de homoj.

Tamen kiel vi povas vidi Sennacieca Revuo daŭre aperas sur papero. Ni sekvu la evoluon, sed ne neglektu la historion.

Sporade ĉirkaŭ SAT

Kurisu Kei

Prelego farita dum la tutlanda SAT-kunveno en Tokio, Japanio la 31-an de aŭgusto kaj 1an de septembro 2002

Karaj gekamaradoj! Saluton, ankaŭ dankon pro tio, ke multaj el vi bonvolis veturi al Tokio longan vojon el diversaj lokoj de Japanio nur por ebligi al mi, oldulo, partopreni ĉi tiun kunvenon.

Ni, SAT-anoj en Japanio, nun unuafoje kunvenas, ne kiel fakkunsido de SAT en la kadro de la Kongreso de Japanaj Esperantistoj, sed memstare. Tio miaopinie havas epokfaran signifon por la SAT-movado, ne nur en Japanio sed eĉ tutmonde, jam pro la relativa graveco de Japanio, kiun ĝi havas en la tutmonda Esperanto-movado ĝenerale.

Laŭ posta atentigo de TANI Hiroyuki, la peranto de SAT en Japanio, montriĝis, ke la tutlanda kunveno de SAT-anoj en Japanio jam okazis almenaŭ 6-foje, kvankam en formo de Lanti-festo, nome januare 1968 en Kameoka, februare 1969 en Ootu, januare 1971 en Arasiyama apud Kioto, januare 1972 en Kobeo, januare 1973 en Uzi apud Kioto, kaj en Ootu, januare en 1984.

Ĉi-okaze mi rakontos al vi mallonge, kion mi mem spertis koncerne SAT-on en mia ĝisnuna esperantista vivo, kaj kiel mi nun pensas pri SAT. Espereble tio almenaŭ iom kontribuos al la diskutado dum nia kunveno.

Ŝajnas al mi tamen necese komence difini, kio estas laboristo, sekve ankaŭ, kio estas laborista esperantisto.

Kiom mi scias, en la statuto de SAT ne troviĝas la difino, kio estas laboristo. Eble pro tio, ke tio ŝajnas memkomprenebla. Sed, kiel ankaŭ vi certe spertis, en la mondo ne malofte okazas, ke kio ŝajnas unuarigarde memkomprenebla ne ĉiam estas tiel. Tio miaopinie aplikiĝas ankaŭ pri laboristo.

Nun mi demandu al ĉiu el vi: Ĉu vi mem kun plena konscio rigardas vin laborista esperantisto? Ĉu vi ne sentas ian hezitemon vin nomi kaj esti nomata laborista esperantisto?

Koncerne min, mi konfesu al vi sincere, ke mi longe hezitis min nomi kaj esti nomata laborista esperantisto, malgraŭ ke mi jam delonge anas en SAT. Kial? Verŝajne pro tio, ke mi havis antaŭjuĝon pri laboristo estante intelektulo, kvankam ankaŭ mi estis kaj restas proleto, t.e. laboristo.

Ĉu vi jam havas ĉe vi la novan Plenan Ilustritan Vortaron antaŭ nelonge eldonitan de SAT? Mi mem tuj aĉetis kaj ĉiutage uzas ĝin.

Laŭ ĝi proleto estas: Homo, kies nuraj vivrimedoj estas vendo de sia laborforto aŭ korpa aŭ intelekta. Same estas en ĝia antaŭulo, la Plena Ilustrita Vortaro, escepte de tio, ke en ĉi lasta la epiteto 'spirita' estas uzata anstataŭ 'intelekta'. Kaj laboristo estas laŭ ambaŭ: Homo, kiu sin dungas por laboro. Do proleto estas sinonimo de laboristo, kaj inverse.

Kiu el ni ne estas proleto, t.e. laboristo laŭ la difino en la nova PIV kaj en la malnova? Do for la hezitemon, kaj ni nomu nin kun plena konvinkiĝo laborista esperantisto, kaj volonte estu nomataj tiel.

Kaj kiuj el la esperantistoj ĝenerale en Japanio ne estas laboristoj? Preskaŭ ĉiuj, escepte de tiuj, kiuj dungas aliulojn, kiuj ja estas nur malmultaj, ĉu ne?

Do, kuraĝe ni varbu ilin por SAT!

Lastatempe mi havis okazon tralegi la ruslingvan version de 'Kio estas SAT?', verkitan de Nikolao Gudskov, la SAT-peranto en Rusio. Miaopinie en ĝi troviĝas tre klara difino: kio estas laboristo. Kredante, ke tio definitive konvinkos vin, ke ankaŭ vi ĉiuj estas laboristoj, sekve laboristaj esperantistoj, mi prezentu al vi la koncernan alineon el ĝi en mia esperanta traduko: 'Por ke ne estu malĝustaj interpretoj, estas necese precizigi, ke sub laboristoj en SAT (kiel, cetere, en sindikatoj) kompreniĝas, ĉiuj, kiuj devas vendi sian korpan aŭ intelektan laboron por subteni sian vivon kaj la vivon de siaj familianoj, t.e. homoj de dunga laboro: ministo, tiel ankaŭ instruisto, fabriklaboristo, tiel ankaŭ inĝeniero. Nature, laborantoj-kunposedantoj de kooperativoj kaj privataj metiistoj vivantaj precipe je konto de sia laboro estas same rigardataj kiel laboristoj.'

Se ni ĉiuj havos la plenan konscion, ke ni estas laboristaj esperantistoj, ni povos kuraĝe varbi por SAT la esperantistojn, kiujn ni konas persone, tiam la nombro de SAT-anoj salte pligrandiĝos kaj multe kontribuos al la financa stabiliĝo de SAT.

Ĉe mi mem la hezitemo min nomi kaj esti nomata laborista esperantisto verŝajne, almenaŭ parte, devenas de tio, ke antaŭmilite mi estis ja proleta esperantisto. Ĉu tio ne estas stranga, eĉ mem-kontraŭdira, se proleta esperantisto estas sinonimo de laborista esperantisto? Vi certe demandos. Jes, vi pravas. Sed por tio ekzistis kialo siatempe.

En antaŭmilita Japanio pro forta influo de Sovet-Unio la teorio de proleta kulturo furoris. Unu el la pioniraj teoriistoj de tiu skolo estis AONO Suekiti (1890-1961). Laŭ li laboristoj ne havas spontane revolucian konscion sed ĝi devas esti celkonscie vekita ĉe ili, kaj al tio devas kontribui ankaŭ la proleta arto, inkluzive la literaturon. Tiel la proleta arto servas al politiko. Lia teorio do estis tre politika. Ironie, li mem poste forlasis politikon. Lia teorio tamen restis kiel bazo de la proleta arto, eĉ kulturo, kiu inkluzivas Esperanton.

En tiama socialista tendaro en Japanio, komunismo, kiu estis tie sinonimo de marksismo-leninismo, ĉiam pli fariĝis ĝia ĉefﬂuo. Do servi al politiko praktike signifis servi al la Japana Komunista Partio. Pro tio ĉiuj prolet-kulturaj organizoj, kiuj apartenis al KOPF (Federacio de Proletaj Kulturaj Organizoj) estis sub rekta gvido de JKP kaj servis al ĝi. Ankaŭ JPEU (Japana Prolet-Esperantista Unio) ne estis escepto.

JPEU fondiĝis en januaro 1931, sed mi mem estis ano de JPEA (Japana Proleta Esperanto-Asocio), ĝia antaŭaĵo, kiu fondiĝis en julio 1930, kvankam mi memlernis Esperanton kaj fariĝis esperantisto nur en aŭgusto de la sama jaro.

Kial kaj kiel do mi memlernis Esperanton kaj fariĝis esperantisto? Nu, ĝuste pro tio, ke mi estis jam komunisto. Kial do mi fariĝis komunisto? Certe pro tio, ke mi estis denaske duon-

orfo. Mia patro estis kuracisto, sed li mortis pro vundo, kiun li ricevis, kiam li provis mortigi sin. Tiam mi estis ankoraŭ en la utero de mia patrino, tiel ke mi naskiĝis duonorfo. Pro la duonorfeco mi devis multe suferi, tiel ke jam kiel knabo mi pensis, kial en la socio troviĝas malriĉuloj kaj riĉuloj; kaj kial tennoo denaske superas la ordinarajn popolanojn. Tial jam en la mezlernejo mi rifuzis kapkliniĝi, kiam la lernejestro kun afektita majesta voĉo laŭtlegis la tennoan mesaĝon pri edukado.

Antaŭmilite en Japanio eĉ mezlernejanoj devis ricevi militan trejnadon. Mi ĝin malŝatis. Foje okazis, ke en pluvtago la majoro, kiu estis sendita de la imperia armeo al mia mezlernejo, la mezlernejo de Itioka, Osako, aranĝis en la lernoĉambro simulan manovron. Tiam li demandis al la lernantoj, en tia aŭ tia kazo, 'kion vi faros?'. La vico venis al mi. Li demandis, kion mi faros, kiam mi kiel armeano frontas, ĉu marŝi aŭ retiriĝi. Li atendis de mi, ke mi respondos, ke mi marŝos, ĉar tiam en la japana armeo soldatoj estis disciplinitaj, ke ili ĉiam antaŭen marŝu, sed ke li neniam retiriĝu. Mi, ribelemulo, tamen aŭdacis respondi, ke mi retiriĝos! La lernoĉambro momente ekbruis sed tuj eksilentis. La vizaĝo de la majoro momente ekruĝiĝis kaj tuj ekpaliĝis, ĉar li tute ne atendis tian aŭdacan respondon de siaj lernantoj.

Dum la ekstra kaj eksterordinara kunsido de la instruistoj oni diskutis, eĉ disputis, kiel pritrakti tiun aferon. Savis min de eksigo de la mezlernejo ankoraŭ juna instruisto, kiu instruadis la japanan lingvon, kaj kiu krome respondecis al la klaso, al kiu mi apartenis. Lia nomo estis YOKOUTI Hideo, kaj li asertis, ke tio kontraŭas la principon de edukado. Li nome domaĝis min, ĉar li alte taksis mian literaturan talenton, jam tiam manifestiĝantan.

Ankaŭ okazis en la sama mezlernejo, ke mi unuafoje eksciis, ke ekzistas la lingvo nomata Esperanto.

En la komenco de la 5-a, t.e. la lasta, lernojaro kutime la lernantoj vojaĝis al sufiĉe malproksimaj regionoj. Tiujare la vojaĝo okazis tra Kanazavo, la antikva urbo apud la Japana Maro, al Tokio, kaj reen al Osako. La monsumo necesa por tiu vojaĝo estis 10 enoj. Mia patrino, kiu cetere reedziniĝis, ne disponis ĝin, aŭ domaĝis ĝin, mi ne scias. Ĉiuokaze mi ne povis bedaŭrinde partopreni tiun kolektivan vojaĝon.

La lernantoj, kiuj ne povis partopreni ĝin, aŭ pro malriĉeco aŭ pro malsanemo, estis kolektitaj en unu lernoĉambro por memlernado. Instruistoj, kiuj estis liberaj unu post la alia venis al nia lernoĉambro por supervidi nin. Inter ili troviĝis juna anglalingva instruisto, de kiu mi ĝis tiam neniam ricevis lecionon. Anstataŭ simple supervidi nin li instruis al ni, kio estas


Kurisu Kei

Esperanto.

Lia leciono pri Esperanto interesis min tiom, ke dum la somera libertempo mi tralegis la memlernilon de Esperanto, kiun mi prunteprenis de publika biblioteko. Esperanto ŝajnis al mi vere tiel facile ellernebla, sed ĉar ŝajnis al mi samtempe, ke en la memlernilo ne estis klare menciite, por kio oni ellernu ĝin, mi tiam ne komencis ĝin lerni, certe pro tio, ke jam tiam mi estis idee komunisto sub influo de la proleta literaturo, kies verkojn mi fascinite legadis.

Poste okazis, ke mi eksuferis ftizon en Tokio, kie mi laboris en malgranda fabriko de artaj ludiloj: marionetoj, manpupoj kaj lignaj bestoj. Tie mi devis ĉiutage enspiri acetonon. Eble tio kaŭzis, ke mi eksuferis ftizon. Ĉiuokaze la laborkondiĉoj en tiu fabriketo estis aĉaj. Krom tio kaŭzis tion al mi ankaŭ mia bohemiana vivmaniero, kiun mi imitis de miaj pliaĝaj laborkolegoj, kiuj estis plejparte ankaŭ nekonataj artistoj: belartistoj kaj poetoj.

La vivo tamen estas ironia, ĉar ĝuste tio, ke mi eksuferis ftizon, kaŭzis, ke mi fariĝis esperantisto!

Mia alia-patrina frato, ok jarojn pliaĝa ol mi, aranĝis, ke mi eniru en la tuberkulozan sanatorion de la urbo Kobeo, en kies biblioteko li laboris. Feliĉe mia ftizo estis ne nur ankoraŭ negrava sed ankaŭ benigna, tiel ke post nelonge mi jam povis dediĉi la tutan tagon al legado. Ĝuste tiam mi trovis en la aŭgusta numero 1930 de 'Senki' (Batalflago), la komunist-tendenca amaskleriga monatrevuo (ĝi estis fakte la laŭleĝa organo de JKP kontraŭleĝa) sufiĉe ampleksan artikolon titolitan 'Proletoj kaj Esperanto'. Ĝi fascinis min jam per sia titolo. Kaj mi trovis ĝian enhavon eĉ pli fascina, ĉar ĝi montras al mi, ke Esperanto utilas ankaŭ al la komunista movado per ebligo al la diverslandaj laboristoj de rekta kontakto por kunbatalo kontraŭ la komuna malamiko: la internacia financkapitalo.

'Jen ĝuste tio, kion mi vane serĉadis!' Mi ekkriis en mia menso. Kaj ĉi tio definitive decidis mian detiaman vivon, ĉar sen Esperanto ne estus pensebla mia detiama kaj ĝisnuna vivo.

En tiu artikolo estis anoncite, ke baldaŭ aperos sesvoluma 'Proleta Kurso de Esperanto'. Sed ĉar mi rapidis ellerni tiun miraklan lingvon Esperanto, mi aĉetis la popularan eldonon de la memlernilo de Esperanto, kiu troviĝis en librobutiko. Ĝia prezo estis 1 eno, tiel ke mi povis aĉeti ĝin el 5 enoj, kiuj ĉiumonate donacis al mi mia pliaĝa alia-patrina frato. Ĝi estis

nur la populara eldono de la memlernilo de Esperanto, kiun mi tralegis en la somera libertempo en 1927, kaj la enhavo estis tute sama. Ĝin verkis kune OSAKA Kenzi (1888-1969), la fondinto de Japana Esperanto-Instituto (JEI), kaj AKITA Uzyaku (1883-1962), dramverkisto kaj esperantisto, kiu fariĝis la prezidanto de JPEU, kiam ĝi fondiĝis en 1931.

Sendube pro tio, ke mi disponis multe da tempo kiel senpaga paciento en la tuberkuloza sanatorio, kaj krome pro tio, ke mi jam ellernis la anglan lingvon en la mezlernejo kaj ankaŭ ellernis la fundamenton de la franca en la 3-jara Fremdlingva Kolegio de Osako, kiun mi devis forlasi jam en la fino de la unua trimestro de la unua lernojaro, mia memlernado prosperis tiom rapide, ke post unu semajno mi jam povis tralegi esperantajn tekstojn, kompreneble kun vortaro esperanta-japana enmane. Kaj post tri monatoj mi jam povis korespondi esperante. Mia unua korespondanto estis Lembergskij (lian antaŭnomon mi jam ne memoras), juna laboristo en Sovet-Unio, kies adreson mi trovis en la artikolo 'Esperanto kaj proletoj'. La aŭtoro de tiu artikolo estis NISIT' Naomiti, sed evidente ĝi estis pseŭdonimo de iu eminenta proleta esperantisto. Efektive montriĝis post nelonge, ke post tiu pseŭdonimo kaŝiĝas NAKAGAKI Kozirô (1894-1971), lingva gvidanto de JPEU kune kun lia kamarado kaj intima amiko ÔSIMA Yosio (1905-1992).

Antaŭ nelonge montriĝis, ke Nakagaki jam en 1931 rekonis mian esperantistan talenton. Nome SIBATA Iwao, lektoro de la Industria (Teknologia) Universitato de Tiba, gubernio apud Tokio, trovis inter la manuskriptoj, kiun postlasis Nakagaki, ankaŭ ne publikigitan artikolon manskribitan en la japana lingvo, titolitan (en esperanta traduko) 'Súdruh Japano aŭ kamarado japano'. Súdruh estas la slovaka vorto, kiu egalas al kamarado. Temas pri mi, ĉar siatempe mi estis konata en Slovakio kiel kamarado japano, ĉar en 'Práca'(Laboro), la due granda taggazeto post 'Pravda'(Vero), la tagorgano de la Komunista Partio de Slovakio, ofte aperis ne nur miaj esperantaj tradukoj de japanaj proletaj noveloj en slovaka traduko de Imrich Zálupský, sed ankaŭ miaj korespondaĵoj pri tiama socipolitika situacio de Japanio, kvazaŭ mi estus reprezenta japano. En tiu artikolo li mencias i.a., ke iun tagon, kiam la 'Proleta Kurso de Esperanto' estis ankoraŭ eldonata, ĝia redakcio ricevis de unu el ĝiaj legantoj leteron skribitan tute en Esperanto. Ĝi estis bone skribita preskaŭ sen ia gramatika eraro. Tiu letero ege ĝojigis kaj kuraĝigis la verkantojn de tiu Kurso, inkluzive de Nakagaki, ĉar ili estis skeptikaj, ĉu japanaj proletoj kapablas ellerni Esperanton. La aŭtoro de tiu letero estis, laŭ Nakagaki, mi, kvankam mi tute ne memoras, ke mi skribis kaj sendis ion tian al la redakcio de la 'Proleta Kurso de Esperanto'.

Mi memoras tamen, ke mi skribis al JPEA, la antaŭulo de JPEU, leteron por kontakto. Ĝi devas esti skribita en Esperanto, ĉar mi tiam naive kredis, ke esperantisto nepre devas skribi al esperantisto esperante kaj ankaŭ paroli al esperantisto esperante. Tiurilate mi rememoras, ke mi estis surprizita, ke, kiam mi vizitis KAWASAKI Naokazu (1902-1991), la aŭtoron de bone konata komentari-libro 'Kie estas Amo, tie estas Dio'(de L. Tolstoj, esperantigita de M. Ŝidlovskaja) en lia loĝejo en Osako, li respondis al mia esperanta parolo japanlingve!

Kredeble mia letero adresita al JPEA estis transdonita al la redakcio de la 'Proleta Kurso de Esperanto', kies anoj estis Nakagaki kaj Ósima, ĝiaj lingvaj gvidantoj.

Kompreneble tiam mi pri tio tute ne sciis, sed estas certe, ke rekomendo de Nakagaki kontribuis al tio, ke en 1932 mi estis elektita de la estraro de JPEU kiel la estro de la Japana PEK-Centro. En tiu senco Nakagaki, kiu rekonis mian esperantan talenton, estas mia bonfaranto, same kiel Yokouti Hideo, kiu tiel frue rekonis mian literaturan talenton.

Ĉi tie mi devas iom klarigi, kio estas PEK. Ĝi estis nomata komence 'Proleta Esperanta Korespondanto' laŭ la modelo de Labkor (Laborista Korespondanto) kaj Selkor (Kamparana korespondanto) en Sovet-Unio, sed post nelonge oni ĝin komprenis kiel mallongigon de 'Proleta Esperanto-Korespondado'.

PEK estis parto de IPE (Internacio de Proleta Esperantistaro), tiel ke ĝi estis sekcio de IPE-Centro en Berlino. La celo de PEK estis, kiel mi bonege scikonas kiel PEK-aktivulo jam en Sakai, kien mi transloĝiĝis el Kobeo post elsanatoriiĝo aŭtune 1930, provizadi la komunistan gazetaron per peresperantaj korespondaĵoj pri la vivo kaj bataloj de diverslandaj laboristoj kaj kamparanoj, kaj tiel per konkretaj ekzemploj demonstri, ke Esperanto estas utila batalilo por la internacia komunista movado.

Sed laŭ Lanti ĝia celo estis alia. Li nome diras en sia cetere bonega prelego 'Absolutismo', kiun li faris en la kongreso de FLE (Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo) en Antverpeno en 1934 jene:

'La starigo de Proleta Esperanta Korespondanto (PEK) havis en la okuloj de la gvidantoj de SEU (Sovet-Respulikara Esperantista Unio, kiu estis la sekcio de IPE en Sovet-Unio - noto de Kurisu) ĉefe kiel celon faciligi la kontroladon de la korespondado.' (p.16)

Laŭ mi la opinio de Lanti pri PEK estas netrafa. Ŝajnas al mi eĉ, ke Lanti havis ian persekut-manion koncerne PEK-on.

Mi devas ĉi tie klarigi ankaŭ, kio estas IPE. La komunista opozicio de SAT, gvidita de SEU, avidis transpreni la hegemonion de SAT en siajn manojn. Tamen ĝia provo tiurilata ne sukcesis. Do okaze de la 11-a kongreso de SAT en Amsterdamo en 1931, kiam ĝiaj reprezentantoj ne povis venki en la voĉdonado, ili forlasis la kongreson, kaj okazigis konferencon de revoluciaj, efektive komunistaj, esperantistoj kaj fondis la unuigan komitaton, kiu baldaŭ fariĝis IPE. Kaj JPEU estis unu el ĝiaj plej fortaj kolonoj, kiel ĝia japana sekcio.

Kaj kiel estis SAT en Japanio tiam?

En 1927 fondiĝis Kasiwagi-Rondo, nomata tiel, ĉar ĝia sidejo troviĝis ĉe la loĝejo de HIGA Syuntyô (1993-1977) en Kasiwagi, parto de Tokio. Kvankam mi ne havas ĉe mi tiaman jarlibron de SAT, kredeble preskaŭ ĉiuj ĝiaj anoj estis SAT-anoj. Ili estis krom Higa, Nakagaki Kozirô, Ôsima Yosio, NAGAHAMA Torazirô (1902- 1974) kaj KIYOMI Rokurô (1886-?), konata kiel la japaniginto de 'Marta' de Eliza Orzeszkowa, esperantigita de Zamenhof el ĝia pola originalo.

Ili ĉiuj, escepte de Kiyomi, komunistiĝis kaj preskaŭ kolektive aliĝis al JPEA, poste al JPEU. Nakagaki, Ôsima kaj Nagahama estis eĉ iliaj lingvaj gvidantoj.

Tiel SAT perdis sian bazon en Japanio, ĉar Kasiwagi-Rondo estis ĝia plej granda grupo en Japanio. Nakagaki, Ôsima kaj Nagahama estis la gvidantoj de la esperanta kurso en la kadro de la Somera Fremdlingva Universitato, kiun aranĝis la Instituto por Internacia Kulturo, fondita en 1928, kaj alinomita

la Instituto por Proleta Kulturo en 1929. La lernintoj de tiu esperanto-kurso kaj la lernintoj de la aliaj esperanto-kursoj aranĝitaj de la 'Studgrupo pri proleta esperanto' en la supre menciita Instituto, fariĝis poste kiel organiza kerno de JPEA, poste de JPEU. Ili ĉiuj estis rapide bakitaj esperantistoj, pliĝuste duonesperantistoj kaj restis tiaj ĝis ili ĉiuj arestiĝis kaj enprizoniĝis, escepte kelkajn kiel TOMITA Tomu, KINOSITA Tadazô kaj SAKAI Matutarô, ĉar ili ne havis sufiĉan tempon por ellerni Esperanton.

La fakto, ke JPEU lanĉis la kampanjon 'Estu bona esperantisto', montras, ke preskaŭ ĉiuj anoj de JPEU estis duonbakitaj esperantistoj, komencantaj esperantistoj. Pliĝuste ili ankoraŭ ne estis esperantistoj en la vera senco de ĉi tiu vorto.

Tiom pli elstaris inter ili mi, kiu alvenis en Tokion el Sakai por eskapi areston fare de Tokkô, la japana sekretpolico.

Menciindas, ke la 'Proleta Kurso de Esperanto' estis eldonita ne de esperanta organizo sed de komerca eldonejo nomata Tettô Syoin (Eldonejo Fera Turo), ĉar tiam ekfuroris proleta Esperanto. Efektive la 'Proleta Kurso de Esperanto' bone vendiĝis. Mi mem estis unu el ĝiaj legantoj. Mia pliaĝa alia-patrina frato bonvolis ankaŭ aboni ĝin por mi. Li bonvolis ankaŭ aĉeti por mi 'Plenan Vortaron de Esperanto', eldonitan de SAT ĝuste en la jaro, kiam mi eklernis Esperanton, nome en 1930. Sendube PV multe kontribuis al tio, ke mi en mirinde mallonga tempo fariĝis 'bona esperantisto', ĉar ĝi kutimigis min, jam de komenco de mia esperantisteco, rekte pensi kaj skribi en Esperanto.

Mi do varme rekomendas al vi ĉiuj aĉeti almenaŭ unu ekzempleron de la nova 'Plena Ilustrita Vortaro', eldonitan ĝuste en ĉi tiu jaro de SAT.

Tiusence mia pliaĝa alia-patrina frato, kies nomo estas DATE Suguru estas mia bonfaranto.

Ankaŭ atenta studo de 'Kie estas Amo, tie estas Dio', la supre menciita komentari-libro, multe kontribuis al tio, ke mi povis fariĝi 'bona esperantisto'. De ĝi mi lernis, kiel atente kaj analize legi esperantajn tekstojn. Ankaŭ ĝi estis eldonita ĝuste en 1930, la jaro de mia esperantistiĝo.

Por ni japanoj, kies lingvo multe diferencas strukture de hindeŭropaj lingvoj, kies simpligita kaj raciigita formo estas Esperanto, eĉ ellerni Esperanton ne estas facile. Pro tio necesas tia komentari-libro. Por eŭropanoj kaj viceŭropanoj (usonanoj, kanadanoj, aŭstralianoj, novzelandanoj, kaj anoj de la Latin-Ameriko) do Esperanto estas multe pli facile ellernebla. Sed ĝuste tie troviĝas por ili falkavo, ĉar pro troa facileco de Esperanto, multaj el ili ne studas ĝin ĝisfunde. Pro tio troveblas en multaj esperantaj libroj, precipe tradukaj, simplaj eraroj. Ekzemple, ankaŭ en la esperanta traduko de '7000 tagoj en Siberio' de Karlo Ŝtajner, esperantigita de Kreŝimir Barkoviĉ, la ĝenerala sekretario de la Plenum-Komitato de SAT, bedaŭrinde troviĝas kelkaj simplaj eraroj, kiel ekzemple:

ĉefaj krimuloj estis tie deportitaj (anstataŭ tien, p.59);

alveninte en la kuireja korto (anstataŭ kuirejan korton, p.247);

ni ĉiuj estis terurigitaj (ansataŭ terurítaj, p.310);

Li asertis ke finos la Stalina teroro (anstataŭ finiĝos, p.354);

li ĉesis la strikadon (anstataŭ ĉesigis, p.138);

La NKVD-bando saltis sur min kaj katenigis min per ĉemizo por frenezuloj (anstataŭ katenis, p.29);

post du horoj vekigis min malsato (anstataŭ vekis, p.88);

Ankaŭ en la formo 'ĉirkaŭ je', kiu estas kelkfoje uzata, kiel ekzemple 'Ĉirkaŭ je la noktomezo' (p.310), 'je' estas pleonasma?

Tiaj simplaj eraroj estas facile eviteblaj, se ekzistas ankaŭ en eŭropaj kaj viceŭropaj lingvoj komentari-libro kiel 'Kie estas Amo, tie estas Dio'. Sed tio estus ne realigebla, ĉar tia libro povus trovi nur malmulte da aĉetantoj simple pro tio, ke Esperanto estas por ili multe pli facile ellernebla ol por ni neeŭropanoj. Kiel do solvi ĉi tiun problemon? Miaopinie ĝi estas facile solvebla, se ĉiuj esperantaj libroj estus lingve kontrolitaj de kompetentuloj.

SAT havas sian Literaturan Komitaton, kies anoj siatempe lingve kontrolis esperantajn librojn eldonitajn ne nur de SAT mem sed ankaŭ de aliaj eldonejoj aŭ ilia komisio.

Sed de kiam la Literatura Komitato de SAT ĉesis funkcii?

Mi persone havas amaran memoron pri ĝi. Mi jam ne memoras precize en kiu jaro, sed kiam WASEDA Yutaka ankoraŭ vivis kaj agadis kiel ano de la Ĝenerala Konsilantaro de SAT kaj la peranto de SAT en Japanio, li demandis al mi letere, ĉu mi aprobas lian intencon rekomendi min al la SAT-Centro en Parizo kiel anon de la Literatura Komitato. Mi havis nenion kontraŭ tio, tiel ke mi jese respondis al li. Sed la decido de la SAT-Centro min surprizis, ĉar ĝi estis: Kurisu estas tro por UEA, sekve ne taŭgas kiel ano de la Literatura Komitato. Kia decido!

Mi mem neniam sentis min 'tro por UEA'. Verŝajne la tiama SAT-Centro rigardis min 'tro por UEA' pro tio, ke mia sufiĉe ampleksa artikolo, per kiu mi kritikis la staton de Esperanto en Ĉinio, estis publikigita en la januara numero 1974 de 'Esperanto', dum mi ĝis tiam nenion kontribuis al 'Sennaciulo', nek al 'Sennacieca Revuo'. Tamen tiun artikolon mi ne verkis kaj sendis al la redakcio de 'Esperanto' propralniciate, sed nur laŭ instigo de Ulrich Lins, la aŭtoro de 'La danĝera lingvo', ĉar tiutempe mi estis plene okupita per japanigo de literaturaj verkoj el Ĉeĥoslovakio, tiel ke mi ne havis tempon ion verki en Esperanto.

Mi disrompis la glacion nur en 1995, kiam mi per mia esperanta eseo 'Kiel Esperanto solvis enigmojn de 'Riporto'' ricevis la Premion Luigi Minnaja en la branĉo Eseo de la Belartaj Konkursoj de UEA. La daŭrigo de tiu eseo titolita 'Ankoraŭfoje pri 'Riporto' kaj ĝia aŭtoro' estis publikigita en 'Sennacieca Revuo' de 1996. De tiam en ĉiu numero de SR publikigiĝis miaj eseoj. Sed UEA ne kondamnis min pro tio 'tro por SAT'.

Per rifuzo elekti min kiel anon de la Literatura Komitato, SAT perfidis sian sektemon. Sed la tempo ŝanĝiĝis tiom, ke SAT-ano Kep Enderby el Aŭstralio kaj Renato Corsetti el Italio fariĝis eĉ la prezidanto de UEA sen ia kondamno, kritiko aŭ riproĉo!

Mi opinias, ke estas tempo por refunkciigi la Literaturan Komitaton, por ke neniam plu aperu en SAT-eldonaĵoj simplaj eraroj, kiajn mi citis supre menciante, kiel ekzemplon, la esperantan tradukon de '7000 tagoj en Siberio'.

Tamen ne miskomprenu, ke mi pro tio malalte taksas ĝin, male mi tre alte ĝin taksas, kaj opinias, ke ĝia ĉi-jara honoriĝo per la prestiĝa OSIEK-Premio estas vere salutinda. Estas rusa proverbo 'Eĉ la suno havas makulojn'. Jes, por la esperanta traduko de '7000 tagoj en Siberio' la cititaj simplaj eraroj estas nur tiaj makuloj.

Mi mem siatempe ĝin venigis rekte de SAT-Centro kaj tralegis. Post ĝia honoriĝo per la OSIEK-Premio mi ne nur denove tralegis sed eĉ donacis ĝin al miaj tri eksterlandaj amikoj, kiuj ne

povas aĉeti ĝin. Nome al Jaroslav Zák en Ĉeĥio kaj Shi Chengtai kaj Mao Zifu en Ĉinio. Mi kredas, ke tiamaniere mi eĉ iomete kontribuis al financa stabiliĝo de SAT.

Mi do varme rekomendas al vi, se vi ankoraŭ ne faris tion, aĉeti almenaŭ unu ekzempleron de tiu librego. Tiel farante, vi ne nur kontribuos al financa stabiliĝo de SAT sed ankaŭ multon lernos el ĝi lingve kaj idee.

Mi varme rekomendas al vi ankaŭ, se vi ankoraŭ ne faris tion, aĉeti kaj atente studi la supre menciitan komentari-libron 'Kie estas Amo, tie estas Dio', ĉar per tio via esperanto-kapablo plurobliĝos. Feliĉe ĝi estis triafoje reeldonita de JEI.



Mi mem unuafoje ĝin trastudis en 1930, kaj duafoje en 1937 en prizono. Antaŭ kelkaj tagoj mi ĝin aĉetis triafoje simple pro tio, ke mi bezonis informiĝi pri la jaroj de naskiĝo kaj morto de la aŭtoro por verki ĉi tiun tekston.

Ankaŭ ĝi havas siajn makulojn. Ekzemple, li elmetas la problemon, 'Ĉu en Esperanto troviĝas t.n. idiotismoj (japane zyukugo) kun 'en kompanio' kiel ekzemplo?' Estas menciate, ke 'kompanio' estas kaisya japanlingve, t.e. komerca aŭ industria firmao. Mi nun ne havas PV ĉemane, sed jam en la malnova PIV troviĝas jenaj ekzemploj:

'Kun kia kanajlaro mi devas nun esti en kompanio' (Fabeloj de Andersen, vol.2, p.33). Kaj 'en kompanio eĉ morto faciliĝas' (Proverbaro Esperanta 216).

Tio signifas, ke 'kompanio' havas ankaŭ alian signifon ol komerca aŭ industria firmao, nome laŭ la nova PIV: kunestado, akompanado. Do 'en kompanio' ne estas idiotismo.

Kaj pri la demando 'Ĉu en Esperanto troviĝas idiotismoj,' Zamenhof klare respondas en sia artikolo 'pri la Esperanta stilo', origine publikigita en la decembra numero 1906 de 'La Revuo', represita poste en 'Lingvaj Respondoj' jene:

'Ankaŭ en Esperanto troviĝas diversaj (ne multaj) idiotismoj, kaj tute malprave kelkaj Esperantistoj ilin kontraŭbatalas, ĉar lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estas lingvo senviva kaj tro peza; sed kvankam kelkaj el la Esperantaj idiotismoj estas prenitaj ankaŭ el la lingvoj slavaj (dum aliaj estas prenitaj el aliaj lingvoj), ili tamen estas ne slavismoj, sed Esperantismoj, ĉar ili fariĝis parto de la lingvo.'

Kiam Kawasaki Naokazu verkadis tiun komentari-libron ankoraŭ ne ekzistis PIV, sed 'Fabeloj de Andersen', 'Proverbaro Esperanta' kaj 'Lingvaj Respondoj' estis jam facile akireblaj. Estas do eĉ strange, ke erudiciulo kiel li ne sciis la ekziston de la ekzemploj supre cititaj.

Sed tia estas la vivo. En la mondo ne ekzistas afero plene perfekta, nek persono plene perfekta. Do tio neniel malpliigas la valoron de tiu komentari-libro same kiel '7000 tagoj en Siberio'.

Mi mem multon lernis eĉ el esperantaj libroj, kiuj havas tiajn simplajn erarojn. Ekzemple, verkante ĉi tiun tekston, mi relegadis, kiam mi kuŝis ripozante, la libron 'Tra lando de Indianoj' de Tibor Sekelj, esperantigita el la hispana de Ernesto Sonnenfeld (Malö, 1970). Malgraŭ tio, ke ĝin reviziis la aŭtoro, kiel presite en la titolpaĝo, ankaŭ ĝi havas simplajn erarojn, ekzemple: 'donintaj siajn vivojn por kaŭzo, kiun ili konsideris justigita (anstataŭ afero, p.66), kaj li vidis spektaklon terurigan (anstataŭ teruran, p.66).

Sed aliflanke mi trovis en ĝi interesan esprimon: 'Li laboras por sia propra konto' (p.27). Nu, en la komenco de ĉi tiu teksto mi esperantigis el la ruslingva versio de 'Kio estas SAT?' , i.a. jenon: 'privataj metiistoj vivantaj precipe je konto de sia laboro estas same rigardataj kiel laboristoj.' Mi konsultis la novan PIV kaj trovis jenan ekzemplon: 'komenci je sia propra konto (estante la respondeca mastro)' , tamen mi ne estis plene certa. Sed trovinte en la libro de Sekelj jenan frazon: 'Li laboras por sia propra konto,' mi trankviliĝis.

Tiel legante diversajn librojn, mi ĉiam ion lernas, eĉ se ili enhavas simplajn erarojn, ĉar ni povas lerni eĉ de eraroj de aliuloj.

Mi jam menciis la sektemon, kiun SAT siatempe suferis. Sed ĉi tie mi devas mencii, ke ankaŭ UEA suferas nun sektemon. Nome lastatempe mi havis okazon tralegi poreksteran informilon, kiun UEA aldonis la 23-an de aprilo 2002 sub titolo 'Ĝisdate pri Esperanto' . Je miaj granda miro kaj bedaŭro, en ĝi troviĝas nenia mencio pri SAT! Malgraŭ ke SAT grave kontribuis al la progreso de Esperanto per eldonado de Plena Vortaro de Esperanto en 1930, de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto en 1970, de ĝia Suplemento en 1987 (en tiu tempopunkto la nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto ankoraŭ ne estis eldonita). Jam pro ĉi tiuj faktoj SAT ne estas ignorebla en informado pri Esperanto.

Sektemo estas kondamninda en ĉiu okazo. Do for sektemon ne nur de SAT kaj UEA, sed entute de la tutmonda Esperantujo!

Mi jam rakontis en mia eseo 'Historio pri 'Krabŝipo' , publikigita en SR (2000-2001), kial mi ne sendis al SAT-Centro pliajn ĉapitrojn de mia esperanta traduko el 'Krabŝipo', la ĉefverko de KOBAYASI Takizi (1903-1933), laŭ konsilo de Assen Grigorov (M. Ljubin), la ĉefredaktoro de 'Internacia Kulturo', la komunisttendenca esperanta revuo, eldonata en Sofio, Bulgario, ke SAT estas kontraŭrevolucia organizo! Mi jam ne memoras precize, kiam tio okazis, sed estas certe, ke en la unua duono de la 50-aj jaroj. Tio montras, ke tiam mi mem ankoraŭ ne liberiĝis de la antaŭjuĝo, ke SAT estas kontraŭrevolucia organizo.

Tio kontraŭas al tio, ke jam tiam mi estis ano de SAT. Kial resti en SAT, se

oni rigardas ĝin kontraŭrevolucia organizo? Sed homoj estas animaloj kun kontraŭdiroj. Kaj mi ne estas escepto. Almenaŭ ĝis marto 1952, mi ankoraŭ ne estis libera de komunismaj dogmoj, ĉar mi mencias en mia sufiĉe ampleksa postparolo al mia japana traduko de 'Muta barikado', novelaro de ĉeĥa komunista verkisto Jan Drda, farita el ĝia esperanta traduko, ĉar tiam mi ankoraŭ ne ellernis la ĉeĥan, ke la liberigo de Prago estis farita de la sovet-armeo la 9-an de majo 1945, dum ĝin liberigis jam la 8-an de majo pragaj civitanoj mem, kiuj armite ekribelis kontraŭ la nazigermanaj okupaciintoj.

Sed jam mia artikolo 'Historio de ĉeĥa instruisto', publikigita en la aŭgusta numero 1953 de 'Kyôsi no tomo' (Amiko de instruistoj), montras, ke mi komencis liberiĝi de komunismaj dogmoj.

En 'Muta barikado' troviĝas novelo titolita 'Plialta principo'. Ĉi tio estas la kromnomo, kiun la lernantoj de provinca gimnazio donis al maljuneta instruisto, kiu instruas latinajn klasikaĵojn, ĉar li laŭde diradis, ke la herooj de tiuj klasikaĵoj havis plialtan principon. Okazis iun tagon, ke tri el liaj lernantoj arestiĝis de Gestapo, la nazigermana sekretpolico, pro tio, ke tiuj tri gimnazianoj eldiris ĉe naĝejo, ke ili aprobas la atencmortigon de Reinhard Heydrich, la aganta protektoro de Ĉeĥio, okupaciita de Nazi-Germanio, fare de du paraŝutistoj (unu estis ĉeĥo, la alia slovako) senditaj de la ĉeĥoslovaka registaro en emigracio en Londono. Tiuj tri gimnazianoj estis tuj mortpafitaj. En la kunsido de la instruistoj al li estis altrudita la tasko deklari antaŭ la klaso, al kiuj apartenis tiuj tri, ke li ne aprobas tiun agon. Sed li anstataŭe aŭdacis deklari antaŭ la klaso, ke ankaŭ li aprobas la atencmortigon de Heydrich. Li mem ja estis fidela al la 'plialta principo' , kiun li ĉiam emfazis. La novelo finiĝas per la vortoj, ke ĉiuj klasanoj ekstaris por esprimi sian respekton al sia kuraĝa instruisto. Kortuŝa historio, ĉu ne? Kortuŝa kaj bela historio efektive. Sed jam tiam mi ekhavis ioman dubon, ĉu neniu el la klasanoj denuncis lin? Sed mi tion ankoraŭ ne konsciis.

Sed post kiam mi japanigis ankaŭ el Esperanto la daŭrigon de tiu novelo, titolitan 'Ĝoja renkontiĝo', kaj publikigis en monata revuo 'Sin Nihon Bungaku' (Nova Japana Literaturo), mi ekhavis klaran dubon pri ĝia realeco. Temis pri 'ĝoja renkontiĝo' de tiu instruisto 'Plialta principo' kun unu el liaj lernantoj, kiu fariĝis partizano. Ĉi tiu malsuprenvenis el la monto, kie troviĝas la bazo de la partizana taĉmento, al kiu li apartenis, sekrete en la provincan urbon kun iu misio. Nature ambaŭ tre ĝojas. La lernanto aranĝas sekretan rendevuon inter sia iama instruisto kaj rusa politika komisaro de la partizana taĉmento. Ili diskutas pri filozofio. La instruisto ankoraŭ estas idealisto, dum la politika komisaro estas dialektika materialisto. Post longa polemikado la instruisto rekonas la pravecon de dialektika materialismo, kaj post kiam finiĝis la milito kaj kun tio la okupacio, li aliĝas al la KP de Ĉeĥoslovakio.

Al mi ŝajnas, ke lia transformiĝo estas tro abrupta kaj nenatura. Kaj tion mi klare eldiris en la supre nomita artikolo.

En tiu postparolo mi menciis ankaŭ, ke neniu el la ĉeĥa popolo denuncis la atencmortigintojn malgraŭ grandsuma premio, kiun promesis ne nur la okupaciaj aŭtoritatoj sed ankaŭ la protektorata registaro de la ĉeĥoj, sed efektive unu el la paraŝutistoj nomata Ĉurda denuncis ilin. Ĉe mi tio okazis pro manko de materialo, ĉar tiam mi ankoraŭ ne scipovis ĉeĥe, sed estas vere ankaŭ, ke tion kaŭzis mia blinda kredo, ke io tia ne povas okazi.



Do almenaŭ ĝis majo 1952, blindiĝinte de komunistaj dogmoj, mi ne kapablis rekte rigardi en la realon.

Nu, en la statuto de SAT troviĝas jena paragrafo:

'SAT, ne estante partipolitika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj k toleremaj rilate al la politikaj k filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj

k sindikatmovadoj; per komparo de faktoj k ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.'

Pro malordiĝo okaze de transloĝiĝo nun mi disponas nur la Jarlibron de SAT eldonitan en 1949. Kompreneble mi havas ĉe mi la Adresaron de SAT por la jaroj 2001-2002, sed ĝi ne havas la statuton. Mi ne scias, de kiam SAT ĉesis eldoni la Jarlibron kaj eldonas nur la Adresaron sen la Statuto. Sed mi kredas, ke ĉi tiu paragrafo restas ankoraŭ nun senŝanĝa en la Statuto, ĉar miaopinie ĝi estas ja ĝia kerno.

Ke ĉi tiu paragrafo estas prava, mi eksciis laŭ miaj propraj spertoj. Okazis iam en 1949 aŭ en la unuaj monatoj de 1950 (ĉar mi transloĝiĝis de Osako al Tokio fine de marto 1950), ke mi ricevis de Ralph Bonesper en Novjorko solidarec-pakaĵon el uzitaj tolaĵoj, vestoj kaj ŝuoj por disdoni inter la laboristaj esperantistoj en Osako. Mi ne scias, kial li ĝin sendis ĝuste al mi. Supozeble pro tio, ke mi jam havis rektan kontakton kun SAT-Centro en Parizo. Ekzemple, porpaca alvoko de la studentoj de Zinbun Gakuen (Humanisma Kolegio) de Kioto, al kiu mi unuafoje ĉiusemajne instruis Esperanton, estis publikigita en 'Sennaciulo' en mia esperanta traduko (ĉar ili mem ankoraŭ ne scipovis Esperanton, por ke ili memstare verku ĝin en Esperanto). La reeĥo estis grandega certe pro tio, ke tiam voĉo el Japanio ankoraŭ preskaŭ ne aŭdeblis. Kredeble pro tio, ke SAT-Centro donis mian adreson al Bonesper, kiu tiam prizorgadis la Solidarec- Servon de SAT.

Tiel komenciĝis mia korespondado kun li. Kiom mi memoras, li estis antaŭmilite aktivulo de IPE en Novjorko, ĉar mi vidis foton de la grupo de la laboristaj esperantistoj gvidataj de li en 'Internaciisto' , la organo de IPE. Krom tio, mi vidis lian nomon inter la mondonacintoj, kiuj finance ebligis al EKRELO (Eldon-Kooperativo por Revolucia Literaturo), la eldonejo de IPE, sed efektive de SEU, eldoni la libron '133 tagoj de Sovet-Hungario' . Mi eĉ supozis, ke li fuĝis el Hungario en Usonon post disfalo de Sovet-Hungario en 1919.

Laŭ la Jarlibro de SAT 1949, lia matrikulo estis 29, do tre malnova. Pro tio mi supozis, ke li aliĝis SAT-on tuj ĉe ĝia fondiĝo en 1921, sed ke li aliĝis IPE-n okaze de la skismo en 1931, kaj post disfalo de IPE denove aliĝis SAT-on. Mi do tamen kredis, ke li restas ankoraŭ komunisto, almenaŭ amiko de komunismo. Jen kial mi senpripense letere konsilis al li, ke, ĉar li estas hungaro, ĉu ne estus bone reveni en Hungarion por partopreni en la socialisma konstruado, okazanta tie sub la KP de Hungario laŭ la japana komunista gazetaro.

Do imagu al vi la surpriziĝon, konsterniĝon, eĉ ŝokon, kiam mi ricevis lian respondon. Kontraŭ mia atendo li kategorie rifuzis mian konsilon. Jen kion li skribis al mi responde: 'Kian sensencaĵon vi skribis al mi! Reveni el Usono en Hungarion! Ĉu vi ne scias, en kia situacio nun troviĝas Hungario? Regas tie teroro, ĉar ĉiu civitano tremas kun timo, ke la sekreta polico frapus lian pordon meznokte!'

Jen fulmotondro! Mi ne povis dum kelka tempo respondi al li, ĉar mi ne sciis, kiel tion fari!

Tiam en mia kapo reviviĝis memoro pri sekreta mesaĝo, kiun mi ricevis de maljuna latva esperantisto loĝanta en Sovet-Unio, iam en 1934. En junio 1933 mi estis liberigita post ĉirkaŭ 4-monata vivo en policaj arestejoj (Tokkô, la japana sekret-polico tenis min sinsekve en tri policaj arestejoj) en Tokio kaj revenis en Osakon por prizorgi mian resaniĝon. Utiligante tiun tempon, mi ekdeziris ellerni la rusan, kiu por mi tiam estis la lingvo de revolucio. Pensante, ke korespondado kun esperantistoj en Sovet-Unio utilos al tiu celo, mi skribis al la SEU-Centro en Moskvo leteron, per kiu mi petis, ke ĝi rekomendu al mi konvenajn korespondantojn. Verŝajne tiu letero mia estis publikigita en la organo de SEU, kvankam mi neniam ricevis tiun numeron, ĉar post nelonge mi ricevis kelkajn leterojn el Sovet-Unio, kaj komenciĝis mia korespondado kun iliaj aŭtoroj.

Sed iun tagon, mi kredas, ke tio okazis jam en 1934, mi tute ne atendite ricevis el Sovet-Unuio libreton pakitan en malbonkvalita papero. Mi supozis, ke temas pri ia ruslingva libreto, kiu utilos al mia memlernado de la rusa, sed montriĝis, ke ĝi estas franclingva memlernilo de Esperanto, nome 'Langue Internationale Espéranto' , Manuel complet avec double dictionaire, traduit sur l'ouvrage russe du Dr. L. Zamenhof, par L. de Beaufront. Troisième édition, Paris 1897.' (Lingvo Internacia 'Esperanto[a], Manlibro kompleta kun duobla vortaro, tradukita surbaze de la verko ruslingva de D-ro L. Zamenhof fare de L. de Beanfront. Tria eldono, Parizo 1897.). Ĝi do estas raraĵo tre valora, ĉar ĝi estas eldonita en 1897, nur dek jarojn post la eldoniĝo de la 'Unua Libro' . Sed tiam mi ankoraŭ ne sciis tion kaj pensis nur: kial oni sendis al mi tian malnovan memlernilon de Esperanto, superfluan kaj senutilan, ĉar mi jam sufiĉe bone scipovis Esperanton? Sed mi malfermis ĝin kaj jen trovis, ke interne de ĝi estas skribita io per krajono maldense, apenaŭ legeble. Momente mi eksentis, ke temas pri ia malbona mesaĝo, ĉar tiamaniere sendita el Sovet-Unio, kiu estas laŭ mia tiama imago paradizo sur la tero. Verŝajne mi efektive skribis ion tian en mia letero al la SEU-Centro, ĉar tiu sekreta mesaĝo komenciĝis jene:

'Kara kamarado, vi kredas, ke Sovet-Unio estas paradizo sur la tero. Sed vi vane iluzias, ĉar en Sovet-Unio laboristoj vivas eĉ pli mizere ol laboristoj en kapitalistaj landoj. Niaj gvidantoj jam delonge perfidis la revolucion. Mi mem siatempe batalis por la revolucio kiel ano de la Ruĝa Gvardio kun armilo enmane. Sed mi trompiĝis kaj ne scias kion fari. Kredu al mi, ĉar ĉi tiuj estas la vortoj, kiujn mi skribis per mia propra sango!'

Mi ektremis legante ĉi tiujn liniojn, ĉar tio devas esti sekreta mesaĝo de unu el la kontraŭrevoluciuloj en Sovet-Unio, pri kiuj mi ofte legis en la japana komunista gazetaro, por forlogi min de la revolucia vojo. Mi tamen ne neniigis ĝin, nek denuncis ĝian aŭtoron al la SEU-Centro, kiel faris kelkaj tiaokaze laŭ Lanti ('Absolutismo', p.16), kaj formetis ĝin sur la fundon de unu el miaj librobretaroj, kvazaŭ ĝi estus io abomeninda.

Mi bedaŭrinde ne memoras lian nomon; nur iel restas ĉe mi pri li nebula memoro, ke li estis latvo. Li devis esti jam tiam sufiĉe maljuna, ĉar li posedis tiun malnovan memlernilon eldonitan en Francio en 1897. Krom ĝi li sendis al mi ĉiujn numerojn 1896 de 'Lingvo Internacia', la revuo eldonita en Malmö, Svedio, anstataŭ 'La Esperantisto', la unua Esperanto-revuo entute, eldonita en Nurenbergo, Germanio, pro tio, ke oni malpermesis ĝian importon en Rusion pro artikolo de L. Tolstoj publikigita en ĝi. Ankaŭ tiu jarkolekto de 'Lingvo Internacia' estas raraĵo tre valora jam pro tio, ke en ĝia duobla numero junia-julia estas publikigita la bone konata letero de Zamenhof adresita al Nikolao Borovko nun konata kiel la 'Letero pri la deveno de Esperanto' . Ĝi estas nepre leginda dokumento por

scii, kial kaj kiel naskiĝis la ideo de kreo de lingvo internacia en la kapo de knabo Zamenhof, kune kun lia letero de la 21-a de februaro 1905, adresita al Alfred Michaux, la organizinto de la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905 en Bulonjo ĉe Maro, en kiu li detale rakontas, kiel li devis suferi pro tio, ke li kreis Esperanton.

Ĉi tiu letero troviĝas en la unua volumo de la duvoluma 'Leteroj de Zamenhof', eldonita en 1948 de SAT. Cetere en tiu volumo troviĝas kiel Apendico ankaŭ lia letero pri la deveno de Esperanto, supre menciita. Mi varme rekomendas, ke vi nepre tralegu ambaŭ leterojn, iel akirinte ilin.

Mi timas, ke ankaŭ tiu latva maljuna esperantisto pereis dum la Granda Purigo kontraŭ Esperanto, en 1937-1938, per kiu Stalin ekstermis la esperanto-movadon en Sovet-Unio.

Nu, tiu libreto kun la sekreta mesaĝo estis formetita kaj preskaŭ forgesita. Sed ĝi ne vane kuŝis sur la fundo de unu el miaj librobretaroj, ĉar multajn jarojn poste, jam post la milito, tiuj linioj, kiujn la maljuna latva esperantisto skribis al mi per sia propra sango tute neatendite reviviĝis en mia kapo lige kun la letero de Bonesper.

Mi nome ekpensis, ke ankaŭ tio, pri kio li avertis min eĉ riskante sian propran vivon, por ke mi liberiĝu de la ĥimero, ke Sovet-Unio estas paradizo sur la tero, devas esti ja vero! Mi do samtempe ekkredis, ke ankaŭ tio, kion Bonesper skribis al mi pri Hungario devas ja esti vero!

Do por mi ne nur Bonesper, sed ankaŭ tiu latva maljuna esperantisto estas bonfarantoj, kiujn mi neniel povas forgesi.

Sekve mi konvinkiĝis laŭ miaj propraj spertoj, ke tio, kio estas menciita en la Statuto de SAT, estas prava, ĉar mi vere liberiĝis per libera diskutado (kun Bonesper) de la komunisma dogmo, per kiu mi estis katenita dum tiom da jaroj.

Do, paradokse mi, kiu eklernis Esperanton ĝuste pro tio, ke mi estis komunisto, ĉesis esti komunisto ĝuste pro tio, ke mi estas esperantisto!

Tiel mi transformiĝis de proleta esperantisto en la senco de komunista esperantisto finfine en normalan laboristan esperantiston, tiel ke mi nun plene identas kun SAT kaj sentas nenian fremdecon kontraŭ ĝi.

Bonesper poste sendadis al mi eltondaĵojn de artikoloj pri Sovet-Unio kaj ĝiaj satelitaj landoj, unue nomataj popoldemokrataj, poste socialistaj, inkluzive Ĉeĥoslovakion, pri kies specialisto mi poste fariĝis denove dank' al Esperanto, publikigitaj en 'New York Times' , bone sciante, ke mi scipovas ankaŭ angle.

Krom tio li bonvolis sendi al mi leteron, kiun li ricevis de juna esperantisto en Košice, Slovakio. Ankaŭ la enhavo de tiu letero estis ŝoka, sed jam ne estis tiel kiel la sekreta mesaĝo de la latva maljuna esperantisto kaj la refuta letero de Bonesper. Mi tuj tralegis ĝin, mankopiis kaj resendis al Bonesper. Ankaŭ tiu kopiaĵo nun ne troveblas ĉe mi, bedaŭrinde, kvankam mi estas certa, ke ĝi troviĝas ie en mia loĝejo. Mi ne memoras ankaŭ la nomon de ĝia aŭtoro, sed mi bone memoras ĝian enhavon, ĉar temis pri nekredebla historio.

Slovakio, kiu dum la milito estis satelito de Nazi-Germanio estis liberigita de la sovet-armeo kaj la ĉeĥoslovaka armeo organizita en Sovet-Unio dum la milito.

Košice estas la urbo, kiu situas ne tre malproksime de la landlimo kun Sovet-Unio. Iun tagon ne longe post la liberiĝo tiu juna esperantisto ricevis ordonon, ke li venu al la urba placo. Li simple pensis, ke temas pri volontula laboro por reordigi kaj purigi la placon, kie okazis la batalo. Sed je lia granda surpriziĝo li estis surloke ordonita de la soldatoj de la sovet-armeo, ke li envagoniĝu en trajnon. Ĉi tiu forveturis trans la landlimon kaj fine atingis la Donecan karbbasenon mallonge nomatan Donbas en Sovet-Unio, kaj li estis devigata kun aliaj, kiuj estis similmaniere devige forveturigitaj el Slovakio, labori en unu el tieaj karbminejoj, kvazaŭ sklavoj. La laboroj estis pezaj, tiel ke li fine decidis vivoriske fuĝi kaj piede reveni en Slovakion. Li sukcesis forlasi la minejon nerimarkite de la gardistoj. Sed kiel reveni en Slovakion?

Nu, li kaŝiĝis tage en arbaroj kaj nokte marŝis direkte al Slovakio. La direkton li povis scii laŭ la sunfloroj kaj la steloj. Tiel post sufiĉe longa kaj malfacila marŝado li finfine transpasis la landlimon kaj atingis Košice-n, sian hejmurbon. Feliĉe oni lasis lin trankvila, neniel ĝenis lin. Kredeble pro tio, ke tiaĵoj estis tiam tro multaj.

En Japanio troviĝas proverbo 'Post pluvo firmiĝas la tero'. Certe estis la skismo en 1931 ne nur simpla pluvo sed eĉ pluvego, kiu preskaŭ detruis SAT-on. Sed feliĉe ĝi eltenis tiun provon kaj vivadis ĝis nun. La komunista opozicio jam ne ekzistas en ĝi, anstataŭ ĝi funkcias en ĝi la Komunista Frakcio amike kune kun la aliaj Frakcioj. Do ankaŭ ĉe SAT vere 'post pluvo firmiĝis la tero'. Ni ĉiuj devas gratuli tion elkore.

Restas tamen laŭ mi ankoraŭ unu problemo por SAT. Nome vera tutmondiĝo kiel montras ĝia nomo: 'Sennacieca Asocio Tutmonda'.

Ĉar ĝis nun bedaŭrinde ĝi estas ĉefe eŭropa asocio malgraŭ sia nomo. Por vera tutmondiĝo devas kontribui unuavice ni, SAT-anoj en Japanio. Kiel antaŭmilite JPEU estis forta kolono de IPE, ni SAT- kolektivo en Japanio fariĝu kolono de SAT en Japanio eĉ pli forta ol iam JPEU!

Per tiu alvoko mi finas mian tiel longan prelegon.

76-a SAT-Kongreso
La Chaux-de-Fonds
12 - 19 Julio 2003
< esperanto.kce@esperantio.net >
Tel/Fakso: +41.32.9267407

Esperanto kaj la Freinet-Pedagogio:

Renkontiĝo de du humanistaj movadoj

L. Robert

Enkonduko

Dum preskaŭ plena instruista kariero, de 1947 ĝis 1969, mi seninterrompe praktikis la Freinet-pedagogion; en 1961 mi fariĝis esperantisto … Plurfoje mi demandis min, ĉu tiuj personaj orientiĝoj rezultas el nur hazarda koincido, ĉar fakte mia Esperanto-instruinto estis L.Lentaigne, senlaca aktivulo bone konata en I.C.E.M.-medio (Instituto Kooperativa por Edukado Moderna). Aŭ ĉu tiuj ambaŭ orientiĝoj havas iun komunan respondanton al intima aspiro, kiun ili ebligis al mi realigi?



Pli profunde pripensinte mi opinias tute ne hazardaj tiujn inklinojn samtempe al la Freinet-pedagogio kaj al Esperanto tiel, ĉar en ambaŭ movadoj mi trovis saman idealon, kiun mi aparte ŝatas. Krome mi malkovris frapan similecon en iliaj naskiĝoj, disvolviĝoj, celoj kaj bedaŭrinde ankaŭ en obstina kontraŭeco fare de la establitaj regsistemoj. Pro tio ŝajnas al mi tre interese kompari ambaŭ movadojn.

Motivado de la kreintoj, Zamenhof kaj Freinet

-Zamenhof - Estas bone sciate, kiom dolore ŝokita estis li, ankoraŭ knabo, vidante surstratajn disputojn, eĉ batalojn, inter diversgentuloj loĝantaj en lia loĝurbo Bialystok; ankaŭ ke el tio naskiĝis en lia animo la arda deziro oferi siajn fortojn dum tuta vivo por kreado de komuna interkomprenilo, por ke la homoj ne plu interbatalu. Tiu profunda homamo ekster ia ajn profitcelo konsistigas la 'internan ideon', kiu havigas animon al la lingvo Esperanto, kaj nedubeble certigas al ĝi daŭran pluvivadon.

- Freinet - Li ne spertis surstratajn disputojn, sed multe pli terure la militan interbuĉadon dum la Unua Mondmilito el kiu li eskapis, sed kruele kaj grave vundita. Li estis nur 23-jarulo, kiam elirinte el hospitalo, malforta, malfacile spiranta, li ricevis instrupostenon. Tiaj malfavoraj fizikaj kapabloj certe influis lian decidon elpensi alian pedagogian sistemon ol la klasikan, kiun li ne povis praktiki. Sed verŝajne ankaŭ, eble senkonscie, deziro eduki infanojn tiel, ke ili fariĝu plenkreskuloj pretaj por kontraŭmilita agado favore al paca interhoma kunvivado. Freinet tre simpatiis al Esperanto; laŭ asertoj de kelkaj li eĉ eklernis la internacian lingvon, sed fakte ĝin ne praktike uzis. Tamen li forte subtenis agadojn de H. Bourguignon, Lallemand, Lentaigne, inter aliaj esperantistoj Freinet-edukistoj. Okaze de ĉiu I.C.E.M.-Kongreso invitite ĉeestis eksterlanda esperantis(in)o. Certe ne hazarda favora opinio pri Esperanto.

Do ne mirige, ke tiuj homamantoj sukcesis starigi, ĉiu en sia fako, sistemojn strebantajn al noblaj celoj, kaj en kiuj multiĝas similaj aspektoj, kiujn mi sinsekve pritraktos:

- Eduko al paca kunvivado.
- Agado kontraŭ rasismo, ia ajn endoktrinigo, integrismo, diskriminacio.
- Respekto al ĉies kulturo; vere frateca, laikeca.
- Internacieco, eĉ sennacieco.

Eduko al paca kunvivado

Ĉiuj esperantistoj bone konas la deklaron de Zamenhof okaze de la malfermo de la unua Universala Kongreso en Bolonjo ĉe Maro (1905), per kiu li tiel difinis la 'Internacian Ideon' de Esperanto:' … la unuan fojon en la homa historio ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud la alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj, kiuj, ne altrudante unu al alia sian lingvon, komprenas sin reciproke, ne suspektas unu alian pro mallumo ilin dividanta, amas sin reciproke kaj premas al si reciproke la manojn ne hipokrite, kiel alinaciano al alinaciano, sed sincere, kiel homo al homo. Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo ĉe Maro kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago, kaj grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj!' (Paroladoj kaj Poemoj de Z, p.7 kaj 8)

La edukisto laŭ la Freinet-pedagogio bazas sian pedagogian sistemon sur kooperado, kunhelpado, konsciiĝo pri individua respondeco, por formadi la gelernantojn en praktika paca kunvivado sine de la lerneja infansocieto. Mi mem spertis la bonefikon de tia eduko: dank' al ĝi dum multe da jaroj mi preskaŭ neniam estis devigata interveni por mastrece kaj trude solvi neeviteblajn konfliktetojn; la infanoj ĉiam mem sukcesis ilin solvi post plenfida pridiskutado dum kooperativa kunveno, kiun la infanoj senpacience atendis ĉiun sabaton.

Agado kontraŭ rasismo, iaj ajn endoktrinigoj, integrismo, diskriminacio

En Dresdeno, okaze de la 4a Universala Kongreso (1908), Zamenhof lastan fojon parolis pri la perturboj spertitaj de la Movado por bone konata agado de kelkaj por igi Esperanton nura lingvaĵo, ekster ia interna ideo. Li finis sian paroladon insistante pri la fakto, ke Esperanto estas ĉies lingvo, kiu toleras nenian ajn diskriminacion: '… Nun mi volas nur diri jenon: ni ĉiuj estas reprezentantoj de la ideo de la lingvo internacia, ni faru kun ĝi, kion ni volas, sed ni agu honeste kaj ni memoru, ke pri niaj agoj la estonteco severe nin juĝos. Memoru, ke Esperanto estas nenies propraĵo, ke la esperantistoj havas plenan rajton fari kun ĝi ĉion, kion ili volas, se ili nur faros ĝin singarde, lojale kaj interkonsente'. (Paroladoj kaj Poemoj de Z, p.40).

Ĉu ne la saman ideon alimaniere esprimas la 2a paragrafo de la Ĉarto de la Moderna Instrusistemo:

'Ni malkonsentas pri ia ajn endoktrinigo, Ni ne pretendas jam antaŭdifini, kia estos la infano, kiun ni edukas; ni ne formas ĝin por servi kaj daŭrigi la hodiaŭan mondon, sed por konstrui socion, kiu plej bone garantios ĝian disvolviĝon. Ni malpermesas al ni submeti ĝian spiriton al ia ajn neeraripova dogmo antaŭasertita. Ni strebe zorgas, ke niaj gelernantoj fariĝu adoltoj plenkonsciaj kaj respondecaj, kiuj konstruos mondon, de kiu forpelataj estos milito, rasismo, kaj ĉiuj formoj de diskriminacio kaj homekspluatado.'

Respekto al ĉies kulturo; vere frateca, laikeca

En Krakovo, dum la 8a Universala Kongreso, la lasta, en kiu li oficiale partoprenis, li tiel parolis:

'La interna ideo de Esperanto, kiu havas absolute nenian devigon por ĉiu esperantisto aparta, sed kiu, kiel vi scias, plene regas kaj ĉiam devas regi en la Esperantaj kongresoj, estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter gentoj kaj alkutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton. Ĉio, kio estas super tiu interna ideo de Esperanto, estas nur privataĵo, kiu povas eble esti bazita sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata, kiel identa kun ĝi.' (Paroladoj kaj Poemoj de Z, p 9)

Kaj fine de la parolado: '... En la jubilea momento de la esperantismo mi volus paroli al vi pri tio, kio naskas la esperantismon, pri ĝia esenco kaj espereblaj sekvoj; sed hodiaŭ mi staras antaŭ vi ankoraŭ en rolo oficiala, kaj mi ne deziras, ke mia privata kredo estu rigardata, kiel deviga kredo de ĉiuj esperantistoj. Tial pardonu min, ke mi pli ne parolos' (Paroladoj kaj Poemoj de Z, p 71)

Kia belega ekzemplo pri respekto al la aŭskultantaj homoj ...
Similan respekton al infana identeco montras la 5a kaj 6a artikoloj de la Ĉarto de la Freinet-Pedagogio:

5a art.: 'Kun nia helpo infano ja memkonstruas sian personecon. Malfacile estas koni infanon, ĝiajn pulsojn, por fondi nian edukan agadmanieron sur tia kono; tamen la Freinet-pedagogio bazita sur libera esprimebleco per naturaj procezoj, disponiganta helpeman medion, materialon, kaj teknikojn ebligantajn naturan, vivoriĉan kaj kulturan edukadon, tiel efektivigas aŭtentikan renormaligon psikologian kaj pedagogian'.

6a art. : 'En I.C.E.M. estas nek katekismo, nek dogmo, nek sistemo, al kiu ni petus de iu ajn agnoske subskribi. Male, ĉe ĉiuj aktivaj ŝtupoj de nia movado, ni organizas konstantan komparadon de ideoj, reserĉoj kaj eksperimentoj.

Freinet-edukistoj praktikas vere laikecan pedagogion, laŭ la franca koncepto, ŝajne sola tia tra la mondo. Ĝin eblas tre koncize difini tiel: Ne nur tolerema, sed sincere respektema al ĉies kulturoj, kredoj, opinioj filozofiaj aŭ religiaj, la laikeculo sin devigas favori neniun ajn kredon malfavore al la aliaj.

Eblas aserti, ke jam fine de la 19a jarcento Zamenhof estis avangarda laikeculo, same kiel Freinet longtempe poste.

Internacieco, eĉ sennacieco

Koncerne Esperanton, evidente ne necesas plu trakti pri tiu karakterizo, kiu konsistigas ĝian esencon; tial mi ne insistu.

La Ĉarto de la Freinet-pedagogio, en ties 10a artikolo, deklaras, ke ankaŭ ĉe ĝi tio estas grava aspekto:

'La Freinet-pedagogio estas laŭesence internacia. Precipe laŭ la principo de kooperantaj laborskipoj, ni konsistigas iun Internacian Federacion de la Movadoj por Moderna Instruado (F.I.M.E.M.), kiu ne anstataŭas la aliajn internaciajn movadojn, sed kiu agadas internaciskale same, kiel I.C.E.M. en Francio, por ke disvolviĝu labor- kaj destin-fratiĝoj, kiuj kapablos profunde kaj plej efike helpi ĉiujn porpacajn klopodojn.

Strebo al universala kulturo komuna al ĉiuj homoj

Esence humanecaj ambaŭ movadoj agadas por forfaligo de ĉiaj bariloj, lingvaj kaj alispecaj, apartigantaj la homojn. Tion jam klare montras la ĉisupre pritraktitaj temoj.

Mi persone partoprenis en sufiĉe multe da kongresoj, tiel esperantistaj, kiel Freinet-edukistaj, por atesti pri tieaj etosoj same amikecaj, fratecaj, senrezerve homecaj. Dank' al tio, eble ankaŭ pro tio, mi fariĝis konvinkita mondcivitano ekkonsciante, ke sur nia planedo ĉiuj homoj same reagas antaŭ la ĉefaj vivproblemoj. Tial ili nekontesteble konsistigas unuecan vivantospecion, kie ajn ĉiu individue naskiĝis; kaj honesta observanto konstatas, ke universala kulturo ne estas utopio, sed realaĵo. Cetere sukceso de la internacia interlerneja korespondado iniciatita de H. Bourguignon same pruvas ekziston de tiu universala kulturo.

Neprofitemo de la elpensintoj

Malfermante la 8an Universalan Kongreson en Krakovo (1912), Zamenhof tiel alparolis la kongresantojn:

'La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min antaŭ vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min inter vi. Jen estas la kaŭzo, kiu devigas min fari la nunan decidon: Nun kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fariĝu absolute libera, ne sole libera de ĉiuj personaj dekretoj, kia ĝi fariĝis jam antaŭ dudek-kvin jaroj, sed ankaŭ de ĉia efektiva aŭ



ŝajna persona influo. Estas necese, ke la mondo sciiĝu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan majstron. Nomu min per mia nomo, nomu min la fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin ne nomu min plu 'majstro', ĉar per tiu morale tro liginta nomo vi malliberigas nian aferon.' (Paroladoj kaj Poemoj de Z, p 67 kaj 68).

Kaj iom pli poste: 'Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo.' (Paroladoj kaj Poemoj de Z, p. 69)

Antaŭe Zamenhof jam rezignis ĉiujn siajn aŭtorrajtojn pri originalaj kaj tradukitaj verkaĵoj. Ofero des pli ri-

markinda, ke lia okulkuracista profesio ne havigis al li grandan monprofiton tiel, ke li ofte baraktis en manko de vivneceso.

Siaflanke Freinet ne rezignis siajn aŭtorrajtojn pri pedagogiaj verkaĵoj, sed same kiel Zamenhof li neniam rolis, kiel 'majstro' dum kongresoj aŭ laborrenkontiĝoj. Tiam li aplikis la kooperan laborspiriton, kiun li rekomendis, ankaŭ proveksperimentadon kun kunlaborantoj, same kiel kun infanoj alkutimiĝantaj al libera sinesprimado. Li ja estis la iniciatinto de pedagogia sistemo, kiu iom post iom maturiĝis dank' al koopera kunlaborado de multaj edukistoj tra Francio, eĉ el eksterlandoj, kiuj daŭre kaj plenfide komparis rezultojn de siaj streboj. Ĝi fakte estas rezulto de kolektiva laboro, sen majstro; kio supozeble klarigas, kial ankoraŭ nun pluvivas la Freinet-movado tridek-kvin jarojn post la morto de ties fondinto.

La 7a artikolo de la Ĉarto de la Moderna Instrusistemo substrekas tiun kooperan kunlaboradon:

'Ni profunde interesiĝas pri vivo de nia kooperativo tial, ĉar ĝi estas nia domo, nia laborejo, kiun ni devas nutri per nia mono, nia strebado, nia pensado, kaj kiun ni pretas defendi kontraŭ iuj ajn malutilantoj al niaj komunaj interesoj.' Kompreneble temas pri la Kooperativo por Laikeca Instruado (C.E.L.), fondita de Freinet, kaj aldonanta ĉion necesan por praktikado de la Freinet-pedagogio.

Freinet-pedagogio kaj Esperanto same referencas per la nomo al la respektivaj iniciatintoj. Same ĉi lastaj ofereme donacis siajn elpensaĵojn, Zamenhof al la tuta homaro, Freinet al la instruistaro. Kaj same ambaŭ kreintoj ricevis neniun monprofiton kaj restis malriĉaj dum la tuta vivo.

Revoluciemaj kaj avangardaj iniciatintoj

Revoluciemaj? … Nekontesteble! Zamenhof kaj Freinet starigis sistemojn, kiuj en respektiva fako fundamente ŝanĝas konceptojn ĝis nun forte ankritajn en la sociaj kutimoj jam de post pluraj jarcentoj.

Antaŭ Zamenhof multiĝis provaĵoj pri internacia lingvo, sensukcese. Jam en la 17a jarcento Descartes reliefigis neŭtralan karakterizon de internacia lingvo respektanta ĉies kulturojn; sed tian ideon verŝajne oni taksis entute utopia. Sed du jarcentojn poste tiun utopion Zamenhof transformis en realaĵon. Vera revolucio! Sed estas bone sciate, ke profundan ŝanĝon en la kutimoj tiel intelektaj kaj mensaj, kiel banale ĉiutagaj, la homoj ne tuj pretas akcepti. Spiritevoluado tiel malrapide progresas! Tamen pli kaj pli da faktoj nuntempe montras, ke tiu ideo pri neŭtrala internacia lingvo disvastiĝas. Baraktado ĉe organizo de unuiĝanta Eŭropo ja estas trafa ekzemplo …

Same Freinet alportis revoluciajn ideojn en la pedagogion. Antaŭe ĉiuj instrumetodoj baziĝis sur skolastikaj principoj: severa disciplino, nekontestebla superregado de neeraripova instruisto staranta sur podio, tiel simbole superanta la infanojn, strikta obeemo kvazaŭ soldateca, punoj ofte dolore fizikaj kaj humiligaj, klasifiki per akra konkursado inter gelernantoj, ktp … Freinet entute kontraŭis tiujn principojn: lia unua decido konsistis en definitiva forigo de la podio, tiel simbole montrante, ke li nepre volas resti ĉe sama nivelo kiel liaj gelernantoj. Li ne plu trudis labortemojn, li forigis klasifikadon, li enkondukis kooperan laboradon, aktivan partoprenon de la infanoj en laborplanado, respondecon en plenumado de memelektitaj taskoj, ktp … La infano ne plu estis pasiva regato, sed aktiva aganto en sia laboro

Dum la pasintaj tridek jaroj, do post la morto de Freinet, la priedukada ministerio, almenaŭ en Francio, rekomendis instruteknikojn elpensitajn de Freinet (libertema verkaĵo, enketoj, laborskipoj, interkorespondado, k.a.), sed ĉiam altruditajn de la instruisto-mastro, laŭ la klasika instruspirito. Hipokrite oni tiel ŝajnigis apliki la instrusistemon de Freinet, dum oni reale malplenigis ĝin de la esenco, t.e. la spirito, la animo de lia pedagogio, en kiu la instruisto estas la amika konsilanto kaj helpanto de la lernantoj.

Kontraŭado de la instalitaj instancoj

Rimarkinde estas, ke la ŝtataj instancoj, almenaŭ en Francio, alprenis tiel simile kontraŭajn sintenojn rilate ambaŭ movadojn. Interese sin demandi, kial …

Ĉu ne pro politikaj kialoj, kiujn la regantoj ne volas konfesi, ĉar tio ne kongruus kun iliaj ofte distrumpetitaj asertoj pri senlima sinoferemo por bono kaj feliĉo de la regatoj? Tian demandon iel prirespondas Claude Piron konklude de sia franclingva verkaĵo 'Communication linguistique' (Lingva komunikado). Mi opinias ĝin aparte trafa: 'Ebligante uzadon de altkvalita interkultura komunikilo por simplaj popolanoj, nebruemantoj, senranguloj, Esperanto perturbas aspekton de la socia tavoligo. Ĉu iuj ne sentas tiun potencialan demokratiigon, kiel minacon? Transiro de superranga pozicio al normalranga ne estas evidente alloga, Precipe por tiuj, kiuj tenante la regpovon sin konsideras superranguloj'.

Povas esti, ke la superranguloj sentas sin same minacataj de la Freinet-eduksistemo. Ankaŭ ĝi volas esti je la servo de la simplaj popolanoj. Ĝi celas formi homojn konsciajn ne ŝafece obeemajn pri siaj rajtoj same, kiel pri siaj devoj, la kapabloj pripensi sociajn okazaĵojn, postulantajn precizajn informojn, malfidantajn demagogajn paroladojn. Ankaŭ la Freinet-edukistoj pro tio verŝajne perturbas la socian tavoligon. Tial Freinet spertis tiel gravajn atakojn en la urbo St. Paul de Vence fare de la lokaj reakciuloj. Mi mem spertis similan atakon de dekstrula vilaĝestraro, kiu kulpigis min pro 'politika propagando en mia lernejo.'

En Francio la sinsekvaj registaroj ĉiam rifuzis, kaj daŭre rifuzas, enkonduki Esperanton en la lernejprogramo de la mezgradaj lernejoj kaj gimnazioj. En la institutoj por instruisto-formado entute ignorata estas la Freinet-pedagogio.

Ĉu ne rimarkinda simileco en tia sistemo estas la kontraŭa sinteno de la regantoj kontraŭ ambaŭ movadoj?

Kiel konkludon mi tuj lasos parolvicon al Zamenhof: 'La afero 'Esperanto', nia etika movado, konsistas ne en rapideco, sed en certeco. Multe da sencelaj aferoj ekbrilis antaŭ la mondo rapide, sed ankaŭ rapide falis. Afero bona kaj certa progresas ordinare malrapide kaj nur kun grandaj malhelpoj. Ne malĝoju tial, Esperantistoj!… Ni laboru kaj esperu.

L.Robert

Esperanto kaj socialismo?

Detlev Blanke

Pri la movado sur la 'alia flanko'

Enhavo

1 Enkonduko
1.1 La temo
1.2 La aŭtoro
2 Laborista Esperanto-movado
2.1 Esperanto - politika instrumento
2.2 Pri la skismo en la laborista Esperanto-movado
3 Persekutoj sub Hitler kaj Stalin
4 Esperanto en la orienteŭropaj landoj
4.1 Rekomenco
4.2 Kelkaj faktoroj influaj al la soc.landa movado
4.3 La famaj Konsultiĝoj
4.4 Kelkaj problemoj kaj tabuoj
4.5 Pri la 'komunista puĉo' kontraŭ Ivo Lapenna
4.6 Kelkaj atingoj
5 Konkludoj
6 Notoj
7 Literaturo

1 Enkonduko

1.1 La temo

La sekva teksto baziĝas je preleg-materialo, kiun mi nur parte povis prezenti kadre de la Studtago 'Esperanto kaj Ideologio', okazigita la 20-an de oktobro 2001. La aranĝantoj volis diskutigi la eblecojn de politika peresperanta agado en la nuna tempo, laŭ mi grava kaj pludisktutenda temo, des pli ĉar post la fino de la malvarma milito eblas pli facile diskuti ol antaŭe. Kaj tio laŭ mi necesas, ĉar aperis novaj minacoj, kiuj ankaŭ postulu la star-punkton de esperantistoj. Laŭ la peto de la organizintoj dum mia prelego mi aparte prezentis kelkajn faktojn el la historio de la Laborista Esperanto-Movado (LEM), kiuj montris la efikan politikan aplikon de Esperanto (Eo) kaj traktis pri la persekutoj sub Hitler kaj Stalin. Mankis sufiĉe da tempo por prezenti la trian planitan temon, pri kiu mi sentis min pli kompetenta: la movado en eŭropaj socialismaj landoj[1], kies aktivadojn mi partoprenis kiel membro en gvida pozicio. Kompreneble mi konscias, ke esperantistoj el aliaj 'socialismaj landoj'(1) diversajn aferojn eventuale interpretus alie, kaj supozeble tio ankaŭ validas por observintaj okcidentaj esperantistoj. Mi do prezentos mian propran vidpunkton kaj klopodas meti ĝin en la siatempan historian kadron.

Por kompreni la tiaman situacion, ankaŭ necesas iom trakti pri LEM kaj la persekutoj, ĉar ambaŭ temoj influis la movadon en la menciita regiono.

La internaciskala kaj politika utiligo de Eo en la laboristmovadaj medioj donis tute principe al la Eo-movado fortajn puŝojn, disvastigis la lingvon en laboristaj kaj maldekstraj rondoj, el kiuj poste venis personoj, kiuj ludis gravan rolon en la socioj de la socialismaj landoj kaj en la tiea Eo-movado, aparte en Bulgario, GDR, Hungario, Jugoslavio[2] kaj - kvankam tro limigite - ankaŭ en Soveta Unio.

Ĉar LEM evoluigis fortajn politikajn kaj ideologiajn aktivaĵojn, tio donis pretekstojn, krude persekuti la adeptojn de la Internacia Lingvo flanke de Hitler kaj de Stalin.

La persekutoj disbatis parton de la lingvo-komunumo, rezultigis la murdon de unuarangaj intelektuloj kaj aktivistoj kaj detruis multajn materiajn rimedojn. Ili kreis grandan vakuon en la historio de la movado en tiu regiono, kie post la Dua Mondmilito fondiĝis la orienteŭropaj socialismaj landoj, ĉar post la venko super la faŝismo la persekutoj sub Stalin ankoraŭ daŭris. Iliaj postefikoj en kelkaj landoj estis ankoraŭ longe senteblaj.

La trakto de tiu temo al mi ŝajnas grava i.a. pro tio, ĉar post la falo de la Berlina Muro kaj la kolapso de la orienteŭropa sistemo ne mankas provoj dubindigi, misfamigi kaj falsadi aspektojn de la tiuregiona movado, flanke de homoj, kiuj ne partoprenis ĝin kaj ne komprenas la delikatajn problemojn ligitajn al ĝi. Tion mi ne povas akcepti. Sed tio neniel signifu, ke ne eblas alpreni kritikan starpunkton pri diversaj aspektoj de tiu movado. Ja hodiaŭ ni ĉiuj estas pli saĝaj.

1.2 La aŭtoro

Pro la traktata temo eble estus utile scii ion pri la aŭtoro de ĉi-tiu artikolo. Mi plenkreskis en Germana Demokratia Respubliko (GDR) kaj volonte laboris por tiu ŝtato, ĉar mi vidis en ĝi alternativon.

De 1949 ĝis 1965 en GDR ne ekzistis oficiala Eo-movado. Mi eklernis Eon kiel gimnaziano en la jaro 1957 kaj volis doni mian kontribuon al la restarigo de la movado en GDR. Mi kontaktis multajn iamajn laboristajn kaj alitendencajn esperantistojn kaj multe lernis de ili.

Jam frue min aparte fascinis la historio de LEM, i.a pro tio, ĉar ĝi al mi ŝajnis multe pli dinamika ol la t.n. neŭtrala movado. Mi havis la ŝancon konatiĝi kun vere imponaj personoj, kiuj laŭ mi estis komunistoj en la plej pozitiva senco de la vorto. Ili batalis kontraŭ faŝismo, luktis por siaj idealoj, riskis sian vivon, estis en prizonoj kaj en koncentrejoj. Ili grave influis mian politikan mondkoncepton kaj plifortigis mian entuziasmon por Eo. Kaj ili daŭre havas mian estimon.

Al tiuj personecoj i.a. apartenas la jam forpasintaj germanoj Otto Bäßler[3] (Leipzig), Rudi Graetz[4] (Rostock/ Berlin) kaj Ludwig Schödl[5] (Neuruppin), krome Werner Habicht[6] (Waltershausen), Paul Köster[7] (Rostock), Werner Plate[8] (Rostock), Robert Stoll[9] (Rostock), sed ankaŭ la ankoraŭ vivantaj Ino Kolbe[10] (Leipzig) kaj Ernst

Diedrich[11] (Warin). Al tiuj personoj, aparte gravaj por mi, mi ankaŭ kalkulas la bulgaron Nikola Aleksiev[12], la hungaron Béla Berceli[13], la ruson Semjon Naumoviĉ Podkaminer[14], la briton Bill Keable[15] kaj la francon William Gilbert[16].

Substrekindas, ke mi lernis Eon helpe de la laborista esperantisto Franz Tischer el Magdeburg. Li estis mirindulo. Pro diversaj vivkondiĉaj kialoj al li eblis viziti lernejon nur dum tri jaroj. Pro tio li ne kapablis skribi senerare eĉ unu etan germanan frazon. Sed li ja estis brila esperantisto kaj fariĝis mia esperantista mentoro, al kiu mi multon dankas.

Nur en 1965 la esperantista movado de GDR trovis sian oficialan kadron en prestiĝa kulturorganizaĵo, Germana Kulturligo (poste 'Kulturligo de GDR'). Post honorofica agado de 1965-1968 en la norda regiono de GDR, kie mi kunrekonstruis la Eo-movadon (distrikto Rostock), mi fariĝis sekciestro por Eo en la Centra Oficejo de Kulturligo en Berlin kaj la sekretario de (unue) Centra Laborrondo Eo kaj (ekde 1981) Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (internacie konatiĝinta per la mallongigo GDREA). Mi interalie redaktis 'der esperantist' de 1969-1990 (ekaperinta de 1965) kaj la jarajn GDR-eldonojn de 'Paco' 1970 - 1989 (ekaperinta de 1966). Kiel sekretario de GDREA mi partoprenis ĉiujn 22 konsultiĝojn de la Eo-organizaĵoj de la socialismaj landoj de 1969 ĝis 1989, pri kiuj temos malsupre.

Mi agadis en la movado en GDR kaj en la internacia Eo-movado (aparte en MEM kaj en UEA)[17]. Krome mi aktivis sur scienca kampo, en GDR fondis la fakon interlingvistiko kaj ĝin enkondukis en la sciencan pejzaĝon de tiu lando.[18]

Min ne nur sincere fascinis la historio de LEM kaj ties aktivintoj, mi ankaŭ komprenis la taktikan signifon de tiu historio por la refunkciigo de la movado en GDR. Ĝi ja estis forta argumento kontraŭ stultaj asertoj pri 'Eo kiel rimedo de la reakcia kosmopolitismo' aŭ 'lingvo de burĝa neŭtralismo'. Kiel jam montris Ulrich Lins (1987) kaj Alberto Fernández (2002), la gvidaj teoriuloj de la marksismo bedaŭrinde nenie sin pozitive esprimis pri la ideo de internacia lingvo kaj kelkaj eĉ klare kontraŭstaris ĝin. La politika laboristmovada Eo-praktiko tamen estis ne facile ignorebla fakto kaj konvinka argumento por la repermeso de la movado. Ankaŭ pro tio mi pli profunde okupiĝis pri la temo.[19]

Do, ne mirige, post la politikaj ŝanĝoj mi eksciis de grava eksfunkciulo de Kulturligo, ke ĝuste la LEM-tradicioj ludis gravan rolon en la debatoj de la Centra Komitato de SED[20] pri la repermeso de organizita movado en GDR. Ankaŭ certaj postefikoj de la persekutoj sub Stalin daŭre devis esti konsiderataj. Des pli, ĉar la ekzemplo de Rumanio montris, ke - post kelkaj esperigaj evoluoj - sub certaj enlandaj kondiĉoj malpermesoj kaj negativaj sekvoj por aktivuloj ne estis nepenseblaj. Ankaŭ la scienco ne estis intelekta memcelo. Krom la neceso esplori la aspektojn de Eo, scienca agado en diversaj landoj ankaŭ donis prestiĝon al Eo. Do interplektiĝis praktika kaj scienca agadoj, strategio kaj taktiko.

Fine mi volas substreki, ke malgraŭ la nun necesa kritika konsidero de ĉio farita, mi siatempe estis konvinkita pri la pravo de miaj ideoj kaj faroj. Kun la siatempa scio kaj sub similaj kondiĉoj mi principe same refarus mian laboron.

2 Laborista Esperanto-movado

2.1 Esperanto - politika instrumento

Per la historio de LEM eblas aparte bone montri la rolon, kiun Eo povas ludi kiel politika instrumento kaj ankaŭ la problemojn, kiuj estas ligitaj al tio. La spertoj de LEM kaj la agado de aro da ĝiaj aktivintoj influis la evoluon de la movado en la socialismaj landoj, kvankam malsamintensive.

Tio rilatis jenajn faktorojn:

- La labormetodoj de LEM, la multaj rilatoj inter diverslandaj proletaj esperantistoj al sovetiaj esperantistoj, la intensivaj korespondaj ligoj, la eldonagado kaj gazetara servo k.a. principe montris la socian utilon de Eo ankaŭ por la socialismaj landoj. La ĉi-rilatan historion oni aparte bone prilaboris en Bulgario (vidu Aleksiev 1980; Jankova-Bojaĝieva 1983) kaj en Hungario (kp. Barna 1986).

- Komunistaj esperantistoj el la tempo de LEM, kiuj post la skismo en la laborista movado grandparte membriĝis en la Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE), havis parte gravan influon en la postaj socialismaj landoj kaj transprenis gvidajn funkciojn en la Eo-movado.

Mi volas rememorigi nur kelkajn faktojn:

Kiel konate jam antaŭ la Unua Mondmilito fondiĝis unuaj grupoj de laboristaj esperantistoj, kiuj kadre de la 2-a Universala Kongreso en Ĝenevo iniciatis la fondon de la 'Internacia Asocio Paco-Libereco'. En la jaro 1910 ĝi ŝanĝis sian nomon al 'Liberiga Stelo'. La celoj de la asocio i.a. estis batalo kontraŭ militarismo kaj kapitalismo kaj la disvastigo de Eo inter la politike engaĝita laboristaro, aparte en la rondoj de socialistoj. Lige al tiuj fruaj aktivecoj aperis konsiderinda materialo, aparte la verŝajne unua maldekstra revuo, la 'Internacia Socia Revuo'. Ĝi aperis de 1906-1914, kaj ŝajne estis provo refondi ĝin en la jaro 1920. La revuo meritus detalan analizon.

La evoluo de LEM estis haltigita per la Unua Mondmilito kaj nur post ĝi ekis vere impresa evoluo. Fondiĝis Soveta Unio kaj vaste regis granda espero pri ebleco krei socialisman sociordon, kiu devus esti pli justa kaj paca ol la militojn generinta kapitalismo.

Je la iniciato de la franco Eugene Lanti en la jaro 1921 fondiĝis Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). SAT rapide evoluigis multflankan aktivadon, okazigis kongresojn, eldonis revuojn kaj literaturon kaj kunlaboris kun multaj naciaj laboristmovadaj Eo-asocioj.

Sub malfacilaj materiaj kondiĉoj jam en 1921 en Sovetunio fondiĝis esperantista organizaĵo sub la nomo 'Sovet-respublikara Esperantista Unio' (SEU), kies detala historia priskribo ankoraŭ mankas. Ĉe Lins (1988, 190-257) troveblas multaj faktoj, kvankam ofte aparte sub la aspekto de la persekutoj. Dum malmultaj jaroj ĝi tre fortiĝis kaj montris konsiderindan aktivadon, kelkrilate eĉ unikan, kio ne estus imagebla sen ŝtata subteno. Aperis en la rusa kaj en Eo revuoj, bultenoj kaj diversspeca literaturo. Pro kompreneblaj kialoj por la izolita nova ŝtato apartan rolon ludis propagandaj materialoj, kiujn oni ankaŭ aperigis en Eo (i.a. la serio 'Komunisma biblioteko', 'La Vero pri Soveta Unio' en 10 000 ekz., 'Sendiulo' t.e. esperantigo de la ateisma revuo 'Bezboznik k.a.). Vasta reto de kursoj (i.a. en sindikatoj, uzinoj, lernejoj, universitatoj, eĉ en Ruĝa

Armeo), Eo-kluboj k.a. kreis fortan Eo-movadon, kiu estis gvidita centrisme kaj sovet-ideologie. Al la centraj figuroj apartenis Ernest Drezen[21], Georgij Demidjuk[22], Vladimir Varankin[23] kaj Nikolaj V. Nekrasov[24].

Eo evidente estis taksita kiel grava informilo pri Soveta Unio. Radiostacioj emisiis programojn (en Heroldo de Esperanto dum la 20-aj jaroj oni trovas la programojn i.a. de la stacioj Charkov, Moskvo, Leningrado kaj Minsk). Gravan rolon ludis la internacia korespondado, ofte kolektive organizita inter sovetiaj kaj eksterlandaj grupoj.



Pro la nature granda intereso kiom eble plej multon ekscii pri la konstruado de la unua socialisma ŝtato en la iama cara Ruslando - kiom ajn seniluziigaj poste fariĝis la veraj faktoj - SAT kaj aliaj laboristaj Eo-Asocioj peris multajn kontaktojn al la esperantistoj en Soveta Unio, publikigis materialojn pri la juna ŝtato. Baldaŭ SAT havis siajn plej multajn membrojn en Sovetunio (kaj en Germanio).

Eo fariĝis praktika politika instrumento. Ĝi ne nur grave helpis al konkretaj interlaboristaj kontaktoj sen lingva barilo, ĝi ankaŭ pruvis sian valoron en neesperantista medio.

Unu el la ĉefaj aktivadoj estis la organizado de gazetaraj servoj, kiuj ekzistis meze de la dudekaj jaroj i.a. en Britio, Bulgario, Estonio, Francio, Germanio, Japanio, Nederlando, Pollando, Portugalio kaj Rumanio. Tiuj servoj tradukis nacilingven Esperantlingvajn materialojn, ricevitajn de laboristaj esperantistoj, aŭ artikolojn el la multspeca internacia laboristmovada Eo-gazetaro. La materialoj aperis en nacilingvaj gazetoj.

La gazetaran servon de GLEA certan tempon gvidis Otto Bäßler, kiu ludis gravan rolon ne nur en GLEA, sed ankaŭ en SAT kaj poste en IPE[25] kaj en GDREA. En 1928 la gazetara servo aperigis 1158 kaj en 1929 1738 artikolojn en sindikataj, partiaj kaj aliaj germanaj gazetoj (Kolbe 1996, II, 28).

Kiom eltroviĝemaj estis Bäßler kaj aliaj laboristaj esperantistoj el Leipzig, montras jena ekzemplo:

Kiam en la germanaj landoj Saksio kaj Turingio fine de 1923 estis malpermesita la komunista gazeto 'Sächsische Arbeiter-Zeitung', SAZ (Saksa Laborista Gazeto) la laboristaj esperantistoj Otto Bäßler kaj Walter Kampfrad el Leipzig sukcesis preter la cenzuro establi germanlingvan grandformatan gazeton 'Völkerspiegel' (Spegulo de Popoloj), kies artikoloj estis tradukaĵoj el esperantlingvaj raportoj kaj materialoj, ricevitaj de proletaj korespondantoj el la tuta mondo. La gazeto aperis de januaro ĝis oktobro 1924 en 16 eldonoj kaj estis distribuita per la kutimaj distribuservoj al la abonintoj de SAZ.[26]

La diverstendencaj laboristaj esperantistoj ofte sukcesis establi kunlaborajn rilatojn kun proletaj organizaĵoj (ekz. kun radioamatoroj, sportistoj, fervojistoj, liberpensuloj) kaj kun diversaj partioj.

2.2 Pri la skismo en la laborista Esperanto-movado

Aparte la konfliktoj inter komunistoj kaj socialdemokratoj, kiuj multe koncernis la sintenon al Sovetunio, baldaŭ ankaŭ trovis sian reflekton en LEM. La sekvoj de tiuj konfliktoj ankaŭ havis influon en la socialismaj landoj Eo-asocioj. Mia siatempe certe unuflanka rigardo al SAT ŝuldiĝas al tiu influo. La konflikton puŝis klopodoj, aparte flanke de sovetiaj kaj germanaj komunistoj, ligi SAT al KOMINTERN. Aldoniĝis seniluziiĝoj pro la kontrasto inter la idealiga sovetia propagando kaj la reala situacio en la landego mem.

La ĉi-rilataj konfliktoj en multaj landoj kaŭzis skismon en LEM. Ĉefe fondiĝis socialdemokrat-tendencaj kaj komunistaj grupoj, krome kelkaj aliaj. Post la skismo GLEA restis ĉefe komunisme tendenca. En Germanio tiu situacio aparte draste reflektiĝis en Saksio. Leipzig estis urbo kun granda signifo por la internacia kaj germana LEM kaj por SAT. Ankaŭ en GDREA Leipzig denove ludis gravegan rolon kun multaj bonkvalitaj aktivaĵoj. En Leipzig 1924-1933 i.a. estis la redakcio de Sennaciulo kaj la administrejo de SAT, krome tie aktivis kelkaj pintaj aktivuloj de SAT (kp. Kolbe II, p. 34-35).

Klaran bildon pri la konfliktoj inter socialdemokrataj kaj komunistaj esperantistoj spegulas la tre malsamaj raportoj, kiujn oni povis legi pri samaj eventoj sur la paĝoj de la ĉefaj saksaj gazetoj, la socialdemokrata 'Leipziger Volkszeitung', LVZ (Popola Gazeto de Leipzig) kaj la jam menciita komunista 'Sächsische Arbeiter-Zeitung', SAZ. Tie oni trovis ampleksajn artikolojn pri la SAT-kongresoj 5-a (1925, Vieno), 6-a (1926, Leningrado), 8-a (1928, Göteborg) kaj aparte pri la 9-a (1929, Leipzig).

Bedaŭrinde la malbonefikaj reciprokaj kalumnioj, kiuj multis inter la germanaj socialdemokratoj kaj komunistoj, ankaŭ troveblas en tiuj materialoj: La komunistoj i.a. estis 'lakeoj de Moskvo' kaj la socialdemokratoj 'socialfaŝistoj'.

En la jaro 1930 en SAT fondiĝis opozicio, kiu samjare ekeldonadis la gazeton 'Internaciisto' kaj fondis la eldonejon 'Eldonkooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo' (EKRELO). En 1932 en Berlin fondiĝis la marksisme orientita 'Internacio de Proleta Esperantistaro' (IPE). En la jaro 1933 en Vieno la estonta aŭstra ĉefurbestro kaj posta prezidento Franz Jonas fondis la 'Internacion de Socialistaj Esperantistoj' (ISE)[27]. Ambaŭ organizaĵoj forprenis multajn membrojn de SAT, kiu tamen daŭrigis eldoni siajn periodaĵojn kaj okazigi siajn kongresojn.

Kvankam la skismo malfortigis LEM, dum la unuaj jaroj kun la helpo de sovetiaj kaj alilandaj esperantistoj IPE havis dum mallonga tempo relative intensivan, kvankam komplikan vivon kontraste al ISE, kiu neniam vere ekfunkciis. Menciindas la aktiva eldonagado de EKRELO, kiu inter 1930-1939 eldonis ĉ. 70 titolojn, inter ili 22 pri la socialisma konstruado en

Sovetunio, 17 tradukitajn beletraĵojn, 10 originalaĵojn, 10 pri marksisma-leninisma teorio, 7 pri interlingvistiko (i.a la famajn titolojn de Ernest Drezen 'Historio de la Mondolingvo', 'Analiza historio de Esperanto-movado'). Laŭ informoj, kiujn mi ricevis de la siatempa gvidanto de EKRELO, Walter Kampfrad (Leipzig), la librojn oni presis en Moskvo. La internacian disvendadon (libroservo) aranĝis Kampfrad. Por la enspezita mono li aĉetis skribmaŝinojn kaj litertipojn por moskvaj presejoj. Helpe de KPD[28]-ligoj li kontrabandis la materialon al Moskvo (kp. Blanke 1996, p. 69-78). En 1932 aperis reklamilo kun la informo, ke aperos en Eo elektita verkaro de Lenin en 16 volumoj. La unuaj volumoj eĉ estis anoncitaj por 1933. Sed neniu volumo aperis. Ĝis nun ekzistas neniu informo pri la sorto de la manuskriptoj. En 1933 Walter Kampfrad estis arestita en la koncentrejo Colditz. Post la milito li laboris en GDR kiel prokuroro en Leipzig sed, kontraste al Otto Bäßler, ne plu sin engaĝis por Eo. Verŝajne li apartenis al tiuj, kiuj ne fidis al la plena rehonorigo de Eo en GDRA kaj preferis ne plu aktive engaĝi sin por la lingvo.

3 Persekutoj sub Hitler kaj Stalin

La historio de la persekutoj estas detale prezentita de Ulrich Lins (1988)[29]. Do mi limigos min al kelkaj rimarkoj.

Malbelan pruvon por tio, ke la Eo-movado reflektas pli malpli ĉiujn ideologiajn tendencojn bedaŭrinde liveras la germana historio. Jam antaŭ la potencakiro de la nazioj, en 1931 la esperantisto Herbert Wohlfahrt[30], funkciulo de SA,[31] fondis organizaĵon kun la nomo 'Neue Deutsche Esperanto-Bewegung', NDEB (Nova Germana Esperanto-Movado). La celo de NDEB estis, meti Eon en la servon de la faŝisma Nacisocialisma Germana Laborista Partio. NDEB eldonis gazeton kun ofte naziideologiaj materialoj kaj klopodis transpreni la potencon de GEA, sed ne sukcesis. Finfine 1936 sekvis la malpermeso por ambaŭ organizaĵoj, fakte ili devis 'libervole dissolviĝi'.

Sed ankaŭ ekzistas pozitivaj ekzemploj. Dum la unuaj jaroj post la potencpreno de Hitler laboristaj esperantistoj ankaŭ utiligis Eon por informi la eksterlandon pri la situacio en Germanio. Nur en 1971, okaze de mia partopreno al la 56-a Universala Kongreso en Londono, de la iama IPE-aktivulo Bill Keable mi ricevis kelkajn kamuflitajn broŝurojn, kiujn en 1933 produktis la germana IPE-aktivulo Ludwig Schödl kaj disvastigis internaciskale. Germanling-va kovrilo varbis por Nivea-ungvento aŭ radioaparatoj kaj ene enhavis esperantlingvajn tekstojn pri la faŝismaj kruelaĵoj en Germanio.

Post 1933 diversaj germanaj laboristaj esperantistoj forlasis Germanion, inter ili Ludwig Schödl kaj la lasta prezidanto de GLEA, Willy Vildebrand. Ambaŭ elmigris al Francio kaj post la milito revenis al Germanio. Ili ludis gravan rolon ĉe la fondo de Eo-organizaĵo en GDR.

La persekutoj de esperantistoj en Sovetunio ĉiam havis certan nerektan influon al la evoluo de la Eo-movado en la socialismaj landoj, ĉiukaze en GDR. Pro tio estu memorigite:

Aparte ekde 1937 la situacio por esperantistoj en Sovetunio fariĝis vivdanĝera. Lige al la 'granda purigo', kiun iniciatis la paranoja Stalin, malaperis multaj bonegaj esperantistoj, ĉu mortkondamnitaj pro 'aparteno al spiona organizo' aŭ ĵetitaj en la sovetiajn gulagojn. Mortpafitaj estis i.a. Ernest Drezen kaj Vladimir Varankin. Mi mem persone konatiĝis kun du, kiuj estis en la gulago: la geografo David Armand,[32] parenco de la sekretariino de Lenin (Ines Armand) kaj Grigorij Demidjuk. Pro Eo ili pasigis 18 jarojn en siberiaj gulagoj. Armand je la invito de GDREA kelkfoje vizitis GDR kaj rakontis al mi, ke li supozeble eskapis la morton, ĉar por certa tempo estis sur ekspedicioj en la dezerto Karakum.

Semjon N. Podkaminer samkaŭze estis forpelita el la partio kaj timis similan sorton. Ankaŭ li estis post 1965 kelkfoje gasto de GDREA.

La motivoj por la persekutoj sub Hitler estas relative facile troveblaj. La koncernitoj, ĉu judoj, komunistoj kaj aliaj maldekstruloj, aŭ gejoj, ciganoj kaj aliaj minoritatoj, pli malpli baldaŭ sciis pri sia minaco. Iuj, kompreneble nur en ege eta kvanto, sukcesis eskapi. Tamen en Soveta Unio por ĉiu ajn civitano povis estiĝi danĝera situacio. Eĉ ideologia fideleco ne gardis antaŭ la minaco. Ĉiu ajn povis fariĝi viktimo, ankaŭ la plej honestaj kaj kredemaj komunistoj. Pro tio mi alvenis al la konvinko, ke la persekutoj de la esperantistoj sub Stalin kvante kaj kvalite superis

1. Skribante pri 'la socialismaj landoj' mi aparte celas tiujn, kies movadon mi sufiĉe bone konis kaj kun kies aktivuloj mi tenis regulan kontakton: Bulgario, Ĉeĥio kaj Slovakio (la iama Ĉeĥoslovakio), Hungario, Pollando kaj Sovet-unio. La asocioj de tiuj landoj kune kun GDREA formis la ĉefan parton de la famaj Konsultiĝoj. Aldoniĝis bonaj kontaktoj kun la organizaĵoj en Kubo kaj Vjetnamio.

(1) Cetere, ĉi-tie ne estas loko por rezoni pri tio, ĉu vere temis pri landoj socialismaj.Tio multe dependas de tio, kion oni siatempe komprenis sub 'socialismo' kaj kiel oni nuntempe rekonsideros la koncepton. Nuntempe mi opinias - kontraste al miaj tiamaj fortaj konvinkoj - ke ne vere temis pri socialismaj landoj. Oni tamen laŭ mi devas koncedi, ke ekzistis provoj realigi gravajn elementojn de socialisma sociordo. Ili foje estis relative sukcesaj, kiel al mi montras la jam 12 jarojn spertita kaj spertata ĉiutaga kapitalismo. Estus bone ankaŭ vidi tion kaj ne nur la sendube katastrofan finon.

2. Jugoslavio bedaŭrinde ne apartenis al tiuj landoj, kun kiuj ni havis regulajn kontaktojn. Tio estis reflektiĝo de la tiama politika situacio. La tiean movadon, konata pro bona kvalito, mi tro malbone konas kaj pro tio ne mencios en mia eseo.

3. Otto Bäßler, iama membro de Komunista Partio de Germanio (KPD), ludis gravan rolon en Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA) kaj en SAT. Li apartenis al la ĉefaj aktivuloj, kiuj kreis IPE. Bäßler apartenas al la fondintoj de CLE (vd. noton 35).

4. Rudi Graetz, iama membro de KPD, dum la dudekaj jaroj estis prezidanto de la filio de GLEA en la nordgermana lando Meklenburgo. Post 1945 li fariĝis diplomato kaj gvidis reprezentejojn de GDR en Islando kaj Danio. Graetz apartenis al la fondintoj de CLE kaj estis ties unua prezidanto.

tiujn sub Hitler. Tio neniel signifas malgravigi la faŝismajn krimojn.

Estas interese kompari la motivojn por la persekuto en ambaŭ 'regnoj' laŭ kelkaj kategorioj, certe nekomplete:

	Hitler	Stalin
- antisemitismo (la judo Zamenhof)	x	x (?)
- malfido al intelektuloj	x	x
- timo pro internaciaj kontaktoj	x	x
- politika hegemoniismo	x	x
- timo pri spionado		x
- paranojo de la diktatoro		x
- lingvoimperiismo (la germana, la rusa)	x	x
- aparta teorio pri komuna lingvo	-	x

Kompreneble ne eblas ekskludi la supozon, ke ankaŭ ĉe la nazioj regis iu timo pro spionado pere de Eo. Kaj ankaŭ Hitler havis paranojajn trajtojn. Sed ŝajne tiuj faktoroj ne tiom efikis kiel en Sovetunio.

La lingvo-politiko de Lenin estis direktita al evoluigo de ĉiuj lingvoj en Sovetunio. Li eĉ draste sin esprimis kontraŭ la rusa kiel ŝtata lingvo. Sed Stalin en ĉiuj sovetiaj respublikoj plifortigis la pozicion de la rusa. Aparta esprimo de tio ankaŭ estas anstataŭigo de latinaj alfabetoj de diversaj sovetiaj lingvoj per cirila, komence kaj meze de la 30aj jaroj. Stalin krome havis pseŭdointerlingvistikan teorion: Li supozis, ke post la tutmonda venko de la komunismo kaj la elformiĝo de komuna ekonomia tutmonda sistemo iom post iom kunfandiĝos la naciaj lingvoj al unu komuna monda lingvo (kp. Stalin 1992, p. 41).


Eventuale ankaŭ la frakcio de sennaciistoj en SAT nevole liveris argumenton por la malpermeso. Laŭ la konvinko de Lanti kaj de la sennaciistoj, nacioj kaj naciaj lingvoj estas la ĉefa kaŭzo por intergentaj konfliktoj. La sennaciistoj, almenaŭ en la tempo de Lanti, pensis pri sennacieca monda ŝtato kun unu sola sennacieca lingvo (Eo). Do eblis interpreti, ke laŭ tiuj ideoj Eo ja volis forigi la naciajn lingvojn.

4 Esperanto en la orient-eŭropaj landoj

4.1 Rekomenco

Dum la periodo inter 1945-1949 en la regionoj de la sovetia okupado eblis diversaj esperantistaj aktivecoj, kiuj tamen finiĝis resp. grave reduktiĝis pli malpli en 1949. Ekz. en GDR aperis dekreto, kiu malpermesis 'grupojn de artefaritaj lingvoj' kaj 'lingvo-angulojn en gazetoj' de tiuj lingvoj (kp. Blanke 1990, p. 122), supozeble post atentigo flanke de la sovetia milita administrejo.

Similaj situacioj estis en aliaj socialismaj landoj.



Aparte la teorio de Stalin pri la kunfandiĝo de la lingvoj al unu komuna de la estonta komunisma mondo tre malhelpis. Evidente temas pri pure spekulativa teorio, kiu eĉ ne havis ion komunan kun la ideo de internacia lingvo, kiu celas funkcii apud la naciaj lingvoj, kaj ne nur ne volis tiujn

5. Ludwig Schödl, iama membro de KPD, apartenis al la fondintoj de IPE kaj post 1945 estis direktoro de gimnazio, kiu dum la 50-aj jaroj, do longe antaŭ la oficialigo de Eo en GDR, pro siaj peresperantaj internaciaj kontaktoj eĉ estis distingita per la nomo 'Lernejo de la paco'. Schödl energie luktis por Eo kaj i.a. fariĝis membro de la (centra) Packonsilantaro de GDR. Li verkis la unuan lernolibron en GDR. Li apartenas al la fondintoj de CLE kaj estis ties vicprezidanto.

6. Werner Habicht, iama membro de KPD, estis laborista esperantisto en la germana lando Turingio. Post 1965 li estis prezidanto de distrikta organizaĵo Erfurt de GDR kaj apartenis al la centra estraro de GDREA. Notindas, ke post la morto de Habicht (1993) oni prezentis en la jaro 1994 materialojn el lia riĉa laboristmovada kolekto en la urba muzeo de Gotha. Tute surpriza okazaĵo en la nova politika medio.

7. Paul Köster, iama membro de SPD, estis unu el la unuaj laboristaj esperantistoj, kun kiuj mi konatiĝis kiel studento en Rostock. Dum la jaroj 1931-33 li migris per Eo tra eŭropaj landoj kaj pri tio verkis ampleksan manuskripton, kiu en 2002 estas publikigita sur kompaktdisko de Ralf Kuse.

8. Werner Plate, iama membro de KPD, laborista esperantisto en Rostock antaŭ 1933, ekde 1968 estis la ĉefa motoro de la reorganizita movado en la GDR-distrikto Rostock.

9. Robert Stoll, iama membro de KPD, estis laborista esperantisto en Rostock, unu el miaj unuaj konatuloj el LEM.

10. Ino Kolbe, vivas en Leipzig, estas la filino de Reinhold Voigt, kunfondinto de GLEA en la jaro 1911 en Leipzig. Ŝi publikigis libron pri la historio de LEM en Leipzig (vidu Kolbe 1996).

11. Ernst Diedrich vivas en la nordgermana urbeto Warin, laborista esperantisto, iama membro de KPD, unu el la unuaj

anstataŭi sed ja estas rigardebla rimedo por ilia konservado, ĉar direktita kontraŭ la hegemonio de kelkaj grandaj etnolingvoj. Sed tia lingvo ankaŭ estas direktita kontraŭ la hegemonio de la rusa. En respondoj, kiujn funkciuloj en GDR donis al esperantistoj, kiuj postulis repermeson de organizita Eo-movado, oni ligiĝis al ambaŭ aspektoj. Se la funkciuloj estis iom informitaj pri la teorio de Stalin, ili respondis al la esperantistoj en GDR, ke la genia k-do Stalin jam ĉion diris pri la problemo de komuna lingvo. Eo do estus superflua. Aliaj malpli informitaj simple informis, ke la estonta lingvo de la monda komunismo sendube estos la 'lingvo de la amikeco', la lingvo de Lenin, do la rusa. Kaj ĝin oni lernu anstaŭ la kosmopolitan kaj mortan Eon.

Nur post la morto de Stalin en 1953 iom post iom la situacio ŝanĝiĝis, kvankam laŭlande kun malsimila rapideco kaj kun diferencoj. Dum la 50-aj jaroj refondiĝis aŭ revigliĝis la asocioj en Pollando, Hungario, Bulgario. En Jugoslavio la stalinaj influoj ne povis efiki. La movado post la milito normale regajnis sian forton.

En Rumanio nur post 1989 kreiĝis la ebleco por fondi asocion. Necesas substreki la grandegan laboron, kiun dum la 70aj jaroj tie faris la kulturteoriisto kaj filologo Ignat Florian Bociort. Mi konatiĝis kun li, kiam de 1965-1970 li estis gastdocento ĉe la (orientberlina) Humboldt-Universitato. Post reveno al Rumanio per laŭplana kaj intensiva laboro en intelektulaj rondoj Bociort sukcesis fondi en 1978 la 'Kolektivon pri Esperanto kaj Interlingvistiko' ĉe la Rumana Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj. Li atingis mirindan subtenon flanke de sciencistoj, publikigis multajn artikolojn kaj kelkajn librojn. Multaj studentoj lernis la lingvon en universitato. Sed en 1985 venis malpermeso pri ĉiu ajn esperantista agado. Bociort estis eksigita el la universitato de Timisoara (kp.Bociort 1998)

En Albanio, ŝajne komence de la 50-aj jaroj, Radio Tirana disaŭdigis programojn en Eo. Ankaŭ aperis presaĵoj. Sed organizita movado nur eblis post 1989.

En GDR la reestabliĝo de organizita movado okazis kun malfruiĝo pro la konflikto inter la du germanaj ŝtatoj, kiu kompreneble havis negativan influon al ĉiuj internaciaj rilatoj de GDR.

En Ĉeĥoslovakio nur post la eventoj de 1968, en la jaro 1969 fondiĝis du asocioj: Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko.

4.2 *Kelkaj faktoroj influaj al la soc. landa movado*

Kiel pri multaj interesokampoj kaj hobioj, post la milito en la okcidentaj eŭropaj landoj eblis okupiĝi ankaŭ pri Eo. Esceptoj por certa tempo estis Hispanio kaj Portugalio. Ne necesis iuj apartaj permesoj de ŝtataj organoj aŭ la efiko de faktoroj, por ke la movado reaperu. Malsame al la eŭropaj socialismaj landoj.

Al la repermeso, la rekonstruado kaj fine al la grava socia subtenado, kiun la movado ĝuis en la plej multaj orienteŭropaj socialismaj landoj, helpis difinitaj faktoroj, kiuj parte efikis samtempe kaj laŭlande diversgrave. Mi klopodos montri la plej gravajn kaj havas antaŭvide aparte la situacion en GDR:

1.La reapero de organizita Eo-movado apenaŭ eblis kontraŭ la volo de Sovetunio sub la rego de Stalin. Post lia morto jen kaj jen, tre singarde, aperis unuaj esperantistaj aktivaĵoj. Aperis artikoloj pri Eo en lingvistikaj revuoj.

Aparte gravis tiu de Olga Aĥmanova kaj Evgenij Bokarev.[33] Tiaj informoj kaj materialoj tuj cirkulis en la rondoj batalantaj por la rekonstruo. Ja ĉio, kio okazis kaj aperis en Sovetunio estis grava argumento, almenaŭ ĝis alvenis perestrojko. Tamen, la dependo de la socialismaj landoj de Sovetunio ne estis tiom fortaj, kiom ofte asertite. Ja eblis evoluo de sufiĉe multflanka kaj bone organizita Eo-movado, sen ke la instancoj en Moskvo povis aŭ volis malpermesi tion.

2.La nacia politiko de Lenin certagrade klopodis doni evolueblecon al la pli ol 130 lingvoj en la siatempa Sovetunio. Konatiĝis lia forta pledo por samrajteco de ĉiuj sovetiaj lingvoj. Jam en 1913 Lenin postulis 'Neniun privelegion por iu nacio, por iu lingvo'[34]. Kaj aliloke: 'La proletaro ne povas permesi la fortiĝon de iu ajn naciismo, kontraŭe, ĝi ĉion subtenas, kio kontribuas…faligi ĉiujn disigajn murojn inter la nacioj, ĉion kio alproksimigas la naciojn pli kaj pli proksime…' (Lenin 1951, p.23). Tiaj citaĵoj povis esti rigardataj kiel nerektaj argumentoj por

kaj gravaj kontaktpersonoj por mi kiel gimnaziano.

12. Nikola Aleksiev, ĵurnalisto, vivis en Sofio, ĵurnalisto, kunfondinto de Bulgara Laborista Asocio en 1930, komunisto, partia kaj sindikata funkciulo, multe agadis por la reorganizado de la Eo-movado en Bulgario, estis dum multaj jaroj prezidanto de BEA kaj de MEM, honora membro de UEA.

13. Béla Berceli estis dum la 60-aj kaj 70-aj jaroj ĉefsekretario de HEA. Li iniciatis la Konsultiĝon.

14. Semjon N. Podkaminer ludis akivan rolon dum la dudekaj jaroj en SEU kaj SAT, estis sekretario de la organiza komitato de la 6-a SAT-Kongreso 1926 en Leningrad. Dum la dua milito li estis kolonelo kaj havis gravan rolon en la Leningrada Fronto. Post la milito li multe meritiĝis por la reorganizado de la Eo-movado en Sovet-unio, vicprezidanto de ASE kaj de MEM.

15. Bill Keable, siatempe membro de la Brita KP, estis dum la 30aj jaroj certan tempon direktoro de Morning Star, aktivulo de IPE.

16. William Gilbert loĝis en Tours/Francio, dum la 30-a jaroj aktivis en la Occidental-movado, verkis la libron 'Planlingvaj problemoj', havis diversajn funkciojn en MEM, i.a. ĝenerala sekretario, vicprezidanto, ĉefredaktoro de 'Paco'.

17. Mi estis membro de la Internacia Komitato de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), 1975 -1994 kaj de la Komitato de UEA 1978-1998.

18. Mi doktoriĝis 1975 kaj habilitiĝis 1985 pri esperantologia resp. interlingvistika temoj en Humboldt-Universitato de (orienta) Berlin, en 1988 nomumiĝis 'Honoraria docento pri interlingvistiko' en la sama universitato, kie mi ankoraŭ prelegas. Post la unuiĝo de GDREA kun GEA,

Eo, se oni atentis kelkajn tabuojn, ekz. tiun pri la netuŝebleco de la rolo de la rusa lingvo. Jen kaj jen aperis klopodoj pruvi, ke Lenin partoprenis Eo-kongreson kaj nomis Eon 'la latino de la proletaro'. Sed i.a Podkaminer (1986) montris la senbazecon de tiuj asertoj.

3.Iamaj membroj de laboristaj Eo-asocioj havis gravajn funkciojn en la socio de kelkaj landoj kaj la eblecon influi, ekz. en Bulgario kaj Hungario, sed ankaŭ en GDR. La tradicioj de LEM, aparte la komunismaj estis pezaj argumentoj, ne facile forviŝeblaj. Mi jam menciis Nikola Aleksiev, kiu apartenis al la fondintoj de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio en la jaro 1930 kaj i.a. estis redaktoro de 'Balkana Laboristo'. Li krome havis gravajn funkciojn en la sindikata movado, redaktis la gazetojn 'Edinstvo' kaj 'Antifaśistski front'. Aleksiev kelkfoje estis enprizonigita kaj torturita. Post 1945 li fariĝis ĉefredaktoro de la ĉiutaga sindikata gazeto 'Trud' kaj havis gravajn funkciojn ne nur en la sindikata movado sed ankaŭ en kulturorganizaĵoj. Li portempe estis membro de la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio. Asen Grigorev post 1945 por certa tempo estis sekretario de Georgi Dimitrov. La hungaro Béla Berceli (frato de Vilmos Bleier), havis altan rangon en la hungara armeo. Rudi Graetz, kiu ekde 1965 staris ĉe la pinto de la esperantista organizaĵo en Kulturligo de GDR, estis diplomato.

En la unua 11-membra centra estraro la Eo-organizaĵo de GDR, t.e. Centra Laborrondo de Esperanto-Amikoj en Germana Kulturligo (CLE)[35] en la jaro 1965 estis ok iamaj membroj de GLEA. La Estraro, elektita en 1976, konsistis el 41 personoj, inter ili estis naŭ iamaj membroj de GLEA. Lige al la rolo de laboristaj esperantistoj, kiuj grandparte antaŭ 1933 apartenis al la Komunista Partio de Germanio, ankaŭ necesas rigardi la kvanton de membroj de la gvida partio en la estraro de GDREA:

1976: 41 estraranoj, inter ili 23 membroj de SED; 1981: 45 (24); 1987 52 estraranoj (26). Do la influo de la partio estis certigita, kio kompreneble kontribuis al la fido flanke de la ŝtataj instancoj.

4.Ankaŭ la persekutoj de esperantistoj sub Hitler liveris argumentojn por la rekonstruado de la movado. Inter la persekutitoj ja estis konataj esperantistoj, samtempe komunistoj kaj antifaŝistoj.

5.Grava argumento estis la rolo, kiun Eo povus ludi en la 'internacia batalo por la paco, kontraŭ imperiismo kaj milito', por mencii tiun siatempe ofte uzitan, de multaj sincere komprenitan formulon. Pro sia statuta neŭtraleco UEA ne permesis politikan agadon en siaj vicoj kaj dum la Universalaj Kongresoj. Mondpaca Esperantista Movado (MEM), fondita en la jaro 1952 en Aŭstrio, donis konvenan eblecon esprimi sin pri aktualaj politikaj problemoj. MEM ludis gravan rolon, aparte en la unuaj jaroj de la reorganizado de la movado, sed ankaŭ poste. En MEM eblis diskuti gravajn problemojn (i.a. pri la milito kontraŭ Vjetnamo kaj en la araba-israela regiono, malarmado k.s.). Necesas konfesi, ke ĝi ofte prenis unuflankajn starpunktojn, proksimajn al tiuj de Sovet-unio. La asocioj de la socialismaj landoj, kvankam ne ĉiuj sammaniere, estis aktivaj en MEM, partoprenis en la eldonado de landaj numeroj de la revuo 'Paco' (aparte multajn kajerojn eldonis Bulgario) kaj pere de MEM havis ligojn al la Monda Packonsilantaro, kiu kun MEM havis kontrakton pri kunlaboro. En influhavaj politikaj rondoj de la socialismaj landoj MEM tre helpis krei certan konfidon pri la sociutila kaj porpaca rolo de esperantistoj. Tiel restis ĝis 1989.

6.Alia grava argumento estis la utiligo de Eo por internacia informado. Ĉiuj asocioj de la socialismaj landoj, kvankam malsamofte, eldonadis informmaterialojn pri siaj landoj, kiujn la ŝtato subvenciis.

Por mencii nur kelkajn ekzemplojn: En Sovetunio la informagentejo Nowosti eldonis multajn luksajn broŝurojn, i.a. kun paroladoj de Breŝnev ĝis Gorbaĉov. En Pollando la ŝtata radiostacio Varsovio disaŭdigadas ĝis hodiaŭ en Eo. En Bulgario, Hungario kaj Pollando aperis bonkvalitaj kulturaj revuoj ('Nuntempa Bulgario', 'Bulgario', 'Ripozoj', 'Hungara Vivo'). Ankaŭ en Ĉeĥoslovakio kaj GDR aperis informlibroj pri la eldonantaj landoj. La ampleksa libro 'GDR - faktoj kaj bildoj' estis eldonita en 20.000 ekzempleroj kaj internacie disvastigita. La libro rezultigis eĥon, kion la alilingvaj eldonoj ne sukcesis havigi. Tiu eĥo ebligis eldoni pluajn aliajn materialojn. Kompreneble tiuj faktoj rikoltigas al la siatempaj orientaj

kiu cetere okazis en harmonia etoso kaj kiun mi partoprenis kiel libere elektita vicprezidanto de GDREA, mi daŭrigas la fakan agadon i.a. kiel membro de la estraro de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), en 1991 fondis la germanlingvan sciencan Societon pri Interlingvistiko, estas membro de la redaktaj komitatoj de la revuoj 'Language Problems & Language Planning' (LPLP) kaj 'Esperanto Studies - Esperantologio' (EES). Krome vidu en Fiedler/Liu 2001, p. 9-14;681-725.

19. Vidu i.a. Blanke 1986a; 1993a,b; Kolbe 1996.

20. Sozialistische Einheitspartei Deutschlands (SED, Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio), la gvida partio en GDR.

21. E. Drezen ne nur estis la gvidanto de SEU (ĝenerala sekretario) sed ankaŭ brila interlingvisto, kiu ĉi-kampe jam kalkuliĝas al la klasikuloj. Li krome estis unu el la ĉefaj pioniroj de la terminologio-scienco en Sovetunio, certagrade komparebla al Eugen Wüster (kp.Kuznecov 1991, p. 3-40).

22. Grigorij Demidjuk estis la organiza sekretario de SEU kaj i.a. tradukis la verkon de Lenin 'Ŝtato kaj Revolucio', post 1945 profesoro kaj doktoro pri teknikaj sciencoj. Mi havis la eblecon intervjui lin en la jaro 1982 (kp. Blanke 1984).

23. Vladimir Varankin i.a. konatiĝis per esperantologiaj studoj kaj per la romano 'Metropoliteno'. Pri lia sorto sub Stalin kp. Stepanov 1990.

24. Nikolaj V. Nekrasov estis grava membro de la Centra Komitato de SEU, redaktoro de revuoj (i.a. La Nova Epoko), esperantologo kaj tradukisto.

25. Ke la klare komunisttendenca gazeto povis aperi, verŝajne ankaŭ dankindas al la ne tute akraj okuloj de la superranga policisto Paul Teuchert, kiu

aktivintoj la riproĉon de proksimeco al la reganta reĝimo. Kun tiu riproĉo ni devas vivi, almenaŭ mi povus.

7.Ankaŭ la elmontro, kion faras la konkurantoj de la socialismo, estis grava. Ekz. la atentigo pri Eo-materialoj, aperintaj en Federacia Respubliko Germanio (ekz. la multkvante dissendita libro 'Faktoj pri Germanio' aŭ la 'Okcidentgermana Revuo' 1961-1968) estis argumentoj por GDREA, postuli ke ankaŭ GDR eldonu informmaterialojn.

Kiel konate, dum la 60aj kaj 70aj jaroj estis certaj konfliktoj inter Ĉinio kaj Sovetunio, kiuj kompreneble rilatis ĉiujn landojn, kiuj estis ligitaj al la gvida hegemonia ŝtatego. La ĉinaj esperantistoj jam tiam eldonis belegajn kaj valorajn literaturaĵojn en Eo, sed ankaŭ grandan lavangon da propagandaj broŝuroj, i.a direktitaj kontraŭ Sovetunio.

1969 mi faris ampleksan analizon pri la esperantlingva eldonagado en Ĉinio kaj ĝin donis al la ministerio por kulturo de GDR. Tiu analizo decide helpis la aperigon de la romanoj 'Nuda inter lupoj' de Bruno Apitz (1974)[36], 'Trigroŝa Romano' de Bertolt Brecht (1977)[37]kaj 'La perdita honoro de iu Katarina Blum' de Heinrich Böll (1978)[38].

8.En ĉiuj socialismaj landoj UNESCO havis altan prestiĝon. Pro tio la rezolucioj favore al Eo el la jaroj 1954 (Montevideo) kaj 1985 (Sofio) estis gravaj argumentoj. Tiu de 1985 ekz. helpis al GDREA konvinki la poŝtministerion eldoni vere luksan poŝtmarkon okaze de la centjariĝo de Eo en 1987. Krome estis facile montreble, ke la kultura politiko de UNESCO, direktita al la internacia interŝanĝo kaj konservo de kulturaj valoroj, estis proksima al la idealoj kaj la praktika laboro de esperantistoj.

9.Grava faktoro por la rekonstruo, stabiligo kaj pluevoluigo de la Eo-movado en la socialismaj landoj estis la principo de reciproka helpo. Tio havis diversajn formojn. Tre gravis ekscii pri iuj atingoj en alia lando por montri al siaj instancoj, kiom postrestinta estis la propra landa organizaĵo kaj ke necesas ion fari. En ĉiuj socialismaj landoj ekzistis timemaj funkciuloj, necertaj pri la ĝusteco de la alprenendaj decidoj. Ili klopodis akiri certecon i.a. per la demando 'kion faras la sovetiaj kamaradoj kaj la aliaj frataj landoj?' Mi tion ofte spertis. Ne ĉiam estis facile atentigi pri grandaj sukcesoj ekz. de sovetiaj esperantistoj. Tamen, ĉiam okazis almenaŭ tiom da aktivaĵoj en Sovetunio, ke pri io eblis atentigi. Tradukitaj broŝuroj de Novosti, eldono de 'Paco', sinkronizitaj filmoj, interlingvistikaj verkoj, eĉ instruado de Eo en lernejoj (en Estonio kaj Litovio) ktp. Al GDREA ankaŭ tre helpis montri, kiom multe pli progresintaj estis la movadoj en aliaj landoj, ekz. en Bulgario, Pollando kaj Hungario.

10.Ligita al la principo de reciproka helpo estis la laŭplana evoluigo de la kunlaboro inter la asocioj de la socialismaj landoj. Estis nedubeble, ke ili donis specifan kaj tre konkretan kontribuon al la plifortigo de la amikeco kaj kunlaboro inter la socialismaj landoj.

Tio apartenis al la oficiala politiko de la landoj kaj sekve estis pozitive akceptita. Al la aktivaĵoj apartenis amikec-kontraktoj, reciprokaj vizitoj de grupoj, materialinterŝanĝo k.s. Pro la fakto, ke Eo estis aparte disvastigita en la socialismaj landoj tie multaj esperantistoj volis korespondi, estiĝis granda kvanto da leterligoj. Anonimaj enketoj montris, ke meze 70% de ĉiuj korespondaj ligoj de GDR-esperantistoj iris al esperantistoj en socialismaj landoj. Tiu grava fakto trankviligis tiujn funkciulojn, kiuj ne tre ŝatis, ke civitanoj de GDR havas kontaktojn al okcidentaj landoj. (La revueto 'der esperantist', 1965-1990, tamen aperigis korespondanoncojn el 58 landoj, jam antaŭ 1989!).

11.Certan helpan rolon ankaŭ ludis la scienco. Interlingvistikaj materialoj pruvis la sciencan valoron de Eo.

Tiu faktoro aparte gravis por Sovetunio kaj por GDR, kaj poste por Rumanio. La interlingvistikaj agadoj kaj publikaĵoj de sovetiaj lingvistoj kiel Evgenij A. Bokarev, Viktor P. Grigorev kaj (iom poste) Magomet I. Isajev, Sergej N. Kuznecov kaj Aleksandr D. Duliĉenko grave helpis la organizadon de interlingvistiko en GDR kaj tiel levis la socian prestiĝon de Eo. La scienca prezento de Eo krome helpis gajni ŝtatajn eldonejojn por publikigi lernolibrojn kaj vortarojn en konsiderinda kvanto.

12.Aparte en GDR, kie la esperantistoj estis organizitaj en kulturorganizaĵo, kies grava tasko estis kontribui al sencoplena interesa libertempo, la kon-

servis en Leipzig kaj estis esperantisto. Krome helpis ekspertizo de la direktoro de la Saksa Esperanto-Instituto, prof. Johannes Dietterle, kiu substrekis la neŭtralan karakteron de Esperanto. Pri la revuo kp. Blanke 1988; Kolbe 1996,I, 44-54.

26. Pri ties historio kp. la iom malsamtendencajn artikolojn de Lins (1987) kaj Blanke(1986). La materialo de Schwarz (1992) donas bonan rigardon en la diskuton, sed mankas precizaj fontindikoj.

27. Pri ISE kp. Lins 2001, p. 58

28. La Komunista Partio de Germanio havis intensajn ligojn al Sovetunio kaj ofte sendis delegaciojn al Moskvo.

29. En Moskvo aperis dua esperanta eldono kun postparoloj de Sergej N. Kuznecov kaj de mi (Lins 1990, p. 532-552). Ruslingva eldono de la libro intertempe ankaŭ aperis en Rusio.

30. Herbert Wohlfahrt certan tempon vivis en GDR. Dum la unua fazo de la rekonstruo de la Eo-movado en GDR post 1965 li eĉ fariĝis prezidanto de distrikta organizaĵo en Magdeburg. La materialoj de Ulrich Lins rezultigis, ke Wohlfahrt perdis sian funkcion. Meze de la 70aj jaroj li forlasis GDR kaj ekloĝis en la Germana Federacia Respubliko.

31. Germana mallongigo por 'Sturmabteilung', milico de la nazia partio.

32. Stranga koincido: Kiel knabo mi legis germanlingvan libreton, tradukitan el la rusa, kun la titolo 'La nuksekspedicio'. La aŭtoro estis David L. Armand.

33. Kp. Aĥmanova/Bokarev 1956. Evgenij Bokarev, fama kaŭkazisto estis la vicdirektoro de la Instituto pri Lingvistiko ĉe la Sovetunia Akademio de Sciencoj kaj per sia raporto antaŭ la Akademio pri Eo donis gravajn impulsojn al la refondo de la movado en USSR. Li ankaŭ estis

kreta agado de la esperantistoj pli kaj pli montris, ke la okupiĝo pri la lingvo, ĝia lernado kaj aplikado estis originala kontribuo al tiu celo, ĉar ĝi estis elemento de altkvalita kultura agado kaj pliprofundigis ĝeneralan fremdlingvan kleron. Aparte dum la 80-aj jaroj tio en si mem en GDR estis tute pozitive akceptita.

13.De granda signifo, aparte por la intensiviĝo de la internaciaj rilatoj, estis la procezo de paca kunekzistado (la 'Helsinki-procezo'), kiu trovis sian unuan kulminon en la Konkluda Akto de Helsinki (1976), de kiu ekzistas traduko en Eo.[39] Laŭ la koncepto de paca kunekzistado de malsamaj socialistaj sistemoj, kiun subtenis la socialistaj landaj registaroj, al ties taktiko ne plu apartenis komunista internacio. Gravis kunlabori laŭ la internacie akceptitaj normoj. Tio estis bona argumento por agado ne nur en MEM, sed aparte ankaŭ en UEA kaj TEJO kaj ebligis pli kaj pli doni valoran kontribuon al la realigo de la celoj de tiuj asocioj. Tio ankaŭ klarigas la ne tre grandan entuziasmon, kiun renkontis la klopodoj de iamaj laboristaj esperantistoj reaktivigi iun certan IPE, kio trovis sian esprimon en la Internacia Komunista Esperanto-Kolektivo (IKEK) kun sia organo 'Internaciisto'. Kiel jam menciite mi konatiĝis kun multaj IPE-anoj kaj admiris la laboron de la iama IPE. Sed reaktivigo al mi ŝajnis kontraŭ la historia situacio. La anoj de IKEK estis seniluziigitaj. Tamen IKEK kaj ties anoj ja estis estimataj en la socialismaj landoj kaj almenaŭ ricevis certan teknikan subtenon kvankam ne fortan politikan. BEA havis pli aktivan rilaton al IKEK ol ekz. GDREA, kion kelkaj kamaradoj ne komprenis. Mi ofte pledis por la eldono de altkvalita moderna marksisme orientita socia revuo (komparebla al 'Monato'). Kvankam la propono trovis subtenon, ĝi neniam realiĝis kaj verŝajne estis nerealisme ambicia.

14.Kaj ne laste, kiel tipe por ĉiu ajn sukcesa esperantista agado, necesis persona engaĝiĝo, kuraĝo, elasteco kaj lerteco de la agantoj sur ĉiuj niveloj de la laboro, por eluzi la diversajn ŝancojn donitajn kaj por eviti kaptilojn kaj danĝerojn.

4.3 La famaj Konsultiĝoj

Tre grava faktoro por stabiligo kaj pluevoluigo de la movadoj en la orienteŭropaj landoj estis la sistemo de regulaj konsultiĝoj. Dum la proceso de la plifortiĝo kaj pliintensiviĝo de la kunlaboro de la socialismaj landoj, aparte de la ŝtatmembroj de la Konsilantaro por Reciproka Ekonomia Helpo, ne nur en la kampoj de ekonomio, sed ankaŭ sur la terenoj de kulturo, scienco, turismo k.a., estiĝis pli malpli regulaj ligoj inter la koncernaj partneraj instancoj, institucioj aŭ organizaĵoj. Elemento de tiuj ligoj estis regulaj kunvenoj, dum kiuj reprezentantoj de la koncernaj landoj traktis pri komunaj problemoj.

Pro tio hungaraj esperantistoj lanĉis la ideon organizi iun renkontiĝon de funkciuloj de la socialismaj landoj Eo-organizaĵoj por interŝanĝi spertojn kaj priparoli komunajn problemojn de la laboro. Tiu unua renkontiĝo okazis en la jaro 1969 en Budapest. Ĝi ricevis la nomon 'konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj'. Sekvis pluaj tiaj aranĝoj, kaj tiel establiĝis firma sistemo de la konsultiĝoj. Ili kutime daŭris tri ĝis ses tagojn, depende de eventuala turisma programo. Ili okazis dum printempo, do antaŭ la Universalaj Kongresoj. Tiel eblis trakti pri komunaj starpunktoj pri la agado en UEA kaj dum la kongresoj.

De 1969 ĝis 1989 okazis entute 22 konsultiĝoj: 1969-'70-'73-'79-'87 (Hungario), 1971-'77-'84-(GDR), 1972- '85 (Bulgario), 1974- '80 (Sofio), 1975-'81- '88 (Ĉeĥio), 1976- '83 (Pollando), 1978- '86 (Slovakio), 1976- '82- '89 (Sovetunio).

Partoprenis regule la delegacioj de jenaj organizaĵoj: Bulgara Eo-Asocio (BEA), Ĉeĥa Eo-Asocio (ĈEA), Eo-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA), Pola Eo-Asocio (PEA), Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko (AESSR), Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj (en la Unuiĝo de Sovetiaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlandoj, ekde 1979: Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, ASE). Delegito(j) de Vjetnama Pacdefenda Eo-Asocio (VPEA) partoprenis la 12-an, 13-an, 15-an, 18-an, 19-an kaj 22-an konsultiĝojn. Delegito de Kuba Eo-Asocio (KEA, fondita en 1979) partoprenis la 18-an kaj la 22-an. La 12-an partoprenis observanto de Jugoslavia Eo-Ligo kaj la 18-an private partoprenis rumano.

La konsultiĝoj kompreneble estis esence konfidencaj. Tio necesis por

prezidanto de la Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj, el kiu poste estiĝis ASE. Bokarev i.a. aŭtoris la unuajn postmilitajn vortarojn de Eo por rusoj, kiuj ĝis la nuntempo restis nesuperitaj.

34. Kp. Lenin-Werke, 40 vol., Berlin: Dietz, 1955-1965, vol. XIX, p. 75

35. La unua Eo-organizaĵo de GDR en 1965 nomiĝis 'Centra Laborrondo de la Eo-amikoj en Germana Kulturligo', poste 'Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR'. Fakte tio estis la gvidantaro, ĉar ankaŭ ekzistis subigitaj unuoj (distriktaj kaj subdistriktaj laborrondoj, grupoj). Tiu organiza strukturo transformiĝis 1981 en GDREA.

36. La eldonkvanto de 'Nuda inter lupoj' estis 8000 ekzempleroj, kiu i.a. pro grandkvantaj antaŭmendoj el la socialismaj landoj elĉerpiĝis post ĉirkaŭ unu jaro. La romanon tradukis Karl Schulze el orienta Berlin, ne miksenda kun Rikardo Ŝulco. Karl Schulze ankaŭ tradukis ambaŭ partojn de Fausto (Goethe), kiuj aperis 1999.

37. La romanon ankaŭ tradukis Karl Schulze kaj ĝin eldonis Edition Leipzig. Parton ĝi presis por la okcidentgermana Eldonejo Bleicher Gerlingen. Do temis pri valuta negoco.

38. Traduko de Rikardo Ŝulco. Ĝi aperis kontraŭ kelkaj ekspertizoj, i.a. de Gaston Waringhien kaj mi. Ni forte kritikis la tradukon. Sed la volo de Edition Liepzig gajni valuton estis pli forta. La libro ankaŭ aperis kun kvanto por la Eldonejo Bleicher.

39. Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo. Bratislava: Ĉeĥoslovaka Packomitato, Slovaka Packonsilantaro, 1976, 86 p.

40.Kp. der esperantist (Berlin) n-ro 144 (4/1987)

41. Kp. der esperantist (Berlin) n-ro 148 (2/1988)

ne semi konfuzon inter okcidentaj esperantistoj. Tamen la komunikoj foje entenis certajn informojn. Detalajn informojn pri la rezultoj oni povis legi pri la 20-a (1987, Budapeŝto) [40], 21-a (1988, Poprad) [41] kaj la 22-a (1989, Moskvo) [42].

Apenaŭ alia grupo de asocioj tiom intensive klopodis labori por Eo, kompreneble laŭ siaj specifaj kondiĉoj, eblecoj kaj limigoj. La 22-a konsultiĝo, 1989 en Moskvo, ne plu estis konfidenca. Unuan fojon partoprenis reprezentantoj de UEA, nome ties vicprezidanto Yosimi Umeda kaj la ĝenerala direktoro de la Centra Oficejo, Simo Milojeviĉ. Tio signalis la grandajn antaŭstarantajn ŝanĝojn. La konsultiĝojn ĝenerale partoprenis la prezidantoj, sekretarioj kaj reprezentantoj de la respektivaj junularaj organizoj.

La ĉefajn celojn de la konsultiĝoj mi rezumas jene:

-plifirmigi, pliprofundigi kaj kunordigadi la ĉiuflankan kunlaboron inter la asocioj, tiel kontribuante sur specifa tereno al la amikeco kaj kunlaboro de la socialismaj landoj

- reciproke informiĝi pri la stato de la landaj movadoj kaj interŝanĝi spertojn pri pli efika landa kaj internacia agadoj

- interkonsenti pri bazaj problemoj de strategio kaj taktiko de la Eo-movado en la socialismaj landoj kaj pri kiom eble komuna agado en MEM, UEA, TEJO kaj en aliaj Eo-organizaĵoj, aparte lige al elektoj de estraroj kaj komitatoj kaj pri la dumkongresa aktivado

Tiujn ĉefajn celojn la konsultiĝoj principe atingis.

La ampleksaj tagordoj de la konsultiĝoj inkludis konkretan traktadon de problemoj de la movada organizado, transigo de valuto-problemoj inter Oriento kaj Okcidento, varbado, instruado en lernejoj, scienc-teknika apliko, interlingvistiko/esperantologio, junulara agado, eldonagado, preparo de diversaj aranĝoj k.s. Kompreneble oni ne nur traktis multajn strategie gravajn temojn, sed ankaŭ interŝanĝis opiniojn pri tute konkretaj problemoj de la siatempa movado. Tio ekz. rilatis al la fondo de asocioj en tiuj landoj, kie ili mankis.

La konsultiĝoj supozeble pozitive influis la fondon de la sovetia kaj kuba asocioj. Oni kompreneble interŝanĝis siajn vidpunktojn pri la okazigo de kongresoj de UEA kaj de TEJO en iu socialismaj landoj. La konsultiĝoj grave subtenis GDREA-n, kiu dum la unuaj jaroj estis nesperta pri UEA kaj kiu ricevis fortan helpon, kiam ĝi en 1976 volis aliĝi kiel landa asocio al UEA (subtenon ankaŭ ricevis la asocioj Ĉeĥa kaj Slovaka en 1970 kaj Kuba 1983). Ne malofte la konsultiĝoj helpis prepari la aktivadon de sovetiaj delegitoj dum la kongresoj, kio ne ĉiam estis facila. Ja ASE ne aliĝis al UEA. Ankaŭ la komuna sinteno al Ivo Lapenna ludis rolon. Ofte temis pri la solidareco kun Vjetnamio. La partoprenon de vjetnama delegito en la konsultiĝoj, sed ankaŭ dum la kongresoj plurfoje pagis socialismaj landoj asocioj, aparte la bulgara kaj hungara asocioj. Ke en Vjetnamio dum la milita tempo povis aperi pli ol 70 titoloj, ankaŭ estis faciligita per la subteno de la socialismaj landoj asocioj.

Pri ĉiu konsultiĝo aperis komuniko, kiu tamen ĝenerale ne multon diris pri la traktita enhavo. Iom post iom fariĝis kutimo, ellabori internajn rekomendojn por la landaj asocioj.

Oni devas substreki, ke neniu diktis ion ajn al la landaj asocioj, eĉ ne Moskvo. Eĉ kontraŭe, la konsultiĝintaj asocioj ofte estis iom malfeliĉaj pri la tre limigitaj eblecoj de la sovetiaj partoprenantoj kontribui ion substancan al la kunlaboro. Ne ĉiam partoprenis kompetentaj kaj bone informitaj delegitoj. La kolegoj el la socialismaj landoj intensive kaj daŭre klopodis konvinki la sovetian asocion, ke estus utile finfine aliĝi al UEA - sensukcese. Intertempe ni estas pli bone informitaj pri la internaj malfacilaĵoj, malfidoj kaj bremsoj, kiujn devis elteni la sovetia movado kaj ĝiaj reprezentantoj. Necesas substreki, ke la asocioj estis absolute liberaj, konsideri aŭ ne konsideri la interŝanĝitajn spertojn kaj la akceptitajn rekomendojn. Pro tio multaj bonaj ideoj kaj rekomendoj restis nerealigitaj, aliaj realiĝis.

Sed ĉiukaze raportoj pri la konsultiĝoj antaŭ hejmaj aŭtoritatoj tre helpis al la asocioj. Bona efiko estis la pli intensiva konatiĝo inter la gvidaj aktivuloj de la asocioj, kio grave subtenis la kunlaboron.

Sendube la konsultiĝoj estis fortiga kaj evoluiga elemento por la agado de

42. Kp. der esperantist (Berlin) 156 (4/1989)

43. Mi skribas 'interalie', ĉar ne eblas mencii ĉiujn elstarajn sovetiajn esperantistojn, kiuj malgraŭ ĉiuj obstakloj faris vere mirindan agadon kaj eldonis 'zamisdatojn' (sen licenco eldonitajn presaĵojn).

44. Universala Esperanto-Asocio en la periodo 1970-1980. Tekstoj de la konkurso de la Premio Miyoshi 2001. Kalmthout: Sonorilo, redaktita de Perspektivo. Studgrupo pri internacia lingvo (t.e. Wim M.A. De Smet), 80 p.
La libro enhavas kontribuojn de Dimitrij Cibulevskij (Charkiv/Ukrainio), Nikola Aleksiev (Sofio/Bulgario), Wim M.A. De Smet (Kalmthout/Belgio) kaj Gregoire Maertens (Brugge/Belgio).

7. Literaturo

Axhmanova, Olga S./ Bokarev, Evgenij A.(1956): Mezdunaronyj vspomogatel'nij jazik kak lingvistiĉeskaja problema. En:Voprosy jazykoznanija (Moskvo), Vol. V, N-ro 6, p. 65-78 (internacia helplingvo kiel lingvistikaj problemoj)

Aleksiev, Nikola (1980): Petdeset godini/Kvindek jarojn Bulgara Laborista Esperanto-Asocio 12.07.1930-12.07.1980. Sofia: Bulgara Esperanto-Asocio, 40p.

Barna, Zoltán (1986): La laborista Esperanto-movado en Hungario (1913-1934). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 184 p.

Blanke, Detlev (1984): Renkontiĝo kun Grigorij Demidjuk. En: der esperantist, 20, N-ro 123 (1), p. 5-7 (kun bibliografio de la verkaro de Demidjuk)

Blanke, Detlev (1986, Red.): Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado. Budapest: Hungara Esperanto-asocio (2-a eld., unua 1978), 228 p.

Blanke, Detlev (1986): La Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE). En: Blanke 1986a, p. 50-62

la asocioj de la socialismaj landoj. Ili ankaŭ havis stabiligan efikon al UEA post la problemoj lige al Ivo Lapenna. Oni tamen devas vidi, ke ilia signifo estis malsama por la unuopaj asocioj. Kiom tio validas, devus juĝi la iamaj kolegoj de la aliaj asocioj.

Estas ĝojinde konstati, ke la ideo de regulaj konsultiĝoj pluvivas. Ilin okazigadas la mezeŭropaj asocioj, el kiuj la plej multaj venas el la iamaj socialismaj landoj.

4.4 Kelkaj problemoj kaj tabuoj

Malgraŭ certaj komunaj interesoj de la asocioj de la socialismaj landoj, la historiaj radikoj, la laboreblecoj kaj la sintenoj pri difinitaj problemoj estis tre diversaj, same kiel en la granda politiko. Do skribante pri 'problemoj' kaj 'tabuoj' mi konscias, ke iuj problemoj kaj tabuoj en unu lando ne devis same gravi en alia lando. Mi elektas ses, kiuj al mi ŝajnas aparte gravaj:

1.En Bulgario, Hungario kaj Pollando Eo oficiale estis instruita en la lernejoj, por GDR neimagebla, kvankam ja ekzistis Eo-cirkloj en la posttagmezaj programoj de kelkaj lernejoj kaj Eo-feriadoj por infangrupoj. Ankaŭ en Soveta Unio mem regis malsamaj kondiĉoj en la unuopaj respublikoj. Kio eblis en la Estona Sovetia Respubliko (ekz. instruado de Eo en lernejoj) en la Rusa Federa Respubliko ne povis realiĝi. En GDR la rusa lingvo havis tian privilegian situacion, ke necesis tre atenti kaj ne prezenti Eon kiel konkuranton. La ministrino por popola klerigado ja estis Margot Honecker, la edzino de la ŝtatĉefo…

2.Aparte malagrabla por GDR-esperantistoj estis la manko de liberaj vojaĝoj al Eo-aranĝoj. Ankaŭ la raportoj pri la Universalaj Kongresoj, en kiuj eblis legi pri multnombra partopreno ekz. el Bulgario, Hungario kaj Pollando, foje ankaŭ el Ĉeĥoslovakio nenion helpis. Tio iom ŝanĝiĝis post 1985.

3.La klopodoj kunlabori kun sovetiaj esperantistoj ofte estis tre unuflankaj. Estis facile inviti sovetiajn gastojn, sed ili malfacile ricevis vojaĝpermeson. Ni ja sciis pri la komplikaĵoj kaj klopodis diversmaniere helpi. Grandaj kvantoj da gazetoj estis senpage senditaj i.a. el Bulgario, Hungario kaj GDR al sovetiaj Eo-grupoj kaj unuopuloj. Mi ĝojis, kiam dum lastatempaj renkontiĝoj kun ekssovetunianoj ili tion pozitive aprezis. Ni ofte tenis neoficialajn rilatojn kun unuopaj esperantistoj kaj grupoj, preter la Eo-Komisiono kaj ASE, por pli bone kompreni la komplikan situacion kaj por povi konvene helpi. Kelkaj alte estimataj esperantistoj, ekz. Semjon N. Podkaminer, tute ne estis ŝatataj ĉe la sekretarioj de la sovetiaj Eo-organizaĵoj. Ni demonstre honorigis kaj laŭdis lin, publikigis pri li artikolojn k.s. Ke kelkaj funkciuloj de la socialismaj landoj asocioj ne estis ŝatataj de siaj profesiaj kolegoj, inter ili mi, estis komprenebla kaj rigardebla kiel certa distingo. Ni ja honeste kaj konvinkite laboris por Eo. Iuj sovetiaj sekretarioj de Eo-Komisionoj aŭ poste de ASE evidente ne vere havis pozitivan sintenon al la movado. Ĉe ni kreskis la impreso, ke ili kaj ne emis agadi por Eo kaj samtempe estis katenitaj de siaj ĉefoj. Duobla handikapo. Al ili ne nur mankis akceptebla lingvo-nivelo sed ankaŭ reputacio ĉe la sovetiaj esperantistoj. Intertempe pli bone konante la malfacilajn sovetiajn regulojn koncerne al Eo, oni eble povas esti iom indulgema.

Aliflanke necesas elstarigi la bonegan kaj foje riskan agadon de multaj sovetiaj esperantistoj, kiuj siaflanke ankaŭ helpis al la socialismaj landoj. Krom jam menciitajn inter ili mi ankaŭ kalkulas - interalie (!)[43] Vladimir Samodaj, Magomet Isajev kaj Boris Kolker. Isajev kiel prezidanto de ASE ne havis facilan pozicion. Sed lia scienca agado ne estis neglektinda. Ankaŭ mi persone multon dankas al li. Lia laboro ne ĉiam estis bone taksita de nur praktike orientitaj movadanoj, kiuj mezuris laŭ aliaj kriterioj. Retrorigarde oni devas konsideri la grandegajn malfacilaĵojn, kontraŭ kiuj sovetiaj esperantistoj devis batali (kp. Cibulevskij 1994; 2000; Bronŝtejn 1998, Samodaj 1999).

4.Malgraŭ la fakto, ke SAT en la historio de la Eo-movado estis la ĉefa laborista Eo-organizaĵo kun grava tradicio, ĝi ne estis subtenita en la socialismaj landoj. Tio estis bedaŭrinda rezulto de la malvasthorizonta aliro al la problemo de kritiko en la socialismaj landoj, tipa por la ĉi-rilata sociordo. Kvankam mi tion hodiaŭ rigardas kiel grandan eraron, siatempe ne ekzistis alia ebleco. En la unuopaj landoj kritikon kontraŭ Soveta Unio kaj kontraŭ la socialisma sistemo entute oni mal-

Blanke, Detlev (1988): La gazeto 'Völkerspiegel'. En Colić, Senad (1988, Red): Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado. Kolekto de referaĵoj. Sarajevo: Esperanto-Unio de Bosnio kaj Hercegovino (136p), p. 59-63

Blanke, Detlev (1990): Pri Esperanto en GDR (1945-1990. Skizo de la historio de GDREA: En: Der Esperantist 26, N-ro 164(6), p. 121-137 (ekzistas germana traduko de Ino Kolbe)

Blanke, Detlev (1993): Auswahl-bibliographie zur Erforschung der Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung. Elekta bibliografio pri esploroj pri la historio de la laborista Esperanto-movado. En: Noltenius 1993, p. 92-101

Blanke, Detlev (1993): Germana Laborista Esperanto-Asocio 1911-1933. Historia skizo. Der Deutsche Arbeiter-Esperanto-Bund 1911-1933. Eine historische Skizze. En: Noltenius 1993, p. 19-43

Bociort, Florian (1998): La intelektularo, tiu grava, forgesita forto...Strategiaj konsideroj. En: Informilo por Interlingvistoj, 7 (tria serio), n-ro 24 (1), p. 1-9

Bronŝtejn, Mikaelo (1998): Legendoj pri SEJM. Moskvo: Impeto, p.112

Cibulevskij, Dimitrij M. (1994): SEJM. Historia skizo. Moskvo: Impeto, p. 204.

Cibulevskij, Dimitrij M. (2000): ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj). Historiaj notoj. Ĥarkiv: La aŭtoro, p. 384.

Fernandez, Alberto (2002): La ideologia stumblo inter socialismo kaj internacia lingvo. En: Internaciisto, 10, 2/2002 (56), p. 2-5 (bedaŭrinde la redakcio ne publikigis la literaturliston-DB).

facile toleris. Kaj post la skismo de LEM SAT ja havis tre kritikan sintenon al Sovetunio. Krom tio en kelkaj socialismaj landoj tiuj iamaj laboristaj esperantistoj havis influon, kiuj estis komunisma-tendencaj iamaj membroj de IPE.

5.Tabua temo en la socialismaj landoj ankaŭ estis la persekutoj sub Stalin, pri kiuj Ulrich Lins verkis studojn kaj ĉapitron en 'Esperanto en Perspektivo' (1974). Liaj libroj aperis nur en 1988. Ke ne estis oportune skribi aŭ publike paroli pri tiuj persekutoj, okcidentaj esperantistoj post la lego de ĉi tiu eseo eventuale pli bone komprenos. Post la faligo de Ĥruŝĉov la krimoj de Stalin kiel temo pli kaj pli malaperis el la publikaj komunikiloj. Oni distordis la historion favore al liaj 'meritoj' kaj nur perifere menciis liajn 'erarojn'. La kontraŭkritika atmosfero estis tia, ke prezento de la krimoj de Stalin povis esti interpretita kiel kontraŭsovetia k.s. Tamen, ni kolektis ĉiun eblan ĉi-rilatan materialon, por havi - se necese - materialon por averti kontraŭ ripeto de pezaj eraroj.



6.Fine de la 60aj jaroj, aparte en rondoj de TEJO, estis diskutoj pri lingva demokratio kaj lingvo-imperiismo. Tiuj diskutoj estis direktitaj kontraŭ la hegemonia rolo de la grandaj lingvoj, aparte kontraŭ tiu de la angla, sed ankaŭ de la franca kaj rusa. Paroli pri la rusa en la rilato kun lingva imperiismo estis tikla afero por esperantistoj el la socialismaj landoj asocioj. Sekve oni (kaj ankaŭ mi mem) substrekis la samrajtecon de la 130 lingvoj en Sovetunio kaj la sendube grandajn lingvoplanadajn aktivaĵojn, aparte dum la tempo de Lenin. Ke tio tamen estis nur unuflanka prezento kaj ja necesintus vidi la hegemonian rolon de la rusa, mi hodiaŭ devas konfesi.

Denove atentigante pri la diferencoj en la unuopaj socialismaj landoj, pri fortecoj kaj malfortecoj, mi taksas, ke la politike plej liberala klimato por la evoluo de la movado verŝajne regis en Hungario kaj Pollando.

4.5 Pri la komunista puĉo kontraŭ Ivo Lapenna

UEA kun sia junulara asocio TEJO estis la ĉefaj internaciaj Eo-organizaĵoj, kun kiuj kunlaboris la socialismaj landoj asocioj. Tiu kunlaboro sub la gvidado de Ivo Lapenna (ĉu kiel ĝenerala sekretario ĉu poste kiel prezidanto) dum certa tempo estis senproblema, aparte por la jam frue aliĝintaj asocioj kiel la bulgara, hungara kaj pola. La statute postulita neŭtraleco de ĉiu aliĝinta landa asocio (do ne nur de UEA) baris la vojon al la novaj asocioj en Ĉeĥoslovakio kaj GDR, ne parolante pri la sovetia movado. Lapenna estis akceptita kaj estimata kiel unu el la ĉefaj motoroj de UEA post la Dua Mondmilito. Bedaŭrinde li ne komprenis la historiajn ŝanĝojn kaj la deziron de la asocioj el la socialismaj landoj ludi en UEA rolon konvenan al ilia intertempe atingita kvalito kaj kvanto. Ankaŭ la persona kulto pri li ne ŝajnis vere utili al li. En nekrologo por 'der esperantist' (24 [1988] 2 [148], p.42) post prezento de liaj meritoj (i.a. modernigo de UEA, seriozigo de informado pri Eo, modela parola stilo, CED kaj la lingvistika revuo 'La Monda Lingvo-Problemo') mi skribis:

'La meritoj de Ivo Lapenna estas sendubaj. Neniu serioza esperantisto povas aŭ volas ilin nei. Sed bedaŭrinde fine de la 60-aj kaj komence de la 70-aj jaroj kreskis kontraŭdiroj inter li kaj ne malgrandaj partoj de la gvidantaro de la internacia Esperanto-Movado. Nekompreno pri la ŝanĝiĝinta internacia monda situacio, pri la bezonoj de UEA al pli vasta universaleco, troa sentemo rilate al objektiva kritiko, certa pensmaniero influita de la 'malvarma milito' kondu-

Fiedler, Sabine/Liu, Haitao (2001): Studoj pri interlingvistiko. Studien zur Interlinguistik. Festlibro por/ Festschrift für Detlev Blanke, Dobricichovice (praha) KAVA-PECH, 736p.

Jankova - Bojaĝieva, Maria T. (1983): La bulgara revolucia esperanta gazetaro dum la periodo 1929-1934. Sofia: Bulgara Esperantista Asocio, 78p.

Kolbe, Ino (1996): Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes in Leipzig. Teil I und II von den Anfängen bis zum Verbot 1933. Teil I: Von den Anfängen bis zum 'Völkerspiegel' (1924), 64+VIII p; Teil II: 1925-zum Verbot (1933) Eine kommentierte Dokumentation. herausgegeben, kommentiert und bearbeitet von Detlev Blanke. Leipzig: Landesverband Sachsen des Deutschen Esperanto-Bundes, 135+24 p.

Kuznecov, Sergej N. (1991): Drezen, lia verko, lia epoko. En: Drezen, Ernest K. (1991): Historio de la Mondolingvo. Tri jarcentoj da serĉado. Kvara Esperanto-eldono, (red. kaj komentis S. Kuznecov), Moskvo: Impeto (455 p.), p. 3-40

Lenin, Vladimir I. (1951): Kritische Bemerkungen zur nationalen Frage. Berlin: Dietz

Lins, Ulrich (1987): Marxismus und Internationale Sprache. En: Duc Goninaz, Michel (1987, Red.): Studoj pri la internacia lingvo. Etudes sur la langue internationale. Studies on international language. Gent: AIMAV (155 p.), p. 26-39

Lins, Ulrich (1987): La baraktoj de IPE. Ĉapitro el la historio de la laborista Esperanto-movado. En: Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. Vo. II. Esperantismo, La Laguna: Universidad de la Laguna (790 p.), p. 353-369

Lins, Ulrich (1988): Die gefährliche Sprache.Die Verfolgung der Esperantisten unter Hitler und Stalin. Gerlingen: Bleicher, 326 p.

kis lin en direkton, kiu finfine bremsis la pluan evoluon de la asocio. 1974, dum la 59-a Universala Kongreso en Hamburgo, vidante ke li ne plu havos ŝancon esti reelektita kiel prezidanto de UEA, li eĉ malmembriĝis. Li poste agadis en la tiel nomata 'Neŭtrala Esperanto Movado', kiu havis sufiĉe dekstrajn poziciojn kaj tute ne estis 'neŭtrala'. Tiuj liaj miskomprenoj kaj misjuĝoj dum la lasta periodo de lia esperantista agado apartenas al lia persona tragiko. Sed ili neniel povas dubindigi lian eksterordinare grandan kaj altkvalitan kontribuon, kiun li donis al la postmilita evoluo de Esperanto kaj de ĝia parolantaro'.

Al la artikolo mi aldonis bibliografion kun 14 el liaj verkoj.

La konfrontiĝo inter la blokoj finiĝis. Kaj estas tute en ordo, ke lia foto nun pendas en prestiĝa loko de la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam.

Bedaŭrinde lastatempe fojfoje reaperas la absurdaj asertoj pri 'komunisma puĉo' kaj diversaj presaĵoj, kiuj personkulteme troglorigas Ivo Lapenna kaj ne vere servas al konvena memoro pri li. La artikolkolekto de la grupo Perspektivo prave relativigas kelkajn nedefendeblajn asertojn.

Ni do restu ĉe la historiaj faktoj: Tiom longe, kiam ne ekzistis vera alternativo al la prezidanto Lapenna, estis ĝuste la reprezentantoj de la socialismaj landoj asocioj, kiuj pledis por lia reelekto, tiel Nikola Aleksiev dum la 56-a UK 1971 en Londono, kiam la kontraŭkandidato estis E.L.M. Wensing, kiu sendube gajnintus la elektojn, se la socialismaj landoj komitatanoj estus voĉdonintaj por li. (Wensing akiris 21 voĉojn, Lapenna 26, kun tri sindetenoj, kp. Perspektivo 2002, p. 36). Eĉ se la komitatanoj de la socialismaj landoj volintus 'faligi Lapenna', ili ne sukcesintus. Dum la komitataj kunsidoj de la 59-a UK 1974 en Hamburgo aperis 49 komitatanoj kaj estis elektitaj 13 C-komitatanoj, do entute partoprenis 62 voĉdonrajtaj komitatanoj. De tiuj nur 18 venis el la landoj de la konsultiĝoj. Post kiam fariĝis klare, ke kandidatos Humphrey Tonkin, ili voĉdonis por Tonkin. Tio estis unu opozicia grupeto. La du aliaj estis opoziciantoj de TEJO kaj homoj nekontentaj pri la gvidstilo de Lapenna.

Sub la prezidanteco de Tonkin la statuto de UEA estis adaptita al realaj bezonoj. Tio signifas, ke la landa asocio, kiu intencis aliĝi al UEA, ja devis respekti la neŭtralecon de UEA, sed ne mem esti neŭtrala. Siajn internajn bezonaĵojn la landaj asocioj mem reguligu. Tio - sub la tiamaj politikaj kondiĉoj - ebligis la aliĝon al UEA de la asocioj de GDR, Ĉeĥio, Slovakio, poste ankaŭ de Kubo (kaj verŝajne ankaŭ de Ĉinio).

Se jam temas pri meritoj por UEA, estus tempo, elstarigi la gravajn meritojn de Humphrey Tonkin en la periodo post Lapenna, kiu ne nur kapablis gvidi UEA el la malfacila situacio, sed ankaŭ sciis harmonie kunlabori kun la diverstendencaj landaj asocioj, en reciproka respekto. Sub lia saĝa kaj energia prezidanteco UEA kapablis valortaksi kaj uzi la konsiderindan potencialon de la socialismaj landoj Eo-asocioj por la bono de UEA. Kaj la asocioj en UEA mem havis la eblecon kunlabori en normala atmosfero. Estis reciproka utilo. Tiu politiko ankaŭ estis daŭrigata sub la prezidanteco de Gregoire Maertens.

Cetere, mi bone komprenas, ke Ivo Lapenna siatempe ne estis feliĉa pri la intencoj de la Eo-organizaĵo de GDR aliĝi al UEA. Ja restas fakto, ke okazis malagrabla kaj politike absolute stulta prezentiĝo de GDR-diplomato dum la solena inaŭguro de la 51-a UK 1966 en dialekta esperantisto, kiu lingve estis kompleta katastrofo kaj aldone faris malfeliĉan impreson. Dum la sekvaj kongresoj, kiujn partoprenis delegitaroj de GDREA, por UEA ne plu estis apartaj kialoj por plendi. Sub la saĝa gvido de la prezidanto de GDREA kaj profesia diplomato Rudi Graetz ni rapide lernis moviĝi sur diplomatia parkedo kaj komprenis la neceson respekti la neŭtralecon de UEA al reciproka bono.

4.6 *Kelkaj atingoj*

Retrorigardante la evoluon de Eo en la eŭropaj socialismaj landoj, kun la menciitaj esceptoj, oni povas konstati, ke ĝuste en tiuj landoj, kie pro la stalinismo antaŭe la kondiĉoj por Eo estis malfavoraj, la Eo-movado faris konsiderindan evoluon kaj atingis relative bonan socian prestiĝon. Kvankam la movado havis la menciitajn limigojn, laŭ kelkaj aspektoj ĝi kvante kaj kvalite superis la movadon en la okcidentaj landoj. Al la monda movado ĝi donis sian kontribuon, kiu estas rimarkebla ĝis hodiaŭ, malgraŭ la grava malfortiĝo, kiu okazis pro la tranĉaj politikaj ŝanĝoj post 1989.

Se oni rigardas la tutan teritorion de la socialismaj landoj - kun ĉiuj

Lins, Ulrich (1988): La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Gerlingen: Bleicher, 546 p. (dua eldono, Moskva: Progreso, 1990 568 p., (kun postparoloj de Detlev Blanke kaj Sergej N. Kuznecov)

Lins, Ulrich (2001): Internacio de Socialistaj Esperantistoj, ISE. En: Callesen, Gerd (2001, Eld.): Socialist Internationals - A Bibliography. Bonn: Bibliothek der Friedrich-Ebert-Stiftung

Noltenius, Rainer/Stephan, Albert (1993, Red.): Den Arbeitern aller Länder eine Sprache! Illustrierte Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung.
Al la laboristoj en ĉiuj landoj unu lingvon! Ilustrita historio de la Laborista Esperanto-Movado. Informationen 37/93. Katalog zur Ausstellung des Fritz-Hüser-Instituts Dortmund. Dortmund: Fritz-Hüser-Institut für deutsche und ausländische Arbeiter-Literatur, 113 p. (la kontribuoj aperas en la germana kaj en Esperanto)

Perspektivo (2002). Universala Esperanto-Asocio en la periodo 1970 - 1980. Tekstoj de la konkurso de la Premio Miyoshi. Kalmthout: Sonorilo, 80 p.

Podkaminer, Semjon N. (1996): Lenin kaj Esperanto. En: Blanke 1986a, p. 31-49

Samodaj, Vladimir (1999): Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM. Homoj kaj epizodoj. Moskvo: Impeto, 175 p.

Schwarz, Adolf (1992): Survoje al Internacio de Proleta Esperantistaro. Faktoj, dokumentoj, rememoroj. Sofio: Pres-Esperanto, 223 p. (fakte finredaktita de N. Aleksiev)

Stalin, Iosif V. (1992): Marksismo kaj lingvoscienco.[Kun enkonduko de Ulrich Lins]. Jekaterinburg: Sezonoj, 42 p.

Stepanov, Nikolao (1990): La vivo kaj morto de Vladimir Varankin 1902-1928. En: Hungara Vivo N-ro 1, p.25-31, N-ro 2, p.56-57

jam menciitaj diferencoj - oni povas mencii, certe nekomplete, jenajn ĉefajn atingojn:

- relative fortaj asocioj, (ses socialismaj landaj asocioj konsistigis ĉ. 45 % de ĉiuj kolektivaj membroj en UEA)

- relative stabila organiza strukturo kun profesiaj oficejoj, kulturdomoj kaj aliaj entreprenoj

- konsiderinda ŝtata subvencio

- bona sistemo de kunlaboro inter la asocioj

- vigla eldonagado (literaturo kaj revuoj en relative altaj eldonkvantoj)

- relative vasta instruado en lernejoj kaj en aliaj kadroj

- eldono de bonkvantaj instrumaterialoj kaj vortaroj en ŝtataj eldonejoj

- kursoj en universitatoj (parte lektoratoj)

- konsiderinda evoluo de interlingvistiko/esperant-ologio en universitataj kadroj

- faka apliko (aparte aktiva rolo en fakaj asocioj)

- kunlaboro kun neesperantistaj partneroj (politikaj, fakaj, sociaj)

- turismo (en 1988 de 433 ofertoj de la turisma kalendaro de Monda Turismo 277 venis el 6 landoj, t.e. 64 %)

- la plej grandaj Universalaj Kongresoj en la historio de Eo (1959 Varsovio: 3256 aliĝintoj; 1963 Sofio: 3472; 1966 Budapest: 3975; 1978 Varna: 4414; 1983 Budapest: 4834; 1987 Varsovio: 5946)

- evoluinta kultura vivo (korusoj, teatro-grupoj, kulturaranĝoj)

- radiofonio (Varsovio, Budapest, Sofio)

- vigla publika gazetara laboro (ekz. en GDR inter 1977-1989 aperis jare 150-400 artikoloj, televidaj kaj radioprogramoj en aliaj socialismaj landoj)

5. Konkludoj

La eseo klopodis i.a. montri, ke ĉiam tra la historio la Eo-movado estis influita de konkretaj historiaj cirkonstancoj. Foje oni klopodis tion eviti per t.n. neŭtraleco. Foje oni klare substrekis la politikan utilon de Eo kaj ankaŭ devis akcepti kompromisojn. La diskuto pri neŭtraleco fariĝis aparte grava, kiam la gvidantoj de la movado - konsciaj pri la persekutoj, kiujn devis suferi la Eo-movado - prave timis, ke unuflanka politika sinengaĝo nur povas malutili al la movado en regiona aŭ eĉ tutmonda skalo.

Aliflanke sterila neŭtraleco povus fariĝi grava bremso por la evoluo de la movado kaj eĉ dubindigi la humanisman mesaĝon de Zamenhof.

La Eo-asocioj en la plej multaj eŭropaj socialismaj landoj, malgraŭ ĉiuj problemoj, sendube evoluis post la Dua Mondmilito regione plej fortaj. Estus valore, detale priskribi ilian historion inter 1945 kaj 1989. Kvankam la unuopaj asocioj havis siajn politikajn limigojn, problemojn kaj proprajn interesojn, ili tamen trovis bonan vojon al utila kunagado en UEA, TEJO kaj en aliaj organizaĵoj, je reciproka bono kaj je la fortigo de la tutmonda Eo-movado. Ke tio eblis, ankaŭ dankindas al la saĝa konsidero de la specifaĵoj de tiu regiono flanke de gvidantoj kaj influhavaj personoj de UEA, aparte post 1974.


I. Lapenna

Jam estas akceptite, ke la parolkomunumo de Eo estas kaj estu tiom bunta kiom la ĝenerala vivo, kvankam kun escepto de rasismo kaj klare faŝismaj kaj militarismaj tendencoj. En la nuna tempo oni devas konsideri, ĉu la lingvo-komunumo ne devus engaĝi sin kontraŭ la negativaj sekvoj de senbrida ŝajne merkate stirata, profitorientita kaj detrua globalismo, kiu ankaŭ minacas la lingvo-ekologian pejzaĝon de la mondo, kiel la civilizon entute. Se la esperantistaro ne plue volas ŝrumpi, ĝi devas serĉi pli da kontaktoj al alternative pensantaj junaj engaĝiĝemaj homoj, kiuj ne nur insistas pri amuzo ('fun').

Nova PIV APERIS!

AKIRU ĜIN ĈE SAT
PREZO: 70 EUROJ + AFRANKO

Postparolo

(aldonita al la esperanta versio de la libro Universalismo)

Djemil Kessous

'Vantaĵo de vantaĵoj, diris la Predikanto, vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo. Kian profiton havas la homo de ĉiuj siaj laboroj, kiujn li laboras sub la suno ? Generacio foriras kaj generacio venas kaj la tero restas eterne. Leviĝas la suno kaj subiras la suno, kaj al sia loko ĝi rapidas, kaj tie ĝi leviĝas. Iras al sudo kaj reiras al nordo, turniĝas, turniĝas en sia irado la vento, kaj al siaj rondoj revenas la vento. Ĉiuj riveroj iras al la maro kaj la maro ne pleniĝas ; al la loko, al kiu la riveroj alfluas, ili alfluas ĉiam denove (…) Kio estis, tio estos, kaj kio estis farata, tio estos farata ; kaj ekzistas nenio nova sub la suno.'

Vanitas vanitatum, et omnia vanitas (vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo) … Kiam li tion asertis - sed en la hebrea - tiu honorinda biblia Predikanto havis iajn senkulpigojn: tiam, en nia frua historio, la generacioj sin sekvis kaj sin sekvis dum jarmiloj kaj jarmiloj sen iaj ŝanĝaĵoj videblaj. La homo tute ne suspektis la amplekson de la universo kaj, ankoraŭ malpli, la akcelan karakteron de l'historio, ĉu tiu lasta estas natura, ĉu homa. Tiun epokon, cetere, la ĉi-supraj vortoj de l'Predikanto spegulas bone.

De post tiu tempo, ni bone scias ke la eterna Reiro estas granda mito. La vorto revolucio, en multaj latinaj lingvoj (angla, franca, itala, hispana, ktp), signifas ambaŭ, jen subitan ŝanĝon, tutrenverson (socian), jen (fizikan) rivoluon, turniĝon, rotacion. Nu, ni bone scias hodiaŭ, ke ĉia korpo, ĉia ento, post ia tiel nomata 'revolucio-rivoluo' tutrenverso, neniam reiras en la saman lokon, en la saman staton, kvankam iuj homoj tiel pensas (aŭ pensis).

Oni rigardu, ekzemple, la tiel nomatan 'neolitikan tempaĝon', kiun Gordon Childe nomis revolucio, kaj dum kiu niaj prauloj, origine migremaj, nomadaj, fikshejmiĝis kaj hejmigis diversajn bestojn kaj aliajn kreskaĵojn: tia revolucio daŭradas dum pluraj jarmiloj; poste, tamen, kelkaj aferoj radikale ŝanĝiĝis: antaŭe oni povas observi nomadajn ĉasistojn-plukistojn, al sovaĝulojn, poste fikshejmajn terkulturistojn, bonajn kamparanojn. Plie, la erao, la historia epoko, kiu sekvas, proksimume dum kvin jarmiloj, estas multe pli revolucia, tumulta, ol tiu antaŭa tiel nomata revolucio, kaj senteble malpli daŭra; same estas, kompreneble, pri nia nuna industria revolucio. Do, en la universo, ĉio perdiĝas, ĉio kreiĝas, ĉio transformiĝas … ni reasertas, parafrazante Lavoisieron … kaj, male al tio, kion diras al ni la ĉi-supra predikanto, multaj aferoj ŝanĝiĝas, eĉ akceliĝas ... Hodiaŭ pli ol iam. Ni ankoraŭ povis tion vidi dum la lastaj jaroj de l'20a jarcento: ĝis la fino de la 1980aj jaroj, multaj aŭtoroj taksis la soci-ekonomiajn strukturojn de Sovetunio aŭ de Ĉinio neŝanĝeblaj, nedetrueblaj, eternaj ... kaj subite, dum apenaŭ kelkaj jaroj, Ĉinio konvertiĝis al la liberalismo (en la horo, kiam mi skribas, la afero daŭras), abrupte, en apenaŭ momenteto, Sovetunio dissplitiĝis. 'Tro granda por bankroti'(too big to fail), asertas angla proverbo; la freŝdataj okazaĵoj de la 11a de septembro 2001 ĵus montris al ni, ke nenio estas tro granda por esti mortfaligita. Kaj, hodiaŭ, la surprizaj eksaltoj de l'historia fluo ne estas finitaj; ĉiu bone scias tion …

Tiu akceliĝo de l'historio povus nin timigi, se ni ne scius, ke multaj, sennombraj evoluoj povas sperti ne nur akcelojn, sed ankaŭ paŭzojn. Ekzemplo: ĉiu bonŝanca estulo (i.a. homo), post sia akcela kresko dum la infanaĝo, post sia pli-malpli tumulta adoleskanteco, atingas la kvietiĝon de l'matureco … Ĉiu bonŝanculo, skribas mi. Bedaŭrinde, ne ĉiam tiel estas … Kelkaj evoluoj, jen individuaj, jen speciaj, eĉ fizikaj, ne havas paŭzon ĝis la estingiĝo, la morto. Tuj post la fino de ilia kreskado, aŭ ili transformiĝas, metamorfoziĝas al alia posta formo, ĉu ili diskrevas. Kompreneble, tian sorton oni ne deziru al la homaro. Oni deziru ke tiuj, kiuj post ni venos, kvankam ili estos nek pli bonaj nek pli malicaj, havos iom pli da fortuno: la bonŝancon vivi dum ankoraŭ kelkaj jarcentoj - aŭ jarmiloj, kial ne ? - en tiu pli homogena homaro, pri kiu multaj el niaj antaŭuloj revis.


Pli da fortuno, skribis mi. Ĉu vere ? Eble, en tiu hipoteza venonta erao, kiun oni tamen esperu kiel eble plej proksima, oni tiel enuos, kiel tion sugestis al ni Francis Fukuyama, fakulo (el iu tre aparta vidpunkto, tion ni vidis p. 70) de la Fino de l'historio. Eble tiam, kelkaj el niaj idoj vidos nian nuntempan mondon envie, kiel ian Far West (malproksiman Okcidenton), kiu permesus al juna imago senlimajn revojn. Tamen certas, ke malpacoj postrestos en tiu tempo: inter ekologiistoj kaj ĉasistoj-plukistoj, ankaŭ inter jen ĉasistoj, jen plukistoj, inter soci-ekologianoj kaj senpolitikaj ĉirkaŭaĵistoj, vinŝatantoj kaj abstinuloj, ktp, ktp ... Ni ne forgesu tiun pasion kabaleman (intrigeman, disidentan, skismeman …), kiun Fourier evidentigis ĉe l'sino de nia homa specio.

Mi tamen kredas, ke, malgraŭ ĉiuj tiamaj konfliktoj, la plej multaj el niaj posteuloj rigardos nian eraon kiel tion, kio ĝi estas: ege penigan, eĉ teruran, tempaĝon … 'Ĉio ĉi por tien alveni!', povos ili ekkrii, rigardante, penseme, nian nunan socion kun, mergitaj en ĝi, ĉiuj malfeliĉaj homoj, kiuj tie sin interŝiras, intermortigas. Jes ja ! 'Ĉio ĉi' estintos necesa, bedaŭrinde, ĉar la plej eta rezulto ne estas akirebla per nula strebo. Vidu la nuntempan Eŭropan Komunumon: kiom da militoj k.a. teruraĵoj necesis, antaŭ ol atingi tiun stadion ! Tamen ! ! !

Do, la homa historio rapidegas, Dank'al la edukado, la instruado, ĉiu generacio komencas sian ekzistadon je nivelo supera al tiu de la antaŭa, kiel Kant tion bone montris al ni. Sekve, male al la ŝafa vivo, al la bova vivo,

la fiŝa vivo, ktp … la homa vivo grave ŝanĝiĝis dum la lastaj jarmiloj, eĉ la lastaj jarcentoj.

La karaktero notinde skua de nia historio devenas certe de la kontraŭeco, eĉ la kolizio, inter, jen tiu rapida evoluo kaj, aliflanke, la eco fundamente konservema de ĉia vivo: tiu nevaria reproduktado, pri kiu Jacques Monod bone emfazas en sia supremenciita verko (vidu p. 15, ankaŭ saman paĝon pri Kant) … Ĉia vivo, fakte, ĉu vegetala, ĉu besta, ĉu homa, eĉ socia … celas porĉiamigi same siajn strukturojn, siajn instituciojn. La homo, samkiel ĉia estulo, estas fundamente konservativulo; tio valoras eĉ pri tiuj, kiuj sin nomas bombaste revoluciuloj. Tamen, malgraŭ la granda plimulto, la homa progreso antaŭeniras, kun ĉiuj siaj epifenomenoj, siaj efikoj, ofte traŭmatizaj, foje tutrenversaj, sed ne ĉiam malicaj, feliĉe.



Dank' al la komunikado, pludaŭras la produktado kaj reproduktado de ĉia vivo. Ĝenerale, en ĉiuj animalaj specioj, la maskloj kaj la femaloj pariĝas, kopulacias, interkomunikas kaj, al la idoj, transdonas iun kapitalon: siajn genojn, kiuj estas biologiaj reproduktantoj, replikantoj celantaj la nevarian reproduktadon. Pli aparte en la homa vivo, tiu komunikado, fariĝas multe pli riĉa (vidu p. 54), universala: ne nur al siaj idoj komunikas la homoj sed eĉ inter si, kaj tiu novtipa komunikado, lingva, kultura, ekonomia, estas multe pli fleksebla ol la biologia transdonado. Tiele multaj el ni, ĉiutage, partoprenas en la fruktigo de nia homa kapitalo: tiu komuna heredaĵo, kiun ni transdonas al niaj posteuloj.

Nun, ni rapide superflugu kelkajn el la gravaj progresoj faritaj de l'homaro en tiu kampo specife komunika (kultura sed ankaŭ ekonomia), en tiu tekniko de l'komunikado.

- Post la malrapida ellaboriĝo de la lingvo, post la apero de l'skribo, alvenis la alfabeto, kiu estas multe pli efika ol la praaj hieroglifoj kaj kojnoformoj: la alfabeto havas semantikan potencon multe pli gravan; krome, ĝi estas pli demokratia, do pli universalisma; ĝis tiam, la skribado estis rezervita al la klerikaro kaj aliaj elitoj.

- La mono, ni sufiĉe traktis tiun temon (p. 108-117), estas grava paŝo de tiu komunikado inter la homoj, kompare kun la arkaika aĵ-interŝanĝo. La historio de l'mono ne estas finita kaj la freŝdata starigo de la eŭro estas interesa etapo al tiu universala mono kiun ni celu.

- Ankaŭ la arabaj ciferoj (fakte hindadevenaj), kun la uzo de l'cifero nul, estas grava paŝo. Fakte, oni jam kalkulis per la antaŭaj sistemoj; ekzemple, vi povas provi la plenumadon de tiu obligo: 875.683 x 75.698, per la romiaj ciferoj. Sed multe da papero, kaj da tempo, necesos al vi … Hodiaŭ, dank' al tiu skribo, la tutmondaj matematikistoj jam havas ian universalan lingvon.

- Ni parolu nun pri tiu IL (Internacia Lingvo), kies historion, tute ne finita, ni elvokis (p. 43-45). Hodiaŭ multaj projektoj ekzistas. Inter ĉiuj elstariĝas la Esperanta lingvo. Por konvinkiĝi pri tio, sufiĉas fari etan serĉadon per Interreto: tra la tuta mondo, la asocioj ekfloras, la internaciaj renkontiĝoj multiĝas, la debatoj, ĉiutage, ne ĉesas …

Ekzistas tamen multaj rezistoj kontraŭ tiu progreso, kiel ni ĉi-supre skribas. Pri Esperanto, i.a., multaj homoj aŭdis nenion, eĉ, multaj volas nenion aŭdi. Tamen, kio konsistigas la superecon de ia ebleco de ŝanĝo, tio estas la ebleco rapide disvastiĝi kiam la objektivaj cirkonstancoj fariĝas favoraj, ni freŝdate tion vidis en la fulma disvolviĝo de Interreto kaj tio ankoraŭ valoras pri Esperanto.

Donu al mi, aŭ al iu ajn esperantisto iom konfirmita, aron da lertaj junuloj, iom motivitaj kaj emaj al la lingva lernofako; ni diru kvardek. Post unu jaro vi havos kvardek instruistojn, kaj ĉiu el ili povos transdoni sian grandvaloran kapitalon al tiom da novaj lernantoj. Ĉar, tra la tuta mondo, jam ekzistas miloj kaj miloj da esperantistaj instruistoj (feliĉe mi ne estas sola), Esperantio povas kreski eksponenciale, kaj tio tute ne eblas per iu ajn alia lingvo !

Do, la teknikaj eblecoj de l'ŝanĝo ĉeestas ĉirkaŭ ni kaj, kiam la objektivaj cirkonstancoj pretiĝas, kiam la politikaj bariloj forsaltas, la nova progreso, tiam, povas rapide disvolviĝi.

Demando postrestas. Vidu la freŝdatan enkondukon de la eŭro: tiu mono forpelis multajn aliajn naciajn valutojn. Tio kontraŭas la faman leĝon de Gresham, laŭ kiu la malbona mono forpelas la bonan; tiuokaze, la bona mono elstaris, la malplej fortaj malaperis. Ĉu oni ne povas imagi, do, ke la forta lingvo malaperigos la aliajn ? Tio ne estas malebla. Persone, mi tre ŝatas mian patrinan lingvon, la francan, ankaŭ la araban, la patran, kiun mi notinde forgesis tamen; mi ne ŝatus, ke ili malaperu. Sed neniu povas diri, kio okazos post kelkaj generacioj … Historio rapidegas, kaj la progreson oni ne haltigas...

Fine de tiu verko, mi ŝatus respondi al kelkaj kritikoj (amikaj), kiujn, post la franca eldono, mi registris.

- En tiu verko mankas ia spiritualisma aspekto, diris al mi iu amiko la postan jaron. Ĉiu homo, jen Dikredanto, jen agnostikulo, eĉ ateisto, havas sian propran spiritualismon… eĉ sciencisto: 'ĉiu fiziko estas metafiziko,' diras Einstein. Do, kompreneble, ankaŭ mi havas propran metafizikon. Sed, en tiu ĉi verko, temas nur pri materiaj aferoj: la konkretaj komponantoj de l' reala universalisma movado. La temo estas sufiĉe ampleksa kaj mi certe neglektis, eĉ forgesis, gravajn erojn.

- Maljunan amikon, kiu multe laboris por la fondiĝo de la universalisma ariĝo (vidu rimarkon p. 144), timigis iu akcento de l'verko, kiu povus ŝajni foje iom polemika, batalema ...

Ni pli supre ekzamenis kelkajn aspektojn el la filozofio de Hegel: tiu filozofo taŭge emfazas, kiel - ĝuste - la homa historio estas malpacema, akra fenomeno; ĝi estas tribunalo universala. Do, en tiu tumulta tempaĝo de nia evoluo, pli ol iam, oni interbatalas, luktas, kompreneble, oni ankaŭ interjuĝas sin. Honesta homo devas tamen scii, ke oni ne povas ĉiam esti juĝisto, en tiu mondo, sed ankaŭ, foje, kulpulo.

Do, malgraŭ erarigaj ŝajnoj, dum tiu tumulta epoko, la homo neniam estis pli la pasiva objekto manipulita, baraktigita, de tiu ruza, petolema, historio, kiun ĝi ne tiel gvidis, ol ĝia aganto, tiu aktiva subjekto, kiu ĝi pretendus esti. Laŭ Hans Kelsen, teoriisto pri la natura juro, por juĝi oni devas forigi la determinismojn kaj antaŭsupozi, ke l'homo responsas pri siaj faroj. Ĉiu scias ke, tute ne finiĝinta, la historio, male, plirapidas. Do mi, ni, partoprenas en tiu tumulta historio, kaj ni ne ĉiam povas resti senemociaj, ni ne ĉiam povas perfekte konduti, ve! Poste

ni esperu - inch'Allah - ke ni estos iom pli trankvilaj, ke la homo estos iom pli mastro de la fluo de sia evoluo, kiun oni deziras longa.

- La universalismo … sed kial disvastigi tiun plian ismon ? Ĉu jam ili ne estas sufiĉe multnombraj ? Tiuj demandoj eliĝas el la letero de sennaciista amiko, kiu ĵus legis la francan eldonon. Al tio, la respondo ne estas en la vento, sed en la libro mem, jam en la malantaŭa kovrilo: kvankam, iele, junega, la universalismo ne tiom estas plia ismo kiom afero ege malnova. Sed la respondo estas ankaŭ, pli rekte, en tiu manifesto, adoptita la 26an de oktobro 1997: 'La universalismo ne estas dogmo, doktrino, sed movado.'(vidu anekson p. 143)

- Mi ankoraŭ spertis kelkajn kritikojn pri la formo de l'jena Esperanta eldono.

Iu amikino, ekzemple, diris al mi, ke tiu sekva gramatika formo: la uzado de akuzativo post substantivigita verbo, ne plu estas uzata, ke ĝi estas arkaika. Alia kamarado la samon diris, pri la uzo de la apostrofoj ...

Fakte tiuj formoj estas hodiaŭ malpli ofte uzataj ... Eble … Sed tiuj striktigoj ŝajnas al mi iom bedaŭrindaj ĉar ili direktiĝas al malriĉigo de nia lingvo, kiu, male, bezonas ĉiajn eblajn pliriĉigojn. Eĉ proza teksto, povas havi ian ritmon, ian spiradon. Kial ne ? La ĵazmuzikistoj iris eĉ pli malproksimen. It don't mean a thing, if it ain't got that swing, alidirite:

Se ĝi svingon
ne havas,
tio nulon
signifas !

… Kaj ni bone scias tion: nia esperanta lingvo estas mirinda ilo, tiom por la sciencoj (pro sia ekzakteco), kiom por la beletroj (pro sia fleksebleco). Do, kial oni kripligu tiun ilon per sklerozigaj praktikoj ?

Ni reiru al nia temo. Malnova onidiro asertas, ke la ideoj estas en la aero. Ne nur la ideoj, sed multaj eblecoj de ŝanĝo ĉeestas ĉirkaŭ ni, koviĝantaj. Kiam la objektivaj cirkonstancoj, la historia tempo, pretiĝas, tiam tiuj ĝermoj tuj disvolviĝas, ĉu en plagojn, ĉu en tian feliĉan metamorfozon, kian antaŭsentis Charles Fourier.

Vidu interreton. Tiu sistemo naskiĝis en 1969, sed vere disvolviĝis, fulme, nur ekde la fino de la 1990-aj jaroj: tridek jarojn poste. Nun, ĝi ebligas al sennombraj homoj vivantaj ĉie en la mondo tute libere komunikiĝi. Tra ĝi, tamen, multaj abomenaĵoj pasas, ĉu ne ? Jes ja ! Sed oni ne ĉiam vidu la malbonan flankon de la aferoj, la botelojn meze-malplenajn. Permesu, ke mi memoras al vi tiun aserton de Bertrand Russel, kiu komencas leterfronte nian trian ĉapitron: venos pli bonaj tempoj, kiam la industriigo, post sia krude mekanika fazo, malfermos novajn perspektivojn al la libertempo en civilizacio tre malsama je la nia … Almenaŭ tian estontecon oni deziru.

La ĉenreakcioj ne ĉiam estas malicaj, do. Ĉu oni ne povas imagi, ke, iun tagon, tia alia feliĉa metamorfozo (ekzemple la Esperanta lingvo sed povus esti ankaŭ alia interŝanĝilo, kiel nova alternativa - kaj demokratia - mono), post ioma kovado, disvastiĝos rapide tra la tuta homaro ? Do, por tiucele agadi, oni nepre devas serĉi, esplori, plani, interŝanĝi niajn ideojn, debati pri ili, provi, ankoraŭ lukti, kun egaj malfidoj, komence pri si mem: de omnibus dubitandum (ĉio estas pridubenda) … ankaŭ kun kelkaj bazaj principoj, notinde rilate al la perforto … Tiuteme ni pli supre vidis ke, male al la senesperaj agoj faritaj de kelkiuj, la grandaj sociaj luktoj, la klasbataloj, estas esence neperfortemaj; krome, neniam oni povos feliĉigi la homojn malgraŭ ili…

Kvankam ege juna, tute nova, do, la universalismo jam havas riĉan historion; ties unua periodo estas tiu de la grandaj principoj; en la sekva multiĝas la konkretaj provoj … ofte fiaskaj bedaŭrinde, sed ne ĉiam, tion ni povis vidi. La ekzameno de tiuj multaj jam faritaj agadoj kaj aliaj strangaj ideoj (eĉ per la penso, oni agadas, aktivas), jen la celo, kiun mi provis atingi. La universalismo estas la ideo ne nur interna, sed intera, kiu nin ĉiujn kunligas.

La 24an de majo 2002

La plej nobla parto

la pasporto estas la plej nobla parto de homo.

Ĝi ja ne estiĝas tiel simple kiel estiĝas homo.

Homo povas estiĝi ĉie ajn

per ago plej frivola kaj sen racia kaŭzo,

sed pasporto neniam.


Tial ĝi estas agnoskata,

se ĝi estas bona,

dume homo kiom ajn bona li estas

tamen ne estas agnoskata.

Bertolt Brecht (1940)



tradukis : Nora Caragea (teksto bedaŭrinde ankoraŭ aktuala post pli ol 60 jaroj!)

La franca escepto ... laikeco

L. Robert

Preskaŭ ĉiutage ĉe la amasinformiloj eblas aŭdi pri la 'Franca escepto' laŭ maniero aparte malfavora, klare elmontranta deziron ĝin malaperigi. Same kiel pri Esperanto oni ne hezitas pri ĝi kalumnie dissendi malĝustajn argumentojn eĉ ĝin prezenti, kiel integrisman sociorganizon.

Tia kampanjo subtenata eĉ de francaj influhavaj potenculoj diversfakaj certe ne estas naive senmalica. En tempo por integriĝo en liberalisman Eŭropon ĝenas laikeco laŭ franca koncepto, heredaĵo el la humanismaj principoj de la iama Franca Revolucio. Tiu 'escepto' konsistigas obstaklon kontraŭ tutmonda senreguligado, ankaŭ kontraŭ rekta submetigo de la publika instrusistemo al la kapitalistaj ekonomiaj interesoj kaj al la lokaj reginstancoj, ties komplicoj.

Laŭ la konstitucio Francio havas laikecan politikan reĝimon, kaj la instrusistemo estas senpaga, deviga kaj laikeca. Sed tiun principon ofte perfortas la privataj lernejoj, religiaj aŭ firmaaj, en kiuj aliajn valorojn, ege malsamajn, oni encerbigas al gejunuloj. Nu, lernejo ja estas ideala loko, kie infanoj formadas sian personecon, kie ili sin preparas por fariĝi adoltoj, kiuj konsistigos estontan socion. Tial la instrusistema statuto havas unuarangan gravecon en sociaj vetceloj, kaj ne reduktiĝas al nura akiro de legado, skribado, kalkulado. La politikistoj klare konscias tion!

Laikeco kaj toleremo

Ofte oni sendiference uzas tiujn ambaŭ terminojn por esprimi saman ideon. Malprave tial, ĉar ne temas pri samaj nocioj.

Dum longa tempo la vorto 'laika' havis - kaj ankoraû nuntempe havas - etimologian signifon indikatan en Nova PIV: 'Neŭtrala pri religio, sendependa de iu ajn religia instanco, rifuzanta klerikalajn influojn.' Sed pro historiaj eventoj, ankaŭ verŝajne pro influo de filozofiaj ideoj, en Francio la nocio pri laikeco evoluis tiagrade, ke ĝi fariĝas originala socikoncepto. De la tereno strikte limigita al la tradiciaj religioj, ĝi etendiĝis al alispecaj ideologioj tial, ke nun ĝi koncernas ankaŭ politikan, socian, kulturan vivon.

Nu, en kio laikeco distingiĝas de toleremo? 'Ne temas pri multigado de kredoj, sed pri kreado de spaco, kiu donas eblecon uzi liberecon', klarigas la edukisto C. Kinsler. Fakte historio produktas toleremon pro neceso iel interkonsente kunvivadi, dum laikeco estas apriora kondiĉo, por havi politikan spacon kaj liberecan spacon.

La nocio pri toleremo ekzistas jam delonge; ĝia unua formo koncernis la religiajn komunumojn. Ankoraŭ nuntempe oni provas apliki tian koncepton por ebligi kunvivadon de diversideologiaj komunumoj ne plu nur religiaj. Sed ve! multiĝas la ekzemploj klare, kaj tragike, elmontrante limojn de toleremo, kiel kontentiga solvo al tiu grava problemo de nun tutmonda. Tio nedubeble devenas de la fakto, ke la komunumoj - religiaj, ideologiaj, naciismaj, politikaj, kaj alispecaj - konstruas sian identecon ekde sama fondinto-Patro, de sama origino, de sama kunestadoformo, kiu karakterizas ĉiun. El tio normale fontas rigideco de interna organizado, streĉeco de la intermembraraj kunligoj, tendenco al fermemo sur sin mem.

Kion inventas laikeco, tio estas la ebleco starigi vivospacon sen ia ajn alia fondaĵo ol homeca, kun konstanta ebleco rekonsideri proprajn konvinkojn, antaŭsupozojn, al kio homo kolizias ekde kiam li/ŝi renkontas aliulon. Tia sinteno implicas multe pli ol simplan toleremon, sed aŭskultpretecon, prikonsideron al alies opinioj, respekton en la interhomaj rilatoj. Ĉu ne pro tia aspekto verŝajne unika, ke oni nuntempe tiom insiste klopodas por malaperigo de la 'franca escepto'?

Kelkaj gravaj klarigoj pri la Franca historio

En 1881, 1882 kaj 1886 leĝoj igis la instruadon deviga kaj starigis publikan instrusistemon senpagan kaj laikecan. Per tia decido la tiama registaro senigas la katolikan eklezion - de ĉiam ŝtata religio - je la instruprivilegio, kiun ĝi sola tenis ĝis tiam. En 1905 leĝo nuligis la Konkordaton subskribitan de Napoleono kun la Papo en 1801, kaj tiel oficialigis apartigon de eklezioj disde ŝtato. Ĉi lasta konsekvence iĝis laikeca, kaj firme deklaras, ke kredemo aŭ malkredemo estas afero strikte privata, ankaŭ ke reguloj pri socia vivo estas sendependaj de religia kredo. Ĝi krome engaĝiĝas protekti infanedukadon kontraŭ religia endoktrinigo kaj spiritoformado.

En 1946 la laikeca karakterizo estis konfirmata en la konstitucio de la 4a Respubliko; kaj denove en la alia konstitucio starigita en 1958 la 5an Respublikon, ĝis nun daŭre valida. Sed se la katolika hierarkio vole-nevole konsentas pri laikeco de la ŝtato, ĝi male senpacience atendas favoran okazon koncentri siajn atakstrebojn kontraŭ la laikecan instrusistemon. Tuj post la Dua Mondmilito ekstartis ofensivo: ekde 1951 pluraj leĝoj ebligas financadon per publika mono de la unuagradaj privataj lernejoj, fakte katolikaj en 95%a proporcio. En la duagradaj publikaj lernejoj oni restarigis pastro-oficejojn. En 1994 necesis aparte giganta manifestacio (unu miliono da partoprenantoj) por eviti financadon per publika mono de la privataj mezgradaj lernejoj kaj gimnazioj.

Ne ekzistas eŭropa modelo

Por pravigi tiun agadon la klerikuloj bazas sian argumenton sur la 'francan escepton' kompare kun la 'eŭropa normo'. Efektive la Franca Respubliko konsistigas apartan kazon pro tio, ke ĝi estas la nura ŝtato, kies laikecan karakteron klare konfirmas ĝia fundamenta konstitucio. Eblas konsideri tion, kiel originalaĵon en komparo kun la reĝimoj de la aliaj eŭropaj ŝtatoj. Sed la termino 'escepto' minimume aspektas netaŭga - mi eĉ kuraĝus skribi 'partieca' - tial, ĉar escepto povas ekzisti nur rilate al regulo, al klare difinita normo. Nu, tiurilate tute ne ekzistas eŭropa normo.

Fakte en neniu alia eŭropa ŝtato estas klare kaj oficiale certigita laikeca karaktero pri sendependiĝo rilate religian kredon; sed ege diversaj estas

la rilatoj de la ŝtatoj kun la koncernaj religiaj instancoj. Certaj havas oficialan ŝtatan religion; aliaj interkonsentas konvenciojn kun ekzistantaj eklezioj; plej multaj agnoskas religian geedziĝon samvalore kiel civilan, kaj la religiaj lernejoj ricevas ŝtatajn subvenciojn; ĉe kelkaj landoj nuntempe eblas konstati tendencon al ioma sendependiĝo pri tradiciaj rilatoj kun religiaj instancoj.

Serioza kaj objektiva pristudado evidente pruvas, ke ne eblas paroli pri 'eŭropa normo', pro tioma diverseco en ŝtato-statutoj.


Malgraŭ tio, eĉ se ekzistus normo, ĉu escepto devige estas io detruota? … Tia principo karakterizas totalisman reĝimon, kiu allasas nenion alian ol la ununura pensmaniero, sur kiu ĝi baziĝas. Oni ofte aŭdas eminentulojn aserti, ke ni vivas sub demokrataj reĝimoj; se vere, antaŭ ol kondamne forĵeti ideon, eĉ se ĉi lasta diferencas de la kutimaj, demokratece ŝajnas normale ĝin submeti al objektiva kaj senpartieca pristudado.

Cetere necesas precizigi gravan punkton: Male al verŝajne intence erariga propagando, laikeco absolute ne celas malaperigi religiojn. Ĝi simple celas ebligi al ĉiu senpremajn kondiĉojn por ĝui veran liberecon pri pensado kaj kredo. Apartigante sin de la katolika religio kaj fakte de ĉiuj religioj, la ŝtato favoras neniun kaj kondamnas neniun, tiel estigante normalan egalecon inter ĉiuj. Rimarkinde, ke nur la katolika eklezio tiel akre batalis, kaj daŭre batalas, kontraŭ laikeco. Ne estas agrable forlasi plurjarcentan privilegion.

Laikeco, potenciala danĝero pro privelegiuloj?

La franca koncepto pri laikeco alarmas ne nur la klerikulojn … 'Pripensado kondamnas nin nepre esti liberaj. Pro tio la regpovularo ĉiam maksimume klopodas redukti pripenseblecon, ankaŭ tion, kio ĝin nutras', skribis Daniel Mermet, ĵurnalisto, en sia libro: Là-bas, si j'y suis! (Tien, se eventuale mi tie estas). Evidente, por orientigi, kanaligi, aŭ sufoki pripensadon estas logike ekklopodi ĉe lernejo.

Tiurilate klarega estas la programo lanĉita de la Eŭropa Komisiono en 1996: 'La lernejoj nepre inspiriĝu el ĉiuspecaj praktikoj konkurefikaj kaj novigaj, inkluzive tiujn de la entreprenista mondo.' Laŭ dek kriterioj pri 'Konkurefikeco' alligitaj al tiu programo, Francio ricevas nur 2.5 poentojn el dek. Kontraŭe Britio ricevas naŭ el dek. Tio konsistigas senapelacieblan kondamnon de la franca laikeca instrusistemo. Sed ĉu la brita instrusistemo estas tiel perfekta? Se jes, por kiuj celoj? Oni rajtas fari al si demandojn post legado de jena informo: 'Lastaŭtune la Brita Ministro pri Edukado publikigis unuan klasifikadon de la publikaj kaj privataj lernejoj kunmiksitaj. La dokumenton oni dissendis en 3 milionoj da ekzempleroj. La Financial Times, ĵurnalo certe ne suspektinda pro maldekstra radikalismo, analizas jene: 'Ekde nun ne eblas fermi la okulojn antaŭ sistemo, kiu generas tiel indignigajn maljustaĵojn: Por la infanoj de riĉulaj familioj, la privatajn lernejojn kaj sukceson; por la malriĉuloj, la publikajn lernejojn kaj malsukceson.'



(Eltirita el artikolo de Yves Berthault, revuo Ecole Emancipée numero 4, Dec, 2000) Estas ja angla ĵurnalo, kiu tiel senvuale prilumas la aparte bonegan taksadon de la brita instrusistemo, konsentitan de la eŭropaj instancoj. Kaj male, al la 'rubujo' la Franca laikeco, kun ĝiaj 2.5 poentoj el dek!

La 21a jarcento estos laikeca, aŭ ne estos!

Nu, eblas facile kompreni, ke la laikeca problemo, la 'franca escepto', koncernas ne nur religiaĵojn, laŭ la limigita kredo-signifo de tiu vorto, sed inkluzivas ankaŭ la maltrankviligajn deflankiĝojn, kiujn ĝi generas ĉe organizoj ekspluatantaj la fundamentan bezonon de homo sin plifortigi per revigliga pensado cele al plenefika rezistado kontraŭ dumvivaj malfacilaĵoj. Sed kiam kredo transformiĝas en kulton, kulton al persono, al diaĵo, al ideologio, ĝi riskas rapide evolui ĝis integrismo danĝere pasieca.

La nuntempa mondo elmontras aparte trafan ekzemplon de la teruraj detruoj ne nur materiaj sed ankaŭ kulturaj, kiujn generas la inter-integrismaj konfliktoj, ne nur religiaj, sed politikaj, ekonomiaj, aŭ kulturaj plenkonscie estigataj de minoritataj grupoj, kiuj iel profitas de tiuj interhomaj buĉadoj.

El inter la decidoj alprenitaj de la Tutmonda Komerc-Organizo dum sia laborkunsido pasintjanuare en Doba (Katar-emirlando), iu koncernas kulturon, de nun inkluzivitan inter la alkomercigeblaj varoj. Sekve de tio estas koncernataj, interalie, la instrusistemoj, dank' al kiuj la tutmondaj potenculoj rajtas laŭ propraj deziroj kaj celoj konfirmigi regatojn, por ke ĉi lastaj estu obeemaj al la reguloj de la ultraliberala ununura pensmaniero. Memkomprenble en tia programo nenian lokon povas havi laikeco, nek liberec-idealo, kiun ĝi strebe defendas.

Necesas senprokraste ekkonscii, ke tiu 'franca escepto' tute ne konsistigas malaperigotan danĝeron, sed male interesan alternativon por savi la homaron el memdetrua procezo. Urĝegas eduki la junajn generaciojn al respekto de homo de ĉiuj kredoj, de ĉiuj kulturoj, per instruado esence laikeca, sur kies bazo eblus firme konstrui pacan, fratecan, solidarecan socion. Tio evidente ne kongruas kun religia kaj ekonomia privatigo de instruado, nek kun totalisma politika socisistemo.

Antaŭ sia morto la franca verkisto Andre Malraux prognoze skribis: ' La 21a jarcento estos religia, aŭ ne estos!' la tutmonda evoluado atestas, ke lia deklaro estas grave malprava, kaj male ĝi devus tiel teksti: 'La 21a jarcento estos Laikeca, aŭ ne estos!'

L. Robert ,

Cenon, la 25an de marto 2002

Plurtavola naciismo

Gary Mickle

En *Sennacieca Revuo* n-ro 127 (1999) aperis la artikolo 'Eŭropa ideologio' de Zlatko Tišljar. Ĝi estas granدparte, sed ne tute identa kun la samtitola libro, kiu aperis en 1998. La verko estas simptomo de fatala evoluo, en kiu la esperantista komunumo poiome relativigas la universalismajn ideojn, kiuj animis ĝin dum la plej granda parto de ĝia historio, kaj turnas sin al etnicismaj, geopolitikaj kaj eĉ naciismaj temoj.

Kiam mi komparis la du tekstojn, mi trovis la jenajn diferencojn:

Ĉapitro 11 de la libro, 'Naciaj dogmoj kiel psikologia fonto de kontraŭstaroj al eŭropa identeco' mankas en la versio aperinta en SR.

La lasta alineo de ĉapitro 12, 'Valorigoj de niaj apartenoj' same mankas en la versio de SR, ĉu erare ĉu pro intenco. Tiu alineo traktas la neceson de 'intensa edukado, por konvinki la homojn', ke la 'nacia identeco' kaj des pli la 'supernacia identeco', t.e. la eŭropa, estas por ili gravaj, kaj por 'plenigi ĉies koron per amo por la eŭropa patrujo'.

La libro enhavas en la 'Aldonoj' ankaŭ malgrandajn traktaĵojn pri 'enamiĝo kaj sekso', pri la diferencoj inter Esperanto kaj aliaj lingvoj kaj pri la neeblo lerni fremdan nacian lingvon ĝis nivelo ekvivalenta al la denaskula. Ili mankas en la SR-eldono de la teksto, sed ili ja estas eseetoj pri esence aliaj temoj.

La 'eŭropa ideologio' de Tišljar

Zlatko Tišljar promocias en ĉi tiu libro ion, kion li nomas 'ideologio', atribuante al tiu vorto nekutime pozitivan konotacion. Laŭ li, ĉi tiu 'eŭropa ideologio' ne nur akcelos la integriĝon de Eŭropo, sed eĉ savos ĝin de malglora sorto: 'Sen komuna idearo, sen eŭropa patriotismo, Eŭropo disfalos.' [p. 36]

La eŭropa ideologio estas laŭ lia konvinko tre ennoviga teorio. 'En ĉi tiu verko troviĝas sufiĉe multaj redifinoj de ŝajne al ni ĉiuj klaraj nocioj, pro kio multaj legantoj ne povos bone kompreni la esencon. Ja ni ĉiuj estas ligitaj al komprenoj, kiujn ni ricevis dum nia eduko. [...] mi trovis redifinojn, kiuj helpis al mi konstrui kompletan kaj konsekvencan teorion, en kiu la nocioj ne estas kontraŭdiraj.' [p. 65]

Ĉi tiu koncepto estas ekzemplo de io, kion mi nomas 'plurtavola naciismo'. Detale ellaborita nova naciisma koncepto estas laŭ mia scio unikaĵo en Esperantujo. Ĉi tiu soklas sur la nepra premiso de plurtavola identismo, kaj tiu oftas ĉe esperantistoj. La plurtavola identismo estas unu el nemultaj ismoj, kiuj ĝermas spontane el la verda humo de tiu virtuala lando kaj hejmas en ĝi kiel la homaranismo de Zamenhof kaj la sennaciismo de Lanti. Eblus difini la nociojn 'plurtavola identismo' kaj 'plurtavola naciismo' jene:

Plurtavola identismo = *doktrino, kiu premisas aŭ rekomendas pluroblan formon de individua identeco, ĉe kiu la ĉefaj objektoj de identiĝado estas diversampleksaj etnaj-kulturaj unuoj, al kiuj la individuo apartenas.*

Plurtavola naciismo = naciismo kun pluraj objektoj, kiuj est*as la diversampleksaj etnaj-kulturaj unuoj, al kiuj oni atribuas lokon aŭ individuon; ĝi respondas al federacia politika ordo kaj premisas plurtavolan etnokulturan identecon de la individuo, ĉe kiu ĉiu identectavolo respondas al unu el la niveloj de la federacia sistemo.*

La federacia politika ordo kaj la principo de subsidiareco estas por Tišljar ankaŭ modeloj por la strukturaj trajtoj de la alstrebata eŭropa kultura ordo. 'La ĉefa principo, surbaze de kiu Eŭropa Unio povas fariĝi forta ŝtato kaj tamen absolute garantii kaj defendi la rajtojn de la popoloj je siaj identecoj, estas la principo de subsidiareco.' [p. 30] 'Tiun politikan principon oni devus apliki ankaŭ al la rajtoj je identecoj kaj lingvoj.' [p. 31]

Identeckonstituaj laŭ ĉi tiu doktrino estu la politikaj niveloj eŭropa, nacia kaj loka-regiona, el kiuj la eŭropa dominu. 'Grandaj religioj kaj grandaj ŝtatoj havas ŝancon pli stabile kaj longdaŭre evolui kaj havi pli longdaŭrajn periodojn de morala stabileco, de ideologia kredindeco. Kompreneble, se la ŝtato aŭ religio sukcesis evoluigi tutŝtatan aŭ tutreligian identecon kiel ĉefan identecon de la apartenantoj.' [p. 13] 'Kiam oni sukcesas konstrui grandan socion, ĝia vivperiodo kun ideologi-morala konstanteco povas havi longan eĉ kelkjarmilan daŭron, se evoluis en ĝi ankaŭ propra firma identeco, sed povas malaperi jam post la frua infanaĝo, se oni zorgis nur pri la teritoria kaj ekonomia grandeco, ne pri ties identecforto.' [p. 13] Jen, cetere, tipa trajto de ĉia naciismo: la 'eterneco' de la nacio estas imagata grava.

Skemeca plurtavola identeco rolas en la politikaj konceptoj de diversaj esperantistoj. Vinko Oŝlak tezas: 'La tri piedoj de la homa etna identeco estas: la loka, la etna/nacia kaj la tuthomara kosmopolita. [...] Nur konsciante pri ĉiuj tri identaj sokloj kaj flegante ilin oni povas reteni relativan stabilecon, kiu estas la bazo de la sana kaj normale distanca identa vivo.' Stanisaw Stolc, pola pastro, ellaboris kaj disvastigas similan identecan skemon.

Eble ĉi tiuj konceptoj pli facile naskiĝas en la kapoj de esperantistoj pro la analogio de la vertikalaj lingvomodeloj, kiuj kelkfoje prezentiĝas en la Esperanto-informado, kaj kies mankon de universala aplikebleco Marcus Sikosek kritikas. Sikosek citas la ekzemplon de la 'trilingva modelo', priskribebla jene: 'Homo parolu almenaŭ tri lingvojn, laŭ la socia aparteno: 1. En sia regiono: la regionan dialekton; 2. En sia nacio: la nacian lingvon; 3. En la tuta homaro: la internacian lingvon esperanto.' Li atribuas parton de ĝia populareco al Ivo Lapenna, kiu volonte disvastigis ĝin, kaj aldonas, ke jam Zamenhof skizis similan, sed kvarŝtupan koncepton.

Ĉe Tišljar la skemo estas jena: 'Teritoriaj identecoj de ĉiu eŭropano estas nur lia regiona, ŝtatnacia kaj eŭropa. Tial ĉiu devas lerni nur tri lingvojn, sian regionan dialekton (aŭ minoritatan lingvon, se li estas minoritatano) por komuniki kaj havi identecon en sia regiono, ŝtatnacian lingvon [...], kaj eŭropan lingvon [...]' [p. 33]

Oni devas agnoski, ke ĉi tiu tavoligita naciismo estas pli malferma al individua pluridenteco sur la etna nivelo ol tiuj klasikaj naciismoj, kiuj premisas la tutvivan apartenon de individuo al unu

nacia 'destinkomunumo'. 'Kiam oni ŝanĝas la vivlokon, do la hommedion, oni venas sub la influon de alia ideara tipo, kiun oni iom post iom akceptas, parte ankaŭ ŝanĝas, per la propra influo, kaj oni transiras el unu aparteno al alia.' [p. 15] '...ĉiuj rajtas per propra decido ŝanĝi siajn teritoriajn identecojn – sed neniu rajtas forpreni la grupan rajton je tiuj tri niveloj de identecoj.' [p. 33-34]

Pli kongruas kun tradiciaj naciismoj la insisto pri la nacie ensociiga rolo de la ŝtata klerigsistemo. 'La edukado faras onin grupapartenanto. [...] La edukado laŭ unusama idearo pri la vivsenco, la informado per unusama informsistemo evoluigas ĉe ĉiuj en tiu socio, aron da komunaj ideoj, kiuj igas tiujn homojn kredi pri la samaj dogmoj (ŝajnaj veroj).' [p. 15]

Kiel ruĝa fadeno tiriĝas tra la verko la ĵus vidita imago, ke ene de nacio regas ia unika komuneco de la mondrigardo. '...mi akiris du naciajn identecojn, kroatan kaj slovenan – sed ne la germanan aŭ aŭstran, ne la anglan, ne la serban aŭ bosnian, ĉar mi ne vivas en ŝtatoj kun tiuj lingvoj kaj sekve ne samopinias rilate la sencon de la vivo kaj morto kun ĉi tiuj popoloj, kvankam mi ilin povas lingve kompreni.' [p. 34]

En la teorio de Tišljar, ĉiu etnokultura-geografia unuo, kiu fundamentas tavolon de identeco, postulas specifan, por tiu unuo tipan 'identeclingvon'. 'Ĉar la ideojn oni transportas per lingvo kaj la lingvo per sia formo signas la apartenon, la lingvo estas esenca faktoro rilate la homajn identecojn.' [p. 15] '...ĝi (la lernita normlingvo) kreas la nacian senton, dum oni samtempe havas la regionan (dialektan) identecon, la lokan (subdialektan) kaj eventuale la apartan vilaĝan.' [p. 21] La identecoj de homo aperas ĉi tie kvazaŭ naturaj produktoj de ties lingva ensociigo.

Kiel la leganto povus antaŭvidi, la ideala 'identeclingvo' por Eŭropo estas Esperanto. Ĉar la 'lingvo krom komunikilo estas ankaŭ socia distingilo' [p. 18], iu ne eŭroptipa – parolata ĉefe sur aliaj kontinentoj – lingvo kiel la angla ne povus plenumi ĉi tiun funkcion. '...ekestas bezono pri nova identecŝtupo por ĉiu eŭropano – la eŭropa. Tiu identecŝtupo devas esti signita per eŭropa lingvo.' [p. 32] Tišljar eĉ deklaras la eŭropan komunikan problemon solvita kaj absolutigas la identecan 'problemon', dirante, ke '...efektive Eŭropo ne havas problemon de komunikado, sed tiun de lingvo, 'kiu reprezentos eŭropan identecon'.'

Sintezo de civila kaj etna naciismoj

La scienca literaturo pri naciismo ofte distingas inter du naciismo-tipoj:

a) *civila* (civitana, respublika), produkto de la klerismo kaj la burĝaj (precipe franca) revolucioj, tipe renkontata en Francio kaj Usono, en lokoj, kie la nacio formiĝis per aglomeriĝo de diversetnaj teritorioj aŭ per grandskalaj migradoj, kaj la

b) *etna,* respondanta al la imagoj de la romantikisma filozofio, tipe renkontata en la historio de Germanio kaj orienta Eŭropo, precipe tie, kie la modernaj nacioj formiĝis per la dissplitiĝo de imperioj.

La plurtavola naciismo kuplita kun la federaciismo ebligas elegante kombini ambaŭ naciismo-tipojn al unu tutaĵo. Ĉe Tišljar Eŭropo konsistigu civilan nacion, kiu kunmetiĝas el etnaj nacioj kaj subetnoj.

La kompreno pri la subeŭropa nacio estas etnicisma: 'La burĝa revolucio de la 18-a jarcento postulis laŭeble grandan teritorion por evoluigi laŭeble grandan merkaton. Tio rezultis per ekesto de la nocio 'nacio', kies difino estis la jena: nacio estas ŝtato. Ĉiu kiu loĝas en Francio estas franco! [...] Ke nacio estas io alia, tion oni longe ne komprenis (nome la kuneco de kulturo de iu homgrupo, kiu inkluzivas lingvon, kutimojn, vivmanieron, edukadon, komunajn ideojn, ofte religion ktp)...' [p. 52-53] Ĉi tiu pritrakto ignoras, ke la difino de la vorto 'nacio' ne estas afero de kompreno, sed de konvencio. La difino de 'nacio' kiel ŝtato (aŭ ŝtatanaro) historie antaŭis la etnicisman difinon de la vorto. La unua difino respondas al la civila naciismo, la dua al la etna naciismo.

Ernest Gellner, dum la pasintaj jardekoj multinflua esploranto de naciismo, difinas la terminon *naciismo* jene: 'Naciismo estas teorio de politika legitimado, laŭ kiu la etnaj limoj ne rajtas malkoincidi kun la politikaj: Precipe interne de ŝtato neniuj etnaj limoj rajtas dividi la regantojn disde la regatoj – kiu ebleco estas jam formale ekskludita per la ĝenerala formulo de la principo.' Laŭ la naciisma principo, en legitimaj politikaj unuoj devas esti kongruo de teritorio, popolo (ofte strikte komprenata kiel etno) kaj kulturo.

Tišljar lasas neniun dubon pri tio, ke la internaj politikaj landlimoj en la EU-Eŭropo strikte kongruu kun la limoj inter la etne komprenataj nacioj, avertante eĉ, ke ekzistas 'iluzio de la nunaj EU-gvidantoj' voli 'malefikigi kaj iom post iom forigi la naciajn identecojn per la evoluigo de 'Eŭropo de regionoj''. [p. 40] Laŭ la donita priskribo, temas pri la 'eŭroregionoj', ĉelandlimaj regionoj ampleksantaj teritoriojn de du aŭ tri landoj kaj difinitaj surbaze de ekonomiaj, ekologiaj k.a. kriterioj. Tišljar opinias, ke la 'ideo evoluigi Eŭropon de regionoj por tiel detrui la naciojn estas danĝera miskompreno de la socia funkciado kaj kondukas al detruo kaj civitana milito.' [p. 41] La ĉeesto de tia sennaciigo-fobio ŝajnas indiki, ke Tišljar opinias la nunajn (etne difinitajn) naciojn kvazaŭnaturaj entoj, pro kio eĉ la provo manipuli ilin kondukus al socia malintegriĝo. Perpleksige estas, ke li ekvidas danĝeron jam en la 'eŭroregionoj', kies celoj kaj influprofundeco nun estas kaj anticipeble restos tre limigitaj.

Kontraste, la projektata Eŭropo de Tišljar respondas tute al la civila imago pri nacio, naskiĝinta en la burĝaj revolucioj kaj radikanta en la klerismo. Tial eĉ la rivala superpotenco Usono rajtas pozi kiel ĝia modelo. 'Do oni devas evoluigi eŭropan konscion, komunan idearon, kiu proponas kontentigajn respondojn al la demandoj, kial oni estu eŭropanoj, kial konstrui Eŭropan Union, pro kiu eŭropano fieros esti eŭropano kaj amos Eŭropon. Sed ne troigi – lasi sufiĉan individuan liberecon dubi pri tiuj ideoj. Sen komuna idearo, sen eŭropa patriotismo, Eŭropo disfalos. [...] Usono estas ekzemplo de bone ekvilibrigita rilato inter la komuna kredo pri amerikaneca identeco kaj individuaj pensliberecoj.' [p. 36-37]

Sed tiu Eŭropo estu pli ol pure administra unuo – ĝi nepre baziĝu sur 'granda ideo', je kiu laŭeble ĉiuj kredu. 'La socioj klopodas evoluigi laŭeble tian socian ideologion, kiun fortege kredos ĉiuj membroj de la koncerna socio aŭ almenaŭ granda plimulto. [...] Kiam iu socio atingas tion, ĝi fariĝas pli efika ol averaĝa socio...' [p. 36] 'Kiuj estas la veraj grandaj ideoj de Eŭropo, pro kiuj povus fieri ĉiuj eŭropanoj? Ŝajnas al mi, ke – krom la baza kaŭzo, kial oni klopodas kreskigi Eŭropan Union, nome certigi la pacon en Eŭropo – tio estas demokratio de diversecoj! [...] La senco de Eŭropa Unio estas montri al la homaro, ke ĉiu homo daŭre havas plurajn identecojn kaj apartenas samtempe al pluraj grupoj. Eŭropa Unio subtenas

apartenon de siaj civitanoj al kiom ajn granda nombro da grupoj kaj stimulas la pluridentecon!' [p. 37] La politika plurismo evidente ne estas la elstara trajto de la 'pli efika ol averaĝa' socio, se en ĝi la granda plimulto kredas je unueca ideologio.

Kaj Eŭropo, superetna politika unuo, ne reglementu la etnajn aferojn detale, ĉar konvenas 'lasi al ĉiu unuopulo aŭ homgrupo senti ian ajn identecon kaj organiziĝi libere kiel ajn: teritorie, kulture, lingve, religie kaj ne klopodi tion unuecigi' [p. 53] 'Ni ĉiuj ricevu eŭropan pasporton, en kiu ne troviĝos distingo rasa, nacia, religia, lingva aŭ iu ajn alia.' [p. 54] Nu, jen escepta pozitiva ideo. Tišljar, diference de ekstremaj etnonaciistoj, evidente ne alcelas socian ordon, en kiu individuoj devige membras en etne difinitaj, per politikaj funkcioj ekipitaj 'komunumoj'.

Eŭropa misiismo


Por Tišljar la EU estas multe pli ol utila, ekonomie progresiga aŭ pacon garantianta politika aranĝo. Ĝi estas por li institucio kun mondsignifa misio, kaj pro tio 'ni helpu al Eŭropa Unio plu kreski kaj fortiĝadi kun la tendenco, ke tiu nova ŝtupo de la homara historio iĝu modelo ankaŭ por aliaj.' [p. 6] Tiu misio plenumiĝu ankaŭ per teritoria ekspansio dum longa tempodaŭro, kvankam la ekspansio okazu per libervola aliĝo. 'EU fieru pri si kaj sia escepta rolo en la monda progreso, sed ĝi restu daŭre malferma.' [p. 6] 'EU ne malebligu aliĝon al iu ajn najbara lando, kiu volas aliĝi, eĉ ne al tiuj, kiuj ne plu estas formale en Eŭropo!' [p. 6] La Eŭropa Unio ja estu 'ĝermo de unuiĝo de la tuta homaro' [p. 6]

Ke tiu glora patrujo rivalos kun la nun dominanta superpotenco, estas tute konsekvence. 'Kiam Eŭropo havos sian identeclingvon, kiun konos ĉiuj 400 milionoj da eŭropanoj, internetuzantoj devos ĝin uzi sammulte aŭ eĉ pli ol la anglan. Kiu tiam postrestos?' [p. 39]

Kaj kiel ĉiuj ĝisnunaj naciismoj, ankaŭ ĉi tiu instrumentigos la lernejon por gajni la korojn kaj muldi la intelektojn de la nacianoj. 'Por la supernacia identeco, kia la eŭropa, estas necese investi multe pli da energio per tiusenca multflanka edukado, por evoluigi ĝin kaj plenigi ĉies koron per amo por la eŭropa patrujo.' [p. 49; mankas la koncerna alineo en la SR-versio]

Klasneŭtrala mondrigardo

Sen diri ĝin eksplicite, Tišljar kiel multaj aliaj esperantistaj aŭtoroj traktas etnajn problemojn, kvazaŭ ili estus la socia ĉefkontraŭdiro. Etnaj kontraŭdiroj plene eklipsas klasajn. Tiu cirkonstanco ebligas al ili optimisme argumenti, ke la plej multaj kontraŭdiroj de la mondo, ĉar etnaj, estas solveblaj per interakordiĝo. 'Ŝajnas, ke en la monda historio io revolucia okazas, io inversas ĝian kondutmanieron kaj movas la grandan historian radon al direkto, en kiu oni solvas la sociajn konfliktojn per komunikado kaj per bona volo.' [p. 5]



Efektive, perforto kaj altrudo ĝenerale ne aperas ĉe Tišljar, ĉiukaze ne ĉe klasaj konfliktoj, kiuj restas ekster lia vidkampo. Perforto povas tamen okazi laŭ li pro la sintrudemo de enmigrantoj, kiuj insidas kontraŭ la indiĝena kulturo de la lokoj, al kiuj ili translokiĝas: 'Regiona identeco estas nepra bezono de ĉiuj homoj, ĉar per ĝi ili defendas sian regionan hejmon kontraŭ eventualaj malnormalaĵoj, kiam tro multaj aliregionanoj alloĝiĝas kaj klopodas perforte ŝanĝi la regionan kulturon, trudi la sian.' [p. 31] Ni vidas ĉi tie la spuron de la etnoplurisma koncepto, ke etnoj havas ne nur 'rajton esti diferencaj', sed eĉ 'devon' je tio. Evidentas, ke la 'malnormalaĵoj', pri kiuj Tišljar parolas, estas la efikoj de kultura interasimiliĝo, kiu okazas, kiam diversetnaj homoj loĝas sur unu sama teritorio! Pro tio la neceso de 'identeco', kiu helpu defendi kontraŭ la kulturmiksiĝo, kiun modernaj naciistoj entute abomenas. Nunepokaj naciistoj estas rimarkinde liberaj de tiu ŝovinismo, kiun multaj senĝene atribuas al ĉiuj naciistoj, dum ili estas des pli fanatike miksofobiaj, alivorte, ili vidas en malklariĝo de la distingoj inter etnaj kaj naciaj kulturoj antaŭsignon de kulturdisfalo.

La klasaj kontraŭdiroj evidente ne estas por Tišljar problemaj. Eŭropistoj devas pacience kaj amikece alparoli la burĝaron, inokuli al ĝi la fidon, ke ankaŭ en la eŭropa patrujo ĝi restos la reganta klaso, dum la ĝis nun superregataj klasoj restos tie, kie ili ŝajne devas laŭ li resti – sube. 'Necesos sekve nekredeble granda streĉo de ĉiuj eŭropaj fortoj, kiuj komprenos ĉi tiun eŭropan celon, iom post iom malfortigi la psikologian barieron en la nunaj naciaj elitoj de la eŭropaj ŝtatoj, forigi ilian neracian timon, ke per la eŭropa identeco ili perdos sian potencon super sia popolo.' [p. 44; mankas en la versio aperinta en SR]

Aŭgurado

La 13a ĉapitro titolita *Eŭropa manifesto* traktas programecan dokumenton prezentitan al la SAT-kongreso en Maribor en 1995. Ĝi evidentigas, ke Tišljar perceptas la danĝeron de la etna naciismo, ion, kio malpli klare konturiĝas en la ceteraj, pli poste verkitaj partoj de la libro. Li parolas ĉi tie pri la 'ĉiam pli ekstrema naciismo kaj ŝovinismo, moderne nomita etnopurismo' [p. 50] kaj atakas ĝian 'malhumanisman ideologion, per kiu en unuopaj ŝtatoj povas avantaĝe vivi nur unu nacio aŭ unu religio' [p. 50-51]. Li situigas la 'purismon' unuavice en la malriĉaj, precipe la postkomunismaj landoj, sed parolas pri la danĝero, ke 'infektiĝos partoj de la demokratia bloko, speciale de la Eŭropa Unio per la purisma viruso.' [p. 52] El tio li derivas la neceson fondi 'movadon, kiu batalos por eŭropa konscio, por eŭropa identeco kiel primara identeco' [p. 54] Ne eblas ne agnoski, ke la 'eŭropa ideologio' estas honesta provo projekti civilizitan formon de naciismo, sufiĉe allogan por repuŝi la multloke furiozantan etnonaciismon. Sed ĉu eblas efike kontraŭi la bataleman etnonaciismon per doktrino, kiu mem propagandas parton de ĝiaj ideaj premisoj?

Timiga estonteco estas atendata por Eŭropo, se ĝi ne adoptos la receptaron de la anoj de 'eŭropa konscio'. La perspektivo de Eŭropo sen la 'identeclingvo' estas pli katastrofa ol ĝi estas glora kun ĝi: '...dum la stato estas

tia, kia la nuna, nome dum EU ankoraŭ ne estas federacia ŝtato – naciaj ŝtatoj en ĝi ne sentas rektan atakon al siaj identecoj, sed kiam post deko da jaroj la pozicio de la angla ankoraŭ pli fortiĝos kaj EU fariĝos federacia ŝtato, la aferoj komplete ŝanĝiĝos. Subite ĉiuj popoloj (krom la britaj) subite sentos sin trompitaj... [...] Ekestos streĉo, kiu eksplodigos Eŭropan Union.' [p. 29] Aŭ en alia loko, simile: 'Baze de trudita neneŭtrala angla lingvo kreskos nova imperio, en kiu ĉiuj neanglaj denaskuloj sentos malkontenton kaj post kelkaj jardekoj tia Eŭropo disfalos eksplode...' [p. 55]

Simile tenebraj estas la atendoj por la mondo kiel tuto en la unua duono de la 21a jarcento: 'Post la falo de la opozicio ***KAPITALISMO-KOMUNISMO*** komencas kreski nova opozicio: ***DEMOKRATIA ŜTATO-PURISMA ŜTATO.'*** [p. 49] Post tio, 'komence estos militoj inter la purismaj landoj mem, sed kelkaj el ili komencos endanĝerigi rekte la okcidentajn demokratiojn. Rekreskos la stato de malvarma milito inter la demokratia bloko, kaj la purisma bloko...' [p. 51]

Pri ĉi-specaj geopolitikaj spekulativaĵoj ne eblas diri multe pli ol, ke la estonteco montros, kiom da pravo ili entenas. Eblas kritiki, ke ili metas naciajn kaj identecajn demandojn en la fokuson de atento – je kosto de la apenaŭ tuŝitaj socialaj, ekonomiaj kaj ekologiaj demandoj, kvankam tiuj lastaj tre verŝajne pli decidos pri la estonteco de la mondo.

La trodesegnita kontraŭ starpunkto

Kiel multaj naciismoj, ankaŭ ĉi tiu plurtavola naciismo avidas esti io alia ol naciismo. La aŭtoro mencias la 'naciismon' plurloke laŭ maniero, kiu kredigas, ke temas pri io alia ol lia koncepto. Li montras sin eĉ konvinkita, ke la propra idearo revoluciigas la ĝisnunan sciencon, kiam li parolas tre ĝeneralige pri '...la ĝisnuna sociologio kaj lingvistiko, kiuj esence servas al la naciisma koncepto de la nuntempaj naciaj ŝtatoj.' [p. 7] Ĉar Tišljar opinias sian propran koncepton nenaciisma, kaj ĉar laŭ li 'ĉiu naciismo estas karakterizata de ekspansiismo' [p. 51], necesas konkludi, ke ekspansiismo estas por li nur io militkaraktera, ĉar ja ankaŭ por la EU li antaŭvidas teritorian etendiĝon, sed senperfortan.

Tišljar bildigas la hodiaŭan naciisman realon tre draste, tiel ke lia propra

Sekvo p.38

La nova dekstrularo

Gary Mickle

Per la terminoj «nova dekstrularo» kaj «novdekstra» oni celas (en Eŭropo – dum en Norda Ameriko oni uzas la saman terminon alisence) politike dekstrajn grupojn kaj tendencojn, kiujn karakterizas: metapolitika strategio de longdaŭre konceptita laboro por modifi la bazajn politikajn ideojn kaj la valorsistemon en iu socio, kontraste kun aktualpolitika laboro en kampanjoj kaj partiaj luktoj, intelektuleco, kiu rezultigas afinecon kun universitate kleraj, opiniokreaj, unuavice junaj sociaj medioj, modernigitaj lingvouzo kaj publika bildo, tute aparte senigitaj je trajtoj, kiuj dekomence forpuŝus membrojn de la celata medio, malfermeco por dialogo kun maldekstruloj, precipe kun la vojserĉantaj en krizaj fazoj de la maldekstra politiko, "maldekstra-dekstra" aliro, kiu senantaŭjuĝe plukas kaj utiligas unuopajn maldekstrajn kaj ŝajnmaldekstrajn ideojn por tiel sintezi politikan orientiĝon, kiu, kvankam kerne reakcia, ŝajnigas kreive transcendi la distingon inter "maldekstra" kaj "dekstra" (kiun oni kutime deklaras malaktualiĝinta).

La nova dekstrularo datiĝas de la malfruaj 60-aj jaroj, do ĝia noveco estas relativa. Kelkrilate ĝi konscie daŭrigas la politikan tradicion de la germana t.n. Konservativa Revolucio, politika movado, kiu en la 20-aj kaj 30-aj jaroj antaŭlaboris por akceptigi la faŝismon en burĝaj-intelektaj rondoj, kiuj ja ne sentis sin dekomence altiritaj al la plebecaj nazioj.

Ĉi tiu politika tendenco havis sian postmilitan lulilon ĉefe en Francio (kie unue vaste uziĝis ankaŭ la termino "nova dekstrularo"). Fine de la 60-aj jaroj radikalaj dekstruloj en Francio komencis rekoni, ke la klasika partipolitika vojo al la politika regpovo ne plu alportas menciindajn sukcesojn. Baldaŭ ili trovis novan strategion: kelkaj protagonistoj rememoris pri la tezoj de la itala komunisma pensanto Antonio Gramsci, kiu diris, ke la vojo al la politika regpovo en la plej evoluintaj landoj kondukas tra la "metapolitiko". Per tio li celis la strebadon al "kultura hegemonio" per monopoligo por si de unuopaj temkompleksoj kaj aktiviĝo sur la kultura scenejo de iu lando, ekzemple per la fondo de kulturaj revuoj kaj la iniciato de teoria diskurso pri la ĝusta politika vojo.

La celo ne estis agadi en la politiko de la aktuala tago aŭ atingi bonajn rezultojn okaze de elektoj, sed remuldi mentalecojn kaj disvastigi novan valorsistemon, kies politika realigo eĉ ne estis ilia afero.

En marto de 1968 estis fondita la gazeto Nouvelle École (Nova Lernejo). En januaro de 1969 sekvis en Nico la fondo de la organizaĵo Groupement de Recherche et d'Etude pour la Civilisation européenne (GRECE)(Grupo pri esploro kaj edukado por la civiloj de Eŭropo), en kiu gvide rolas de tiu tempo la ĉefteoriisto Alain de Benoist. Ĝi estis konceptita kiel diskutforumo de la nova dekstrularo. Ĝia laŭstatuta celo estas plenumi metapolitikajn studojn. GRECE havis jam en 1983 laŭ siaj propraj indikoj ĉirkaŭ 3000 membrojn, organizitajn en 30 lokaj kaj regionaj grupoj. Aldoniĝas rondoj de subtenantoj, kiuj rekrutas el inter ĵurnalistoj, artistoj kaj sciencistoj. Oni fondis eldonejojn.

GRECE eldonas diversajn periodaĵojn, al kiuj apartenas la teoria gazeto Nouvelle École, kiu de 1974 ricevas dotaĵojn de la Académie Française (Franca akademio). Ĝin subtenis diverstendencaj dekstraj aŭtoroj, ankaŭ el la rasisma kaj faŝisma spektro. Pliaj gazetoj estas Eléments (Elementoj) – La Revue de la nouvelle droite, (La revuo de nova dekstro) la recenzorevuo Panorama des idées actuelles (Panoramo de aktualaj ideoj), Études et Recherches (instruo kaj esploro) kaj la membrogazeto Le Lien (la ligo). La legantaro de Nouvelle École (Nova lernejo) ekzemple estas laŭ opiniosondo inter legantoj en la plimulto juna kaj universitate klera.

Fine de la 90-aj jaroj okazis grava skismo en la franca novdekstrularo. Anoj de pli dura linio disiĝis de tiuj, kiuj kun de Benoist deziris malfermiĝon al la komunumismo.

Sekvo p. 39

naciisma koncepto flanke de la pajlofiguro de tiu laŭdire nun aktuala 'naciismo' aspektas milda. Laŭ tiu bildigo, '...ĉiu ŝtato klopodas eduke persvadi ĉiujn siajn gejunulojn en la baza deviga lernsistemo, ke la koncerna ŝtato havas apartajn valorojn, ke ĝi pro multaj aspektoj estas la preferinda loko por la homa vivo, ke ĝiaj diversaj valoroj estas la plej bonaj, ke la vivsenco de tiuj junaj homoj estas kontribui al la fortigo de tiu ŝtato kaj ĝia longdaŭreco, kaj se ĝi tion postulas, doni ankaŭ sian vivon por ĝi. Al tiu eduka celaro aliĝas ankaŭ la religia eduko, kiu instruas, ke la ĉefa religio de la koncerna ŝtato estas la nura ĝusta kaj vera, ke kredi nur al tiu tipo de dogmo garantias postmortajn premiojn. [p. 42; mankas en la SR-versio] La ĉi tie referata naciismo bazita sur 'senkritika amo al la patrujo' [p. 42; mankas en la SR-versio] aspektas kiel tiu de aŭtoritatismaj ŝtatoj en la unua duono de la 20a jarcento aŭ en tempo de milito. Ankaŭ la priskribo de la religipedagogiaj celoj de tiu naciismo memorigas pri kredenhavoj, kiuj en multaj konfesioj cedis al pli toleremaj, en la katolikismo, ekzemple, post la 2a Vatikana Koncilio. Necesas konstati tion ne por laŭdi la modernan naciismon aŭ la modernan lernejan religipedagogion, sed por montri kiel reakciaj ideologioj estis devigitaj moderiĝi kaj transformiĝi dum la dua duono de la 20a jarcento, kiam ili troviĝis en defensivo. La moderiĝo kaj transformiĝo de reakciaj ideologioj tamen ne senungigas ilin, sed savas ilin por la tago, kiam ili povas transiri al ofensivo. Tio koncernas kaj la naciismon kaj la religion.

La aŭtoro do agnoskas la problemon, kiun la etna naciismo prezentas. 'La nova (malnova) ideologio, kiu helpas ilin [la malriĉajn landojn] en tio estas la ĉiam pli ekstrema naciismo kaj ŝovinismo, moderne nomita etnopurismo. Tamen ne temas nur pri etnopurismo sed ankaŭ pri religipurismo, politika purismo ktp, tial plej ĝenerale oni nomu ĝin: ***PURISMO***.' [p. 50] Bedaŭrinde, li ne atakas la fundamentajn premisojn de la etna naciismo, precipe la de li mem konfesatan identeco-doktrinon, sed provas 'malsovaĝigi' tiun naciismo-varion, integrante ĝin en pli kompleksan tuton de plurtavola naciismo kiel unu tavolon de ĝi – kontraŭpezatan de plia tavolo, la civila kaj tuteŭropa.

Faktaj malĝustaĵoj

Kelkaj malĝustaj aŭ dubindaj faktaj asertoj aperas, kie ili servas argumentajn bezonojn.

Ĝeneraligi pri la sociologio, dirante, ke ĝi ĝis nun servis la interesojn de unu el la varioj de naciismo, estas tre simplige. 'Nepras profunde analizi kaj starigi bazon por nova sociologio. La ĝisnuna sociologio servis al la ĝisnuna konflikthistoria socio stariginte antaŭjuĝajn dogmojn necesajn por identeco de ŝtatoj...' [p. 7].

La inflacia uzado de la nocio 'identeco' en nia epoko atribueblas interalie al ĝiaj radikoj ĝuste en la individua psikologio, scienca fako dominita meze de la 20a jarcento de usonanoj kaj ĝenerale ne suspektita pro reakcieco. Tiu nesuspektoveka deveno igis la nocion utilega kadre de nove muntitaj naciismaj doktrinoj en epoko, kiam la naciismo devis aspekte malsimiliĝi de la senkreditiĝintaj faŝismaj kaj militarismaj naciismoj. Ĝia uzado kongruas kun la psikologia orientiĝo de teorioj, kiuj situigas la akiron de etneco en la primaran (familian) ensociigon, malemfazante la pli frue elstarigitan biologian-genetikan heredadon, kiu en malnovaj naciismoj ofte pariĝis kun rasismo. La transiro de la 'sango'-metaforo al la metaforo de la 'patrina lakto' estas simptomo de vera kopernika revolucio en la reakcia pensado. Tišljar, nekonscia pri la idehistoria evoluo de la nocio 'identeco', komprenas la aferon alie: 'Ŝajne, ke ne multaj komprenas, ke ne ekzistas individua identeco. Identeco signifas ion identan, neŝanĝeblan, konstantan. Individuo havas nenion konstantan.' [p. 14]

Dubinda estas ĉi tiu pritakso: 'Se lingvo estus nur komunikilo, kiel nuntempe asertas ne nur la 'sobraj' lingvosciencistoj sed ankaŭ politikistoj, do nur rimedo, jam de longe ĉiuj parolus unusaman lingvon.' [p. 17] Alivorte, tutmonda lingvo nur tial ne jam aperis, ĉar lingvo devas esti socia distingilo. Reaperas iom poste la samtendenca ideo, ke la diverseco de sociaj grupoj devas respondi al analoga plureco de lingvoj: 'Ĉu estas ebla tutmonda lingvo, se ni konsideras, ke lingvo devas esti ankaŭ socia diferencigilo? Al tiu demando mi ne kapablas kategorie respondi. [...] Sed komunikadi eblos ĉiam ankaŭ en kelkaj lingvoj, ne nepras ke estu nur unu. Logike do tutmonda lingvo ne estas ebla...' [p. 18-19]

Fakte eraraj estas la eldiroj pri Usono. Tio okazas verŝajne pro la aŭtora deziro valorigi la fondotan superpotencon je kostoj de la jam establita superpotenco, kion li faras per kontrastigo inter la usona fandpoto kaj la alstrebata Eŭropo de etnaj nacioj. 'Ĝi [Usono] efektive ne subtenas grupajn naciajn identecojn, sed nur la tutnacian usonan, eĉ religioj ne estas tutŝtate egalrajtaj – ja la ŝtata religio estas kristanismo.' [p. 37] La vero estas alia. La ŝtata politiko kaj la publika atento en Usono tradicie koncentriĝas pli sur rasaj ol sur etnaj demandoj, sed ambaŭ ja ofte interkovriĝas. La oficiala, leĝa rasismo efektive kreis kaj subtenis dum generacioj homologaĵon de la 'grupaj naciaj identecoj'. La sintenoj pri partikularaj identecoj multe ŝanĝiĝis ekde la 70aj jaroj en Usono, kiam la procezo de etna-rasa memkonsciiĝo komenciĝis ĉe multaj grupoj kaj kiam multaj homoj aliĝis al la moda 'serĉado de siaj radikoj' – tiel multaj, ke oni povas rigardi la kulton de identecoj kaj etna diverseco kiel unu faktoron de la disfalo de la usona maldekstrularo. La evoluo de sociaj sintenoj do paralelis tiun, kiu okazis en Eŭropo, precipe en tiuj landoj, en kiuj preskaŭ samtempe populariĝis la etnismo kaj la temo de regionaj kulturoj. Pri religio: Usono ne havas ŝtatan religion, kvankam la religieco de kelkaj partoj de la socio estas ekstrema.

Unuflanka atento al la lingvo kiel etnecfaktoro karakterizas precipe la etnisman naciismon, al kiu esperantistoj sentas afinecon. Tišljar estigas ŝajnon de objektiveco rilate etnajn aferojn per la sinrilatigo al kelkaj mezureblaj lingvaj fenomenoj, kio enkondukas elementon de ekzakteco. Dum la tradiciaj etnistoj aplikas ekkonojn de la kompara lingvistiko por 'pruvi' aŭ 'malpruvi' la ekziston de etnoj, la plurtavola naciismo de Tišljar uzas alian mezuron, la proporciojn de diversaj lingvoj en la uzado de individuo, por 'pruvi' la amplekson de ilia identecogenera funkcio: 'Ĝian [de lingvo] identecan, emocian valoron ni povas mezuri per tempouzo de unuopaj lingvoj: kiom da procentoj da nia paroltempo ni parolas unu aŭ alian lingvon. La utilecan, komunikan valoron ni mezuras per ekonomia, merkata kriterio: kioman teritorion kovras iu lingvo.' [p. 46] Tišljar priskribas nereale homogenan socion de samkutimaj homoj, kiam li eldiras la jenon: 'Ĉiu unuopulo ja vivas pli-malpli 95% aŭ pli de sia tempo en sia urbo, en sia

regiono kaj parolas 95-procente en sia loka dialekto...' [p. 46]

Plurtavola naciismo en la skemo de naciismaj teorioj ĝenerale

Eblas ellabori diversajn tipologiojn de naciismo, interalie laŭlonge de skalo de la relativa grandeco de la naciaj unuoj, al kiuj ili rilatas. Kvar facile distingeblaj bazaj tipoj estas:

a) ***mikronaciismo***: naciismo-formo, kiu etendas la nacieco-nocion al malgrandaj libervolaj 'komunumoj'. Pli marĝena naciisma fenomeno. Rasmussen difinis *mikronacion* kiel 'enton kreitan kaj tenatan kvazaŭ ĝi estus nacio kaj/aŭ ŝtato, kiu ĝenerale portas kelkajn, se ne ĉiujn, atributojn de nacio, kaj ankaŭ ĝenerale kelkajn el la atributoj de ŝtateco'. Al ĉiu esperantisto konata estas la Esperanta Civito, kiu celas altigi sian prestiĝon per speco de kreiva mikronaciismo. (La termino *mikronaciismo* uziĝas ofte ankaŭ alisence.)

b) ***etna naciismo***: naciismo respondanta al la romantikisma kompreno, laŭ kiu nacio estas komunumo de samtradiciaj kaj – kutime plej grave – samlingvaj homoj. La etna naciismo ofte 'enfakigas' homojn laŭ precizaj etnaj kriterioj, atribuas teritoriojn al etnoj laŭ 'historiaj rajtoj', dum ĝi strebas etendi la aplikadon de la naciisma principo de 'nacia memdispono' (aŭ 'memdeterminado') al etnoj, kiuj ne posedas ĝis nun politikan memstarecon.

c) ***klasika ŝtatnaciismo***: naciismo de grandaj modernaj ŝtatoj, kiuj povas esti centralizitaj, kiel en la kazo de Francio, aŭ federaciaj, kiel en la kazo de Usono. Ne malofte ĉi tia naciismo apogiĝas ideologie sur laŭsupoze mondvalidaj idealoj respublikaj, demokratiaj, eĉ revoluciaj, kiel ĉe Francio, Usono aŭ la eksa Sovetunio.

ĉ) ***mondnaciismo***: politika tendenco, kiu alstrebas nacio-similan tuthomaran politikan organizon, rudimente ĉeesta almenaŭ en la retorikaĵoj de kelkaj tutmondistoj ('planeda patriotismo' ĉe Zamenhof kaj Lanti), kaj pli eksplicita ĉe kelkaj islamaj sektoj, kiuj malakceptas la ekziston de la nunaj nacioj kaj antaŭvidas estontan 'mondan kalifejon'.

Supraĵaj kritikantoj de la naciismo, kiel la plimulto de esperantistoj, kutime aplikas la terminon nur al fenomenoj respondantaj al tipo c), kaj ofte eĉ

Jam pli frue apartiĝis de GRECE frakcio, kiu forlasis la vojon de metapolitiko por agadi unue en la franca ekstremdekstra Front National, poste en la partio MNR, kiu skisme disiĝis de ĝi.

La institucio GRECE kaj ĝiaj eldonaĵoj servis kiel modeloj por la novdekstraj grupoj, kiuj baldaŭ fondiĝis en aliaj okcidenteŭropaj landoj. En Germanio ili donis impulson al similaj rondoj, kiuj jam pli frue estiĝis ĉirkaŭ periodaĵoj kiel Nation Europa kaj Junges Forum, sed restis multe malpli grandaj ol la francaj grupoj. Fine de la 70-aj jaroj formiĝis en Germanio interalie tendencoj nacirevolucia kaj etnoplurisma (ĉirkaŭ la gazeto Wir selbst). Pli grandan popularecon akiris la en 1986 fondita semajna ĵurnalo Junge Freiheit. Novdekstraj grupoj aktivas jam delonge en Italio, Hispanio kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj. Analogan rolon de "pensfabriko" kiel GRECE celas plenumi institucioj kiel la Thule-Seminar en Germanio kaj Voorpost en Nederlando. Ekde la 90aj jaroj simile agadas grupoj en kelkaj orienteŭropaj landoj.

La rusia eŭrazia "naci-bolŝevisma" movado de Aleksander Dugin, kiu komence de la 90aj jaroj fortiĝis parte per la financa kaj ideologia asisto de okcidenteŭropaj novdekstruloj (de Benoist, Steuckers), dum la lastaj jaroj fariĝis mem sukcesa eksportanto de la eŭraziismo, je kiu kreskanta nombro de ekstremdekstraj grupoj en okcidentaj landoj orientiĝas.

Ne ĉiam facilas fari ĝeneraligojn pri la konceptoj de la nova dekstrularo. Ĝi estas loze organizita medio pli ol movado, kaj ĝi ne alstrebas ideologian unuecon. Eblas diri, ke multaj el ĝiaj ideologoj tezas la ekziston de krizo en la Okcidento, al kies simptomoj apartenas manko de orientiĝo, disfalo de valoroj, krimeco. Ili proponas alternative al la "makdonaldizo" de Eŭropo kiel senradika kultursatelito de Usono la retrospektivon al la propraj radikoj. Rekrutante por siaj celoj i.a. teoriulojn de la intermilita Konservativa Revolucio, antaŭe preskaŭ forgesitajn, kaj modernajn natursciencistojn, ili ellaboris starpunktojn, kiujn oni povas resumi jene:

1. Ideojn pri la egaleco de la homoj la nova dekstrularo malakceptas. Ĝi estas kontraŭegalisma. Oni foje argumentas en ĉi tiu kazo per sociobiologiaj argumentoj, kiuj baziĝas sur teorioj de genetika determino. Tiumaniere, hierarkia strukturo ene de popolo kaj socio regata de elitoj, praviĝas kvazaŭnature.

2. Oni taksas, ke la liberala impulso de la franca revolucio spronis la individuan strebadon al feliĉo, kiu manifestiĝas hodiaŭ per la kapitalismema negocista animstato de la homoj. La homo estas degradita al konsumanto. Ĉi tie la ideologio de la nova dekstrularo forte diferencas de tiu, kiun propagandas aktivaj politikistoj de establitaj dekstraj partioj. Ĉe la nova dekstrularo troveblas do fortaj elementoj de kontraŭkapitalismo.

3. Oni deziras la remalkovron de la laŭdire komuna hindeŭropa pasinteco de la eŭropanoj, de la paganaj keltaj-ĝermanaj kultoj kaj la politeismo, kiujn la kristanismo subigis. La judan monoteismon oni figuras kiel fonton de totalismo, klarigante, ke la diversaj diinoj kaj dioj estis enkorpiĝoj de apartaj ideomondoj kaj unu bazo de tolerado. Oni malakceptas kaj la kristanan kaj la marksisman mondrigardojn, kiuj premisas suprenirantan evoluon al fina celo. Reprezentantoj de la nova dekstrularo preferas ciklan mondrigardon, kiu orientiĝas je la ĉiamaj flusoj kaj malflusoj en la naturo. La nova dekstrularo direktas sin kontraŭ la juda-kristana tradicio, per kio ĝia ideologio forte diferencas de la tradicia dekstra.

4. La nova dekstrularo servigas al sia mondrigardo la etologion. La agresado laŭ tiu estas normala socia maniero de sinesprimo, kaj el tio ili derivas kritikon de la koncepto de homaj rajtoj, kiu evoluis sub influo de kristanismo kaj liberalismo.

5. Kiel antidoton kontraŭ la fenomenoj de disfalo oni rekomendas la retrospektivon al la jam ekzistantaj valortradicioj kaj mitoj, kiuj devas esti rehonoritaj. Laŭ tiu vidpunkto, la mitoj fingromontras al la historiaj devenoj kaj estas esprimoj de kolektiva volo. Tiel la nova dekstrularo estas kontraŭklerisma. Interesa tiurilate estas la politike motivita kulto de J. R. R. Tolkien renkontebla en italaj novdekstraj rondoj.

6. La nova dekstrularo proklamas la "rajton de diferenco", per kio ĝi pravigas ĉefe la etnan diferenciĝon de la popoloj. Ofte el la rajto fariĝas devo de diferencado. Ekstremaj varioj de ĉi tiu ideologio, kiun esploristoj ofte nomas diferencismo, eĉ egaligas la

Sekvo p. 41

tiam nur, kiam aldone ŝovinismo percepteblas. Laŭ tia kompreno, naciisto estas homo, kiu amas sian 'grandan patrujon', sed eĉ pli malestimas la 'patrujojn' de la aliaj. Supraĵaj kritikantoj de naciismo rimarkas nur la plej malbelajn formojn de ĝi, kiuj videbliĝas en akutaj konfliktoj kaj militoj, aŭ ili identigas ĝin kiel la ideologion de ekstremdekstraj ŝovinistoj. Kie mankas profunda naciismo-kritiko, tie estas facile munti naciismajn ideologiojn, kiujn la plimulto de homoj ne rekonas kiel naciismajn. Ĉe la plurtavola naciismo ni vidas kiel tio povas okazi en la esperantista medio.

La plurtavola naciismo estas hibrida tipo, la provo de ĝuste tia novisma ideologia komponaĵo, kies karakteron diktas la bezono popularigi aferon, kies allogeco iĝis malpli universala dum la ĵusa jarcento. Pli ol iam antaŭe, novtipa naciismo devas ŝajni kvazaŭ io tute alia ol naciismo, por ke la ĝenerala publiko kaj ne nur konservativaj sociaj grupoj akceptu ĝin. Tio eblas, ĉar la naciismo estas fasonita el multaj subideologioj, el kiuj nur kelkaj plene disfranĝiĝis, dum aliaj restis sendifektaj. Nekonvencie komponita naciismo eskapas la kritikon de ĉiu, kiu imagas la naciismon tia, kia ĝi estis en iu pasinta epoko.

La plurtavola naciismo kombinas elementojn de du aŭ pluraj naciismotipoj. Ĉe Tišljar tio estas tipoj b) kaj c), t.e. etna naciismo sur la nivelo de la naciaj kaj lokaj unuoj de la estonta Eŭropo, kaj civila, grandnacia naciismo por la EU-Eŭropo kiel tuto.

Ekzistas ankaŭ aliaj ebloj. Implicita en la ideologio de la Esperanta Civito estas kombino de a) kaj b), t.e. de Esperanta mikronaciismo kun la etnonaciismo de malgrandaj etnoj. La silferisma ideo de la *ius sermonis* estas perfekta teoria fundamentigo por tia strategia alianco de naciismoj, kiu eble permesus al la Civito meti sian piedon trans la sojlon de la Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj, kion iuj anoj de la Civito efektive alstrebas longperspektive.


Kiel la plurtavola naciismo servas al la reganta klaso

Tišljar eksplicitigas ideologion jam implicitan en la observebla politiko de la eŭropa reganta klaso. Kelkaj aspektoj de tio, kion li prezentas kiel aŭdace novan pensadon, jam furoras en landoj de la EU-Eŭropo. Subetna regionismo, modera lingvobazita naciismo de la establitaj nacioj, eŭforia eŭropismo estas jam nun tipe renkontataj ideologioj en landoj kiel Germanio.

Estus tro bele por esti vera, se la regantaj klasoj de klasaj socioj rezignus sen batalo je la naciismo kiel civila religio. Kiu alia ideologio tiel efike sugestas al la regatoj, ke ĉiuj sociaj klasoj, la ekspluatistoj kaj ekspluatatoj, kunvivas en nedisigeblaj, eternaj kolektivoj kaj havas komunan destinon? Aliflanke, la monda situacio, en kiu la regantaj klasoj de Eŭropo devas manovri, ŝanĝiĝis kompare kun la frua 20a jarcento, la epoko, kiu produktis la batalantajn (faŝismajn) naciismojn, kiuj ĝis hodiaŭ difinas la publikan imagon pri tio, kio estas naciismo. Kelkaj faktoroj kunefikis por redifini por ĉiam la postulojn, kiujn la burĝaro faras al la 'varo' naciismo:

La ĝeneraliĝo de federacia regadsistemo en Eŭropo postulas de la civitano lojalecon, eĉ afekcian sinrilatigon al la unuopaj niveloj de la federacie ordigita tuto.

La malkoloniiga procezo enterigis por ĉiam la imperian 'gloron' de pluraj eŭropaj landoj, kreante vakuon, kiu devis esti plenigita per alia enhavo.



Tiu sama procezo, kune kun la ŝokefiko de la naziaj krimoj kaj krome la kontraŭrasismaj luktoj en Usono kaj Sudafriko enterigis la krudan, genetike bazitan rasismon kiel uzeblan ideologion.

La ekonomia tutmondiĝo trudas pli kaj pli intensan kunlaboron de diverslandaj homoj. Ŝovinismaj sintenoj kaj kondutoj devas malaperi en la intereso de reganta klaso mem, kiu estas ĉiam pli kosmopolite kunmetita. Oni notu, ke repuŝi la ŝovinismon tute ne signifas repuŝi la naciismon en ĝia funkcio kiel socia strukturprincipo.

La evoluo de la tekniko ŝanĝis la karakteron de la milito. Ĝi fariĝis pli detruiva kaj sekve pli selektive aplikata instrumento de la politiko. Ĝi estas hodiaŭ pli teknikintensa kaj malpli 'heroa' afero.

La moderna naciismo, kiun la reganta klaso de Eŭropo bezonas por siaj celoj, devas esti neŝovinisma, nerasisma, nemilitarisma – sed plurtavola kaj kapabla popularigi klas-transcendajn komunumojn kaj identecojn.

Afinecoj kun konceptoj de la Nova Dekstrularo

La plurtavola naciismo de Tišljar integras en si formon de regionismo, pli specife de etna federaciismo, kiu oftas en etnismaj politikaj konceptoj, ekz. ĉe la de Guy Héraud fondita skolo, al kiu apartenas ankaŭ Andrea Chiti-Batelli kaj Yvo Peeters. Ĉiuj tri jam de jaroj akompanas la Esperantomovadon kiel ideologiaj flankantoj. La etna federaciismo, kiu kapablas – kiel oni vidis dum la pasintaj jardekoj – formi ian amalgamon kun la esperantismo, facile integriĝas ankaŭ kun t.n. novdekstraj politikaj konceptoj. Kaj ĝi nun populariĝas ĉe dekstraj popolistoj de partioj kiel la itala ('padia') Lega Nord kaj la aŭstria FPÖ ('libereca' partio gvidata de Jörg Haider).

Formon de plurtavola naciismo – sistemigon de germana naciismo kaj regionaj subnaciismoj – defendis jam en la 20aj kaj 30aj jaroj la 'maldekstra' alo de la NSDAP (nazia partio) en Germanio. Tiu alo estis eliminita post la potencakiro de faŝismo en 1933. Kelkaj novdekstraj grupoj, kiuj repopularigis la etnan regionismon en Germanio en la 70aj jaroj, eksplicite revarmigis la heredaĵon de 'maldekstraj' nazioj kiel Otto Strasser, kiu pledis por federaciisme ordigita grandgermana ŝtato, kies federaciaj unuoj respondu al geopolitikaj, kulturpolitikaj kaj etnaj unuoj.

Tri eldiroj en la libro memorigas pri tipaj ideoj de la 'Nova Dekstrularo', troveblaj i.a. ĉe Alain de Benoist, fondinto kaj ĉefa ideologo de la novdekstra pensfabriko GRECE.

Unue, ke '...ne estas ebla tutmonda identeco' [p. 18], ideo, kiu pretersilentas la fakton, ke ne etnokulture bazita identeco ĉe individuoj kompreneble eblas kaj ekzistas, kaj ke grava politika identeco ĉe multaj estas ĝuste la internaciisma, universalisma, sennaciisma aŭ alia simila.

Due, la 'rajto de grupoj esti diferencaj', esprimita ekzemple en ĉi tiu kontrastigo de Usono kaj Eŭropo: 'Ĝi

[Usono] adoras la individuan liberecon, ne la liberecon de grupoj esti diferencaj. Eŭropo devus evoluigi sian identecon je tiu koncepto: kompreni la demokratecon kiel absolutan liberecon de grupoj evoluigi aŭ teni siajn diversajn subidentecojn kaj regi kunordigante inter ili per demokratiaj mekanismoj, en kiuj la ĉefan rolon havas la subsidiareca principo (malcentrisma).' [p. 38] La 'rajto de grupoj esti diferencaj' estas unu el la centraj sloganoj de tiuj novdekstruloj, kiuj kolektiĝas en la franca skolo ĉirkaŭ de Benoist. Tiu principo per si mem ne malbonas. Sed la novdekstruloj sisteme aplikas ĝin ne universale, sed al certaj (etne difinitaj) grupoj kaj iliaj diferencoj, sugestante kelkfoje eĉ 'devon' je diferencado.

Trie, la sistema kontrastigado de Eŭropo kaj Usono, kiu karakterizas kaj la eŭropan Novan Dekstrularon kaj Tišljar. Oni notu, ke la diskurso de Tišljar pri identecoj estas io alia ol kritika pritaksado de la diferencoj inter la eŭropa kaj la usona socioj. Per sia nehistorieca priskribmaniero, Tišljar tendencas eternigi kaj tiel *esencigi* la trajtojn de 'usoneco' kaj 'eŭropeco'.

Preskaŭ certe Tišljar ne enkondukas novdekstrajn ideojn en la esperantistan medion konscie, sed ĉerpas el la novdekstraj ideoj, kiuj pro la influo de homoj kiel Héraud, Chiti-Batelli kaj Janton jam cirkulas tie, kaj pluprilaboras ilin kune kun siaj personaj spertoj.

Plurtavola naciismo ne malhelpas ksenofobion!

Empiriaj spertoj sugestas, ke la modelo de plurtavola identeco, por kiu Tišljar varbas, neniel utilas kontraŭ la 'etnopurismo', la 'purisma viruso', kiujn ankaŭ li bedaŭras. Efektive, ia plurtavola identeco jam enradikiĝis en la konscio de multaj EUeŭropanoj. Regionaj kulturoj kaj identecoj multloke estas valorigataj pli ol en la pasinteco, dum la amaskomunikiloj rutine fortikigas la identecan senton de eŭropanoj. En Germanio multaj homoj danke akceptis la novisman identecon kiel anstataŭigaĵon por tiu hipertrofia germana nacia sento, kiu pro la faŝismo kaj la milito por ĉiam frakasiĝis. Ĉu la moderna Germanio eble eĉ estis la modelo, kies subtilan plurtavolan naciismon Tišljar iugrade priskribis ĉe la elformulo de la 'eŭropa ideologio'?

Sed malgraŭ tiu *reale ekzistanta* 'eŭropa ideologio', ksenofobio kaj rasismo ankoraŭ floras en partoj de la germana socio, kiel montras perfortaj atakoj kontraŭ azilpetantoj, murdoj kaj 'nacie liberigitaj zonoj' (regionoj, kie ekstremdekstruloj sisteme atakas alirasanojn, gejojn, maldekstrulojn, kiuj aŭdacas montri sin surstrate). Similaĵoj okazas aliloke en la EU.

La praktikaj konsekvencoj de la 'eŭropa ideologio'

Unu agadpropono de la aŭtoro estis 'organizi internacian movadon en eŭropaj landoj por konsciigadi eŭropanojn pri la neceso esti antaŭ ĉio eŭropano. Realigi tiun celon per *Asocio por Eŭropa Konscio*, kiu aktivos kadre de lokaj societoj por eŭropa konscio per ĉiaspecaj formoj de klerigado.' [p. 56] En la komenco de 1996 efektive fondiĝis tiu Asocio en Maribor, kaj laŭ eldiro de Tišljar en 1999 ĝi havis membrojn en 13 landoj. Antaŭnelonge li raportis la dungon de juna esperantisto kiel helpsekretario de AEK en Maribor, kio ebligos al ĝi 'pliampleksigi sian agadon'.

Dum la finaj tagoj de la Universala Kongreso en Zagrebo (2001-07-27 kaj 28) okazis en la sama urbo sub la aŭspicioj de la kroata ministrejo de kulturo seminario 'Eŭropa lingvo – utopio aŭ neceso?'. Partoprenis kaj esperantistoj kaj neesperantistoj, kiuj prezentis 16 prelegojn en tri sekcioj: 'La lingvo kiel identeca signo kaj multidenteco de unuopuloj', 'La lingva sekureco kaj fontoj de etnaj konfliktoj' kaj 'La edukado por europa konscio'. Kunorganizantoj estis la Asocio por Eŭropa Konscio, Maribor, la Societo por Eŭropa Konscio, Zagreb, kaj la Internacia Akademio por Lingva Juro (IALJ), Bruselo. Tiun lastan reprezentis ĝia sekretario Yvo Peeters, novdekstrulo kaj disĉiplo de Guy Héraud. Alia partoprenanto estis Andrea Chiti-Batelli, konata en la Esperanto-movado pro siaj verkoj dediĉitaj al la tezo, ke la

miksiĝon de popoloj (la "fandpoton") al "etnocido". La franca esploristo de rasismo Pierre-André Taguieff difinis la diferencismon kiel "vidmanieron pri la homaro, kiu prioritatigas la diferencojn inter la grupoj (rasoj, etnoj, popoloj, nacioj, civilizoj) kaj tendencas esencigi la kolektivajn identecojn" kaj "doktrinon bazitan sur radikala kultura relativismo, kiu premisas la nekunmezureblecon de la kulturoj (aŭ de grupaj mentalecoj) kaj ilian enfermitecon en si mem".

Multaj novdekstruloj mem nomas sian diferencisman doktrinon etnoplurismo. La diferencismo rezultigas afinecojn kun kaj partoprenon en politikaj fenomenoj kiel etnismo kaj "liberiga naciismo".

Jen punkto, ĉe kiu la vojoj de la novdekstruloj kaj la esperantistoj kruciĝas. La akcepto de etnismo kiel ideologia akompanaĵo de la esperantismo okazis kaj plu daŭras parte pro la aktiva kunhelpo de movadproksimaj personoj kiel Guy Héraud kaj Yvo Peeters, kiuj aktivas en novdekstraj medioj.

7. Multaj novdekstraj konceptoj bildigas la eŭropajn popolojn kiel viktimojn de kultura imperiismo, kies agantoj estas "eksterteritoriaj potencoj". Oni atakas precipe la usonajn kulturajn influojn kiel faktorojn, kiuj inhibas la disvolviĝon de la "identeco" de eŭropaj popoloj. Ĉi tiuj ideoj foje ligiĝas kun ideologio de "tria vojo" inter komunismo kaj ekonomiliberala kapitalismo. Ankaŭ ideoj de ĉi tiu kategorio ĝuas la subtenon de multaj esperantistoj.

Novdekstruloj restas identigeblaj kiel dekstruloj – malgraŭ la ne ĉiam "tipe" dekstraj ideaj enhavoj kaj stilo de publika elpaŝado – pro la subkuŝanta kontraŭegalisma kaj kontraŭuniversalisma idea fundamento. Necesas diferencigi inter la novdekstrismo kaj la dekstra popolismo kaj faŝismo, kiuj estas partipolitike orientitaj kaj kutime emfaze neintelektulecaj, kiel ankaŭ la tradiciorientita konservativismo (malnovaj dekstraj partioj, kristanaj integristoj kaj fundamentistoj k.s.)

Novdekstruloj ofte nestas en la "griza zono" inter ekstremdekstrismo kaj la establita dekstrularo, sed kun la specialaĵo, ke ilia mondrigardo kelkloke interkovriĝas kun tiu de iuj maldekstruloj. Ĝuste tio ebligas la de ili praktikatan strategion de la "transversa fronto", per kiu ili celas alianciĝi kun maldekstruloj tie, kie ideologiaj interkovriĝoj ekzistas. Observebla tio estas en la tutmondiĝokritika movado, kiel jam pli frue ĉe aferoj kiel la "liberiga naciismo".

Ankaŭ la Esperanto-movado sporade iĝis objekto de la strategio!

enkonduko de Esperanto povus 'savi' etnajn lingvojn kaj etnajn kulturojn kontraŭ la pereo, kiun minacas al ili la 'voranta' angla lingvo. (Esperanto mem laŭdire ne kapablas 'vori'.) En la politika areno de Italio li agadas kiel advokato de federaciismo kaj etnismo. En aprilo de 2000 li referis kune kun Peeters ĉe seminario okazigita honore al Guy Héraud, kiun organizis la dekstra-popolisma (kaj foje rasisma) Lega Nord.

Tišljar aparte notis la gravan, eĉ instigantan rolon de la neesperantistoj dum la seminario. Pri la dum ĝi adoptita rezolucio li konstatas, ke ĝin 'forte subtenis ĉiuj neesperantistaj membroj de IALJ, kiun gvidas ties sekretario d-ro Yvo Peeters. Kurioze, la bazajn ideojn de la rezolucio kontraŭstaris kelkaj esperantistoj.' La rezolucio eldiras i.a. 'ke EU ne sukcesis ĝis nun krei aŭtentikan komunan identecon, sen kio ĝi ne povas havi longdaŭran estonton; ke tia komuna identeco multe fortiĝus nur, se oni enkondukas komunan edukadon pri tuteŭropaj valoroj en ĉiujn elementajn eŭropajn lernejojn, se eble inkluzive komunan neŭtralan lingvon kiel komunan identecsignon'. Kredeble, multaj esperantistoj rezistis kontraŭ la proponata reenmerkatigo de ilia lingvo kiel EU-identeclingvo, dum iuj el la neesperantistoj havis tute alian agendon ol varbi por Esperanto. Ili celis kolporti – kun la asisto de esperantistoj – lingvobazitan doktrinon pri 'identeco'. AEK kaj IALJ projektis ĉe la simpozio plian kunlaboron.

Estus troigo nomi la 'eŭropan ideologion' de Tišljar produkto de novdekstrismo. Sed kelkaj partoj de ĝi ŝajnas esti almenaŭ sufloritaj de novdekstruloj. Pli grave, kelkaj novdekstruloj evidente vidas en ĝi kluzon, tra kiu ili povas efike vastigi sian influon en la esperantista medio.

La ideologia stumblo inter Socialismo kaj (la) Internacia Lingvo

Alberto Fernandez (prelego Gento 2001)

Unue mi rakontos anekdoton.

Tuj post la dua mondmilito, en 1947, - mi tiam estis 17-jara - mi hazarde malkovris Esperanton kaj tuj eklernis ĝin kun grandega fervoro. La ideo de Internacia Lingvo* estis por mi io grandioza. En tiu sama periodo mi fariĝis membro de la loka socialista junular-movado. Iun tagon mi renkontis unu el la naciaj gvidantoj de tiu movado. Li estis homo klera kun bona reputacio kaj li informis min pri baldaŭ okazonta internacia renkontiĝo de socialistaj gejunuloj. Mi tiam kun naiva entuziasmo diris: 'Ho! Sed tio estos belega okazo por propagandi Esperanton!'.

Kiel li reagis? Unue, li laŭte ridis. Poste, tre serioze li respondis: 'Esperanto estas io malbona!'

Mi restis muta. Kvazaŭ fulmo min trafis. Kaj mi nenion komprenis: kiel povus lingvo por internacia komunikado, lingvo por plifaciligi kontaktojn inter la popoloj, lingvo kapabla klerigi la laboristan klason, lingvo por kontraŭbatali ŝovinismon - kiel tia lingvo en la kapo de serioza kaj kompetenta socialisto povus esti 'io malbona' ?

Stranga nekompreno

En la postaj jaroj, kiam mi iom post iom ekkonis la esperanto-movadon kaj ĉefe kiam mi iomete aktivis en la laborista esperanto-movado, mi ofte rememoris tiun anekdoton kaj mi konvinkiĝis, ke tiu homo estis verŝajne misinformita aŭ fuŝinformita de iuj esperantistaj zelotoj, aŭ ke li estis viktimo de antaŭjuĝoj. Aŭ eble li estis nur skeptika kaj konsideris Esperanton naiva utopiaĵo? Sed mi ankaŭ spertis, ke li ne estis sola inter gvidantoj kaj respondeculoj en la loka kaj landa socialisma movado por montri malintereson kaj nekomprenon pri la laborista esperantismo. Tio povas aspekti strange ĉar ja ekzistas pluraj komunaj karakterizoj inter, unuflanke, la baza socialisma ideologio kaj, aliflanke, la principo de internacia lingvo kaj ties signifo por la laboristaj esperantistoj. Jen kelkaj ekzemploj de tiuj komunaj karakterizoj:

. unue, en ambaŭ vivas internaciismaj ideoj pri unueco de la laboristoj en la mondo

. due, socialismo estas ligita al scienca planado de la socio, kaj Esperanto, kiel konstruita lingvo, bone kongruas kun tiu koncepto

. trie, komuna internacia lingvo, kiel Esperanto, iel subfosas la nacian lojalecon, do la ŝovinismon kiu mem nutras militismon kaj kapitalismon - du malamikoj de socialismo

. kvare, la praktika uzo de Esperanto estas grava por la edukado de laboristoj, do, por ilia emancipado, kiun socialismo same alstrebas.[1]

Konklude, la socialisma ideologio estas principe tre akordigebla kun la demokratia spirito de Esperanto. De kie venas tiu nekompreno inter ambaŭ? Kio funde malglatas?

Ĉu kulpas la oftaj misprezentoj aŭ netaŭga informado el esperantista medio por tion klarigi? Aŭ la same oftaj antaŭjuĝoj kaj skeptikismo de la t.n. 'ekstera mondo' ? Certe, ambaŭ faktoroj nekontesteble intervenas sed en tiu ĉi kazo multe pli gravas io alia, io principa - nome mankas en la ĝenerala marksisma ideologio aproba sinteno rilate al Internacia Lingvo.[2] Per aliaj vortoj, la oficiala doktrino de la ĉefaj marksismaj teoriistoj estas neniel fa-

vora por la koncepto de Internacia Lingvo ĝenerale kaj ties konkreta formo en la lingvo Esperanto. Mi konfesas, ke nur antaŭ deko da jaroj mi tion eksciis kaj tiam komprenis la konsekvencojn.

Ni foje ekzamenu tion tre koncize.

Iom kontraŭ, apenaŭ por

Unue ni sciu ke, en la epoko de la t.n. 'utopia socialismo' la ideo de iu 'monda lingvo' aŭ 'universala lingvo' tamen apartenis al la nebulaj konceptoj pri estonta socialisma socio. Unu el la tiutempaj plej influaj figuroj estis la politika filozofo kaj fama franca anarkiisto Pierre Joseph Proudhon (1809 - 1864) kiu eĉ iom fantaziis pri iu 'langue universelle. [3]'

Samtempulo de Proudhon estis Karl Marx (1818 - 1883), la ĉefa fondinto de la 'scienca socialismo', la 'marksismo'. Marx estis ne sole filozofo sed ankaŭ radikala ekonomiisto kaj revolucia gvidanto, kun klaraj, funde ellaboritaj konceptoj pri la evoluo de la socio. Do, ni ne devas miri, ke li akre kritikis la utopiaĵojn de Proudhon kaj eĉ mokis liajn diletantajn klopodojn pri 'universala lingvo'.[4] En la ampleksa verkaro de Marx oni apenaŭ trovas iun mencion aŭ aludon pri dezirindeco de komuna internacia lingvo, eĉ ne kiel eventuala ligilo inter la laboristaj movadoj de diversaj landoj[5] kiuj, ekde 1864, klopodis internacie kunlabori en la 'Internacia Laborista Asocio', kiun historiistoj nun nomas 'Unua Internacio' (ĉar poste venis ankaŭ Dua, Tria kaj Kvara Internacioj).

Same kiel Proudhon, ankaŭ Marx vivis en epoko antaŭ la apero de praktike funkcianta internacia lingvo, kiel Esperanto. Tio ne validas por la marksisme inspiritaj ideologoj, kiujn mi nun rapide prezentos.

Lenin (kaŝnomo de Vladimir Iliĉ Uljanov) (1870 - 1924), la fondinto de la Bolŝevika Partio, de Sovetunio kaj de la Tria Internacio estis ne sole efika kaj sukcesa revolucia gvidanto sed ankaŭ grava kontribuanto al la socialisma teorio, la t.n. 'leninismo'. Kiel rilatis Lenin al la ideo de internacia lingvo ĝenerale, kaj al Esperanto speciale? Ekzistas onidiroj laŭ kiuj Lenin estis favora al la koncepto de internacia lingvo, eĉ ke li sciis Esperanton … sed tio estas verŝajne pura fantazio. Oni fakte ne scias pri iu dokumento en kiu Lenin sin klare esprimas por aŭ kontraŭ la ideo de internacia lingvo.[6] Li, do, ne aktive interesis sin pri la problemo. Ni eĉ povas dedukti ke li kontraŭis la ideon ĉar, kiam en 1918 la urbestro de Stokholmo lin demandis ĉu la soveta registaro pretus aligi internacian konvencion pri la enkonduko de mondlingvo en ĉiuj lernejoj (en tiu kazo temis pri Esperanto), Lenin lakone respondis 'Ni jam havas tri mondlingvojn, kaj la rusa estos la kvara!'.[7] La 'tri mondlingvoj' tiam estis la angla, franca kaj germana aŭ hispana.

Mi tamen devas insisti pri grava nocio en la idearo de Lenin, nome lia principo pri egalrajteco, lingve kaj kulture, de ĉiuj nacioj kaj popoloj en la vastega


A. Gramsci

Sovetunio. Neniu privilegio por kiu ajn lingvo aŭ nacio.[8] Tio estis politika koncepto kiu legitimis la ekziston de laborista, progresema esperanto-movado en la juna Sovetunio kaj kiu permesis ĝian rimarkindan kreskon en la 20-aj jaroj kaj komence de la 30-aj.

Lingvo detruenda

Post la morto de Lenin en 1924, la gvidadon de Sovetunio transprenis Stalin (kaŝnomo de Jozef Djugaŝvili) (1879 - 1953). Kiel ni scias, Stalin estis diktatora ŝtatestro de Sovetunio kaj ĉefa gvidanto de la monda komunismo dum preskaŭ 30 jaroj. Dum la jaroj 1937-38 laŭ ordono de Stalin okazis en Sovetunio la t.n. 'Granda Purigo', kun centmiloj, eble milionoj da viktimoj, depende de la fontoj. En tiu tragedio ankaŭ pereis preskaŭ la tuta Esperanto-movado.

Sed kial la esperantistoj estis eliminataj? La respondo, kompreneble, estas pli kompleksa kaj nuancita ol mi nun skizos.[9] La 'Granda Purigo' celis havigi al Stalin absolutan potencon super ĉiuj strukturoj de la ŝtato. Tio implicis, ke la Komunista Partio havu tre rigoran monopolon pri informado. Esperantistoj, per siaj multaj eksterlandaj kontaktoj, kapablis trarompi tiun informado-monopolon. Sekve, ili estis danĝeraj kaj tial devis malaperi. Sed alia faktoro estis aldona motivo por silentigi la esperanto-movadon en tiu epoko. Komence de la 30-aj jaroj estis ellaborita tre forta, centra ŝtatpotenco en Sovetunio, kun la rusa kiel oficiala lingvo por la tuta lando. Sekve, ne plu validis la principo de Lenin ke en socialisma ŝtato ĉiuj ĝiaj lingvoj havu la samajn rajtojn. En tiu atmosfero de rusa ŝovinismo la ideologia bazo de la sovetia esperanto-movado fariĝis malkomforta kaj ĉiu agado por Esperanto suspekta. Sed ankaŭ la tradicia internaciismo de la sovetiaj esperantistoj subite fariĝis same suspektinda depost kiam, en tiu periodo, en Sovetunio estis definitive decidite ne eksporti la revolucion al aliaj landoj sed unue konstrui socialisman socion en Sovetunio mem.

Povas aspekti strange ke Stalin, en sia teoria kontribuo al marksismo, ankaŭ sin esprimis pri la lingva problemo en la estonta tutmonda socialisma socio. Ni povas jene resumi lian vidpunkton: [10]

. Antaŭ 1930, Stalin opiniis ke en la epoko de komunismo la naciaj lingvoj kunfandiĝos en unu komunan lingvon, do en 'ion novan'. Tio estis komforma al la tiam gvida lingvistika skolo en So-

vetunio - kaj relative favora por la ideo de konstruita internacia lingvo.

. En 1950 li estis pli imperiisme inspirita kaj deklaris ke, kiam du lingvoj kruciĝas, unu rezultos kiel venkinto, konservas sian gramatikon kaj bazan leksikon (...) dum la alia lingvo iom post iom formortas. En tiu koncepto kompreneble ne plu estas loko por la ideo de komuna internacia lingvo.

Tio pri Stalin. Nun sekvas du aliaj, tre influaj marksistoj.

Intelektula malŝato

Antaŭ la unua mondmilito la ĉefa teoriisto de la germana socialdemokratio estis Karl Kautsky (1854 - 1938). Li vaste popularigis la marksisman idearon sed samtempe tre skeptikis pri la bolŝevika revolucio en Sovetunio. Kautsky, kiel unua, metis la demandon de la mondlingvo en la marksisman teorion.[11] Li hazarde faris tion en 1887, t.e. en la jaro kiam Zamenhof publikigis sian projekton de Internacia Lingvo. Kion tiam Kautsky diris? Esence, li forlasis la ideon pri supernacia, universala lingvo - kiu ja estis heredaĵo de la utopia socialismo - kaj samtempe ekskludis la eblecon, ke lingva unueco kreiĝos per artefarita lingvo. Li plue opiniis, ke la malapero de malgrandaj lingvoj estas neevitebla rezulto de la ekonomia progreso. Fakte, tiu ortodoksa marksisma teorio de Kautsky montris malkomprenon pri la aspiroj de malgrandaj nacioj. Kautsky estis tre influhava kaj oni povas rigardi lian vidpunkton kiel la bazon de la esence negativa sinteno de marksistoj al la demando de neŭtrala internacia lingvo.

Tridek jarojn poste, en 1918, la italo Antonio Gramsci (1891 - 1938) reprenis la tezojn de Kautsky sed ĉi foje eksplicite kritikis kaj severe kondamnis Esperanton mem.[12] Gramsci estis vere originala kaj multflanka marksisma teoriisto kun internacia famo kaj unu el la fondintoj de la Itala Komunista Partio. Li opiniis, ke 'serioza' marksisto ne interesiĝu pri Esperanto ĉar - mi iom krude resumas - Esperanto estas antaŭtempa, netaŭga kaj eĉ nebezona :

. Antaŭtempa, ĉar Esperanto rilatas al utopioj de la pasinteco kaj ĝi celas jam nun solvi la problemon de la multlingveco, kio fakte estas utopia salto al malproksima estonteco


. Netaŭga, ĉar Esperanto estas plene artefarita, do 'mekanika', ne havas historian tradicion, nek literaturon, nek subtilan esprimpovon kaj tial ĝi ne povas sukcesi

. Nebezona, ĉar Gramsci vidas en la estonteco iun ekzistantan lingvon kiel 'venkinta' sed en la nuntempo rifuzas atribui al Esperanto eĉ nur rolon helpan; nebezona, plie, car - same kiel Kautsky - Gramsci neglektas ĉiujn aspirojn de la malgrandaj nacioj kaj, inspirita de intelektula elitismo, eĉ opinias ke la subaj popoltavoloj ne tiom bezonas internaciajn kontaktojn ...

Ni povas resumi tiun rapidan superrigardon per la konstato ke la gvidaj marksismaj teoriistoj neniel favoris la ideon de iu 'antaŭtempa' Internacia Lingvo ĝenerale, ankaŭ ne de la 'nuntempa' artefarita Esperanto. Tiu baza negativa sinteno de la plej altaj marksismaj aŭtoritatoj kompreneble estis serioza handikapo por la disvastiĝo de Esperanto en laboristaj medioj. Tamen, en la mezaj tavoloj de la laborista movado tiu malaprobo rilate al Esperanto ne estis ĝenerala kaj, kiam ĝi manifestiĝis, ĝi ofte estis pli pragmata ol principa. Eĉ aŭdiĝis voĉoj favoraj, ankaŭ de renomaj gvidantoj. Mi mencios nur du ekzemplojn kie poruloj kaj kontraŭ-uloj publike alfrontis unu la alian.

Publika kontraŭstaro

En 1907 okazis Internacia Socialista Kongreso en Stutgarto.[13] Du francaj socialistoj - unu el ili estis la fama oratoro Jean Jaurès - metis proponon en la tagordon, ke Esperanto estu uzata en la oficialaj dokumentoj de la Internacia Socialista Oficejo en Bruselo. Tiu relative modesta propono fiaskis, ĉefe pro tre akra kontraŭstaro de germana socialdemokrato. Cetere, tiu malakcepto estis malbone digestita far socialdemokratoj en la esperantista mondo kaj kelkaj el ili - inter kiuj la tiama esperanto-pioniro Edmond Privat - protestis per publika letero en kiu ili substrekis la kontraston inter la principa internaciismo de socialistoj kaj ties reala konduto.[14] Vana protesto.



Dua ekzemplo, ankaŭ el 1907, rilatas al la unua Internacia Anarkiista Kongreso kiu tiam okazis en Amsterdamo.[15] Unu el la gvidaj partoprenantoj estis la belga anarkiista aktivulo Emile Chapelier (1870 - ...). Chapelier estis samtempe agema esperantisto, i.a. kunlaboranto al la Internacia Socia Revuo kaj aŭtoro de pluraj studoj pri la rilato inter anarkiismo kaj la Internacia Lingvo. Por la kongreso Chapelier preparis detalan raporton pri la esenco, utilo kaj perspektivoj de Esperanto. Sed pro manovroj en la tagordo li ne rajtis prezenti tiun raporton. Krome, Chapelier, kune kun la itala anarkiista veterano Errico Malatesta, proponis al la Kongreso rezolucion ne sole por instigi la anarkiistojn, almenaŭ la plej aktivajn, lerni Esperanton sed ankaŭ por postuli ke la Anarkiista Internacio uzu Esperanton kiel laborlingvon. Tiu rezolucio estis malakceptita. La Kongreso montris sin pli pragmatisma ol idealisma kaj akceptis alian rezolucion kiu 'alvokas ĉiun kamaradon lerni almenaŭ unu vivantan lingvon'.

Kaj tamen, malgraŭ la manko de ideologia subteno en la marksisma ideofluo, jam frue en la 20-a jarcento Esperanto hezite disvastiĝis en laboristaj rondoj. Kleraj, idealisme orientitaj homoj intuicie sentis ke Internacia Lingvo estas neevitebla parto de estonta socialisma socio. Ili ankaŭ komprenis, ke praktika utiligo de Esperanto donos pli konkretan signifon al la internaciismaj pretendoj de la laborista movado. Por ili la alvoko 'Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!' estis ne vakua slogano, sed io vere alstrebinda.

Internaciisma entuziasmo

La unuaj laboristaj esperanto-grupoj estis tre batalemaj. Sufiĉas, por tion konstati, ekzemple legi la programon de la 'Internacia Asocio Paco-Libereco'. Tiu estis la unua proleta internacia esperanto-asocio, fondita en 1906. Jen ĝia programo:

. Lukti, per publikaĵoj, kontraŭ Armeo kaj Militarismo, Kapitalismo, Alkoholismo, kontraŭ dogmoj kaj antaŭjuĝoj kiuj malhelpas la plibonigon de la socia vivo

. Propagandi la internacian lingvon Esperanto inter liberpensuloj, internaciistoj, socialistoj kaj anarkiistoj

. Disvastigi inter esperantistoj la pensofluon de anti-militarismo, socialismo kaj anarkiismo.[16]

Tiu revolucia fervoro fariĝis eĉ pli ambicia en 1910, kiam la sama asocio, sub la nova nomo 'Liberiga Stelo', jene adaptis sian programon:

'Lukti kontraŭ Alkoholismo' fariĝis 'lukti kontraŭ Religio' (kio cetere ne estas pli facile ...) kaj la modesta 'plibonigo de la socia vivo' estis radikale ŝanĝita al 'renverso de la kapitalisma socio'. [17]

Eble ni povas nuntempe moki la bataleman patoson de tiu programo, sed ĝi estis plene komforma al la ideofluo de la tiutempa laboristaro kiu plejparte vivis en mizeraj kondiĉoj.

...kaj fundamentaj konceptoj

Kiel ni vidas, la internacia lingvo Esperanto estis ĉi tie konsiderata kiel instrumento por atingi socialan idealon. Tio estas tre klare kaj sobre resumita en principo-deklaro de la Ĉeĥoslovaka 'Laborista Esperantista Asocio'. En 1912 la revuo Kulturo de tiu asocio jene difinis ĝian ideologion:

. Unue ni estas socialistoj, nur poste esperantistoj

. Nia ĉefa celo estas la praktika uzado de Esperanto je la servo de la internacia socialismo

. La kultura kaj politika sinteno de esperantisto ne povas esti malgrava afero, sed la vera esperantismo - kiel maturiĝinta ideo - devas esti parto de la pensmaniero de ĉiu progresema homo, antiklerikala, antinaciisma, antimilitarisma kaj socialisma

. Por ni, la Internacia Lingvo estas ilo por atingi niajn idealojn, ne celo.[18]

Tiu principo-deklaro emfazas ion tre gravan, nome ke Internacia Lingvo estas esenca parto de progresema mondkoncepto, ke Internacia Lingvo ne povas sukcese disflori en kiu ajn mondo.

Ĉi tiuj konceptoj pri la rolo kaj signifo de la Internacia Lingvo burĝonis en diversaj variantoj en laboristaj grupoj antaŭ la unua mondmilito. Ili estis la idea fono por la kresko kaj disfloro, inter ambaŭ mondmilitoj, de forta laborista esperanto-movado, paralele kun la t.n. 'neŭtrala' movado. En tiu sama epoko SAT - Sennacieca Asocio Tutmonda - ne sole ĝuis sian apogeon sed ankaŭ transvivis akrajn ideologiajn konfliktojn inter siaj diversaj frakcioj, el kio rezultis skismaj internaciaj organizaĵoj de sinsekve anarkiistoj, komunistoj kaj socialistoj. Sed tiu ege interesa periodo ne apartenas al mia prelego, ankaŭ ne la tragikaj eventoj kiam la laborista esperantismo estis brutale subpremita en nazia Germanio aŭ silente sufokita en Sovetunio sub Stalin. Same ne estas parto de mia prelego la ideologia degenerado de la laborista esperantismo post la dua mondmilito kaj ĝia plejparta malapero.

Du pensigaj ideoj

El tiu tumulta epoko inter ambaŭ mondmilitoj mi tamen volas elstarigi du interesajn ideojn. Ili estos mia resuma konkludo.

La unua ideo estas eldiro de la franca verkisto kaj revoluciulo Henri Barbusse (1873 - 1935). En 1922 aperis la SAT-broŝuro For la Neŭtralismon!, verkita de Eugène Lanti - la fondinto de SAT - por pravigi la ekziston de laborista esperanto-movado, aparte de la 'neŭtrala' movado. Sur la titola paĝo de tiu broŝuro troviĝas jena citaĵo de Barbusse:

'La burĝaj kaj mondumaj esperantistoj estos pli kaj pli mirigataj kaj teruritataj de ĉio povanta eliri el tiu talismano: instrumento donanta al ĉiu ajn homo la eblecon interkompreniĝi'.[19]



H. Barbusse

Barbusse ne estis esperantisto, nur simpatianto sed - se ni forgesas la bombastan tonon de liaj vortoj - li klare komprenis ke la plena, mondskala utiligo de neŭtrala internacia lingvo havos tre profundajn konsekvencojn ne sole je nivelo internacia sed ankaŭ ene de la socio. Konsekvencoj pri kiuj nesocie engaĝinta esperantisto apenaŭ estas konscia. Konsekvencoj kiuj rekte minacas konservativan mondbildon. Ĉu la nun monde uzataj lingvoj ĝuos la samajn privilegiojn kiel nuntempe? Ĉu ne malpliiĝos ilia kultura kaj ekonomia premo super la cetera mondo? Krome, ŝovinismo kaj ekstrema naciismo, ĉu ili ne riskas perdi siajn plej krudajn formojn? Kaj, kiam pli vastaj tavoloj de la popolo disponos pri praktika internacia komunikilo, ĉu tio ne estos paŝo al plia demokratio? Ĉu ĝi ne erodos la kulturan elitismon de certa intelektularo? Ĉu ...? Sufiĉas: internacia lingvo, kiel Esperanto, neniel estas senkulpa hobio! Ĝi kapablas funde influi nian mondbildon. Tion, ekzemple, tre klare komprenis la nazioj kiam ili, en 1936, oficiale malpermesis Esperanton per la argumento ke '...internacia miksita lingvo estas kontraŭa al la bazaj konceptoj de naziismo'.[20]

Per aliaj vortoj: Internacia Lingvo estas ideologie tre ŝarĝita, en sia plejprofundo ĝi ne estas io neŭtrala! Ni tamen komprenu, ke tiu ideologia fono estas relativa kaj dependas de la rolo kiun oni al la Internacia Lingvo volas atribui, kaj en la nuntempo, kaj en la estonteco. Ju pli ambicia tiu rolo, des pli pezos la ideologia flanko de la Internacia Lingvo kaj des pli da idea kontraŭstaro ĝi renkontos de ekstere.

La dua interesa ideo kiun mi anoncis iel estas komplementa al la unua. Ĝin esprimis, komence de la 30-aj jaroj, la aŭstro Franz Jonas (1899 - 1974). Jonas estis tiam la ĉefa gvidanto de la bone organizitaj laboristaj esperantistoj en

Aŭstrio. Krome, li havis fortan personecon, estis politike aktiva kaj post la dua mondmilito li fariĝis socialista urbestro de Vieno kaj poste, de 1965 gis 1974, eĉ prezidento de Aŭstrio. En 1933, kiam SAT trapasis ideologian krizon pro la foriro de la ortodoksaj komunistoj, Jonas opiniis ne plu senchava la ĉeeston de socialistoj ene de SAT kaj li decidis krei propran organizaĵon, nome ISE, t.e. 'Internacio de Socialistaj Esperantistoj' . Per tiu organizaĵo li esperis povi pli bone influi la Duan Internacion (de socialistoj) al subteno kaj utiligo de Esperanto.[21] Jen la kerno de lia rezonado:

'Socialismo nepre bezonas Internacian Lingvon, ĉar socialismo estas nur internacie realigebla'. [22]

La konvinko, ke socialismo estas nur internacie realigebla, laŭ mia opinio, estas funde prava, sed ĝi ne rekte koncernas nian temon. La dedukto, ke internacia socialismo nepre bezonas Internacian Lingvon estas tute logika, ĉar sen komuna Internacia Lingvo tia internacia ordo konservus kulturan diskriminacion, do ne-egalrajtajn popolojn, do ĝermojn de ŝovinismo - kaj tio ne plu estas socialismo. Internacia Lingvo estas esenca por alporti pli demokratan bazon en internaciaj rilatoj. Cetere, kiu ajn progresema mondkoncepto kiu celas konstrui mondon pli justan por ĉiuj, estas apenaŭ realigebla se ĝi ne inkluzivas pozitivan aliron al la ideo kaj realigo de Internacia Lingvo. Ambaŭ estas interligitaj. Ili sin reciproke bezonas.

* En tiu teksto foje aperas 'Internacia Lingvo' majuskle, foje 'internacia lingvo' minuskle. La majuskla formo implicas kaj emfazas ke temas pri la ideo, koncepto aŭ principo de komuna, neŭtrala, konstruita internacia lingvo.

Notoj

La ĉi subaj indikoj montras la fonton de faktoj kaj citaĵoj en la prelego. Ekzemple, '(7) Lins (1990) p. 338' signifas, ke la fonto de (7) troviĝas en la paĝo 338 de la verko el 1990 de Lins, laŭ la 'konciza bibliografio'.

(1) Forster (1982) p. 188

(2) Lins (1990) p. 316-323

(3) Lins (1990) p. 320

(4) Ratkai (1978) p. 23

(5) Lins (1987) p. 38

(6) Podkaminer (1978) p. 38

(7) Lins (1990) p. 338

(8) Podkaminer (1978) p. 42

(9) Lins (1990) p. 383-403

(10) Lins (1990) p.450 kaj Duc Goninaz (1993) p. 2

(11) Lins (1987) p. 38-39 kaj Lins (1990) p. 326

(12) Lins (1987) p. 34, 39 kaj Lins (1990) p. 332 kaj Blanke (1990) p. 536, 538

(13) Lins (1987) p. 32 kaj Lins (1990) p. 55

(14) de Bruin (1936) p. 30-31

(15) Moulaert (1995) p. 289, 295

(16) de Bruin (1936) p. 21

(17) de Bruin (1936) p. 22

(18) de Bruin (1936) p. 7-8

(19) Lanti (1922) frontpaĝo

(20) Lins (1990) p. 119

(21) Lins (1990) p. 276

(22) Borsboom (1976) p. 117

Konciza bibliografio

Ĉi tiu bibliografio entenas nur la verkojn aŭ artikolojn el kiu la prelego ĉerpis faktojn kaj citaĵojn

----

BLANKE, Detlev (red) (1978) - Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado, Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 228 p. (entenas dekon da studoj de ses diversaj aŭtoroj)

BLANKE, Detlev (1990) - Lerni el la historio (komentoj p. 532-543 en kaj pri la libro 'La danĝera lingvo' de U.Lins)

BORSBOOM, Eduard (1976) - Vivo de Lanti, Paris: SAT, 273p.

BRUIN, Gerrit Paulus de (1936) - Laborista esperanta movado antaŭ la mondmilito, Paris: SAT, 36 p. (temas evidente pri la unua mondmilito)

DUC GONINAZ, Michel (red) (1987) - Studoj pri la Internacia Lingvo, Gent: AIMAV 155 p. (naŭ diversaj aŭtoroj, Esperanto-Angla-Franca-Germana)

DUC GONINAZ, Michel (1993) - La lecionoj de 'La danĝera lingvo', en 'Sennacieca Revuo' 1993, Paris:SAT

FORSTER, Peter G. (1982) - The Esperanto Movement, The Hague-Paris-New York: Mouton Publ. 14+413 p. (speciale la ĉapitro 'Socialism and Esperanto')

LANTI, Eugène (1922) - For la Neŭtralismon! , dua eldono 1928, Paris: SAT, 32 p.

LINS, Ulrich (1987) - Marxismus und Internationale Sprache, en 'Studoj pri la Internacia Lingvo', (vidu ĉe Duc Goninaz 1987)

LINS, Ulrich (1990) - La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto , dua eldono, Moskvo: Progreso , 568 p.

MOULAERT, Jan (1995) - Rood en Zwart. De anarchistische beweging in België 1880-1914. (Ruĝa kaj Nigra - La anarkiista movado en Belgio 1880-1914), Leuven: Davidsfonds, 462 p.

PODKAMINER, Semjon N. (1978) - Lenin kaj Esperanto (en 'Socipolitikaj aspektoj …' vidu ĉe Blanke 1978)

RÁTKAI, Árpád (1978) - Socialismaj teorioj kaj la internacia laborista asocio pri la universala lingvo (en 'Socipolitikaj aspektoj … vidu ĉe Blanke 1978)

p.i.ratoj

pene insuligitaj ratoj

Serge SIRE